

Spomenka Štimec

Tilla

2002

Al Pero Čimbur

HONDURASA RIFUĜO

Por la rifuĝejo ŝi elektis Zagrebon, la urbo kiu ŝajnis al ŝi sufiĉe fora de ĉio de kio ŝi volis saviĝi.

La elekton de la urbo diktis la memoroj pri ŝia avo Hrdlicka, kiu en Zagrebo iam studis juron. En la familio oni menciadis la nomon de la urbo kun sento de senzorgeco. La avo tie ekŝatis enŝpruci mineralan akvon en la lokan vinon por refreŝigi ĝin kaj tiu kutimo neniam forlasis lin. Li rakontis ke li dum la studentaj jaroj eltrinkis glasojn post glasoj manĝante nur salumitajn krakenojn. En la epoko kiam ŝi aŭdis la vorton krakeno, ĝi iel mistere rilatis al generado de infanoj. Ne estis klare kiel, verŝajne sufiĉ is ke rimiĝis la krakeno kun infanoj kaj ke la vendisto de panbulketoj iom mistere ridetis dum li elprenadis la krakenojn el la kesto. Bulketoj kaj stangetformaj panetoj, eĉ la duonigita Semmel-bulketo facile rompebla al du partoj, neniom estis suspektata. Sed krakenoj jes. Ŝi dum multaj jaroj direktis la rigardon al siaj ŝulaĉoj kiam oni menciis la krakenon. Da jaroj ŝi havis kvin, dum la avo rakontis pri Zagrebo. Ŝi portis frizaĵon nomata *bubi* kaj la robon el blua veluro tiun dimanĉon, kiam ŝi sidis ĉe lia naskiĝtaga kuko.

Zagrebon ŝi vizitis nur unu fojon, antaŭ kelka tempo ŝi gastis tie sur la ĉefscenejo en *Don Carlos* de Schiller.* Impresis ŝin la atentema publiko kaj la neglektitaj barokaj fasadoj al kiuj la malriĉo ne povis kaŝi la iaman belon. Sur la programo estis presite: Tilla Durieux en la rolo de Eboli.

Sian edzon Lutz ŝi ne multe devis persvadi por ke ili provu retiriĝi en Zagrebon. Li tiutempe jam estis senidea kaj sekvis ŝafide. Kiam iliaj germanaj pasportoj senvalidiĝis, estis ŝia ideo havigi pasportojn el Ekstererŭopo. La instrukcioj diris ke por akiro de novaj validaj pasportoj ili reaperu en Berlino. Tien neniam. Precipe li neniam. La svisaj amikoj aranĝis por ili la loĝadon kaj nun, kun la falsaj hondurasaj pasportoj en la poŝoj ili veturis al Zagrebo.

Kvankam ilia celo estis Jugoslavio, ili unue devis enkapigi ion pri Honduraso, por koni ion pri la lando de siaj pasportoj. En kazo de neceso.

Ŝia penso kelkfoje revenis al la pentraĵoj kiujn ŝi devis vendi por pagi la pasportojn en la nigra merkato, sed ŝi rapide svingis per la hararo por forigi la penson. La nigrhara ulo kiu transdonis la pasportojn ne estis la sama al kiu ŝi elpagis la monbiletojn. Li nur flegme petis ke ŝi subskribu la akcepton de la dokumentoj. Tilla fartis malkomforte, ŝi ne tuj komprenis kial li volas ŝian subskribon. Iel ŝi imagis ke ĉe falsado necesas malpli da burokrataĵoj. Ŝi alrigardis lin por enkapigi lian vizaĝon, cikatron sur la vizaĝo el la kliŝo pri krimulo, li ne havis. Antaŭ ol subskribi, ŝi alrigardis liajn ŝuojn, belajn, el kruda ledο kun dika blanka kaŭĉuka plandumo. Elekton ŝi ne havis. Ŝi prenis fontoplumon el la sako kaj lasis sian nomon sur la paperon, rezigne kvazaŭ ŝi jam estus kaptita ĉe la falsado. Kiam ŝi eliris el la hondurasa ambasadejo, ŝi malfermis la pasporton kaj rigardis sian foton apud la hondurasa ŝtatblazono. Timigita ŝi unue fermis ĝin, poste sidiĝis kaj trarigardis ĉiun paĝon. Vidita de ekstere, la dokumento ŝajnis en ordo. La unua paĝo surhavis ŝian nomon. Sed ŝi ne plu estas ŝi.

Victoria, la amikino de Tilla, la sama kiu peris por trovi la kontakton pri la pasportoj, akompanis ŝin en aŭto al la svis-itala landlimo por testi la hondurasan pasporton.

La rigardo de Tilla fiksiĝis al la blanka montpejzaĝo. La monto aspektis kvazaŭ el vitro. Ankaŭ ŝia vivo fariĝis vitre rompebla. Streĉo en la gorĝo. Kio okazas al tiuj kiuj iras tra la mondo kun nepropraj pasportoj? La pasporto ne estis falsigita, ĝi estis originala, nur ŝiaj nomoj kaj ŝtataneco false kuŝis sur ties paĝoj.

Tilla ĉe la limo pene elmetis al sia vizaĝo indiferenton. La stomako jam doloris. La oficisto redonis la pasportoĜn sen multa ekscito. Ŝi ridetis al la amikino.

- Ni daŭrigu!

Post kelkaj horoj en eksterlando, la virinoj revenis. La pala edzo jam pene glutis salivon. Li imagis, ke Tilla jam estis kaptita. Al li ŝajnis ke ŝi estas tro longe for.

Senespero, riproĉo kaj feliĉo ke ŝi staras antaŭ li.

Ne plu estis tempo por koleri. En la lasta oficiala letero klare legeblis, ke lia restadpermeso en Svislando ne plu estis plilongigita. Ĝi morgaŭ ne plu validiĝos.

-Ek! Ni paku! Ŝajnas ke ni aĉetis la botojn de sep mejloj. Tiuj pasportoj movas antaŭen.

Ŝi ne povis scii ke iliaj hondurasaj pasportoj forbrulos dum bombardado de Beograd, kelkajn jarojn poste, kaj ke ŝi en Svislando letere petos kopion de sia pasporto. Ŝi ne povis konjekti ke ŝi multajn jarojn poste devos lukti kontraŭ la hondurasa ambasadejo kiam tiu postulos ŝian enloĝiĝon en Hondurason.

Nun komenciĝis la unuaj horoj de ŝia vivo kiel hondurasa ŝtatano kaj ŝi rapidis konsoli Lutz pri la vojaĝo al kiu ili ekiris.

-Kaj ne maltrankviliĝu pro la lingvo en Zagrebo. Tie multaj parolas germane. Ja ĝis 1918 Vieno estis la ĉefurbo de la regiono.

Iom tro laca ŝi estis por tiom optimisma frazo. Ŝi rigardis kiel li enportis siajn du grandajn valizojn en la ĉambron. Ilia leda lukso estis ankoraŭ senriproĉa. Tio estos ilia unua granda fuĝo post eliro el Berlino al Prago kaj poste al Svislando. Li, por kiu dum la lastaj jardekoj pakis servistoj, mallerte manipulis pri la seruro. Ŝi vidis kiel lia hararo fariĝis maldensa, dum li mallerte puŝadis la fermilon. Kiam ĝi cedis, ŝi alproksimiĝis por kisi lin. Ŝi hontis ke ŝia amo nun jam transformiĝis al prizorgo. Ŝi volis lin savi kaj ne plu venis ideoj divorci, la ideoj kiuj sieĝis ŝin ankoraŭ lastjare. Estis la jaro 1934, li malfacile portis sian judan ŝarĝon kaj same malfacile la gliton suben.

Ŝi ridetis vidante lin kontenta pri valizmalfermo.

Antaŭe li direktis fabrikojn. Li estis la ĝenerala direktoro de Schultheiss-Patzenhofer. Nun simpla valizmalfermo maltrankviligas.

Victoria diris:

-Se vi kredas ke vi edziniĝis al sapfabrikisto, li montriĝos sapveziko.

Sapfabrikisto Lutz ne estis. Li posedis fabrikojn de cemento kaj bierfarejojn. Posedis antaŭ la falo.

Kaj nun la grandsinjoro havis kontentan vizaĝon ĉar ili eniris la landon kaj la hondurasaj pasportoj denove kuŝis en ŝia sako. Post la skandala

tribunalproceso, li sentis maltrankvilon ĉiam kiam necesis montri sian identecon. Kvazaŭ ĉiuj memorus lin, la akuziton.

Ŝi palpis la adreson de la zagreba loĝejo dum ŝi remetis la pasportojn en la sakon. Kuraĝiga sento. Ŝi imagis la ŝlosilojn de la nova loĝejo. Iom tro dika fera bukedo por ŝia dama saketo.

La optimismo per kiu Lutz akcelis sian aŭton ankoraŭ portis lin. Ŝi fartis komforte tiel, sciante kiom da energio necesos kiam venos refluso en lia humuro.

-Ĉu vi havas ideon kien ni iras?

-Ne. Sed ankoraŭ en la malliberejo mi diris al vi ke mi plej volonte malaperus.

Eble tio nun komenciĝas.

Ŝi memoris, kiam ŝi ricevis la permeson viziti lin en malliberejo, dum la proceso ankoraŭ daŭris. Antaŭe ŝi pensis ke nenio povas esti pli terura ol la morto de Paul kaj ĉio kio sekvis. Sed ĉiam eblas unu plia ŝtupo da teruro: Lutz estis akuzita pri falsado de bilancoj de sia kompanio.

Por viziti lin en malliberejo ŝi volis elserĉi sian plej simplan jakon kaj fosis

por trovi iom ĉifitajn ŝuojn. Ne estis facile. En 1932 ŝi ankoraŭ estis Tilla Durieux. Ŝi elstaris en sia marŝmaniero. En kapturino. Nenio ĉifita estis en ŝia ŝranko. Ŝi diktis la modon de la virina Berlino. Sufiĉis ke ŝi tranĉu harojn, la aliaj virinoj sekvis samstile.

Parfumon ĉe la orelo ŝi metis por renkonti lin en la malliberejo . Estis tio

la boteleto de Chanel kiun ŝi malfermis por ilia geedziĝo en Londono. La akompanon de la advokato, ŝi rifuzis. Ĉe la pordo, uniformulo.

-Al kiu?- malrapide li skribis en rubrikon: vizitato.

-Stato: Edzino.

-Enirhor.

Malantaŭ ŝi jam vico de bruaj homoj kiuj rajtas al la vizito kiel ŝi.

Pri la profesio de la vizitato la administranto ne demandis. En 1932 ne multaj industriuloj estis en malliberejo.

Ŝi rajtis eniri la longan koridoron. Daŭris eternon ĝis Lutz aperis,

akompanata de gardisto. Ŝi aliris al la tablo, donis al li la manon. Inter ŝiaj lipoj kaj lia vango estis larĝa tablo. Ŝi ne certis ĉu la kiso de la edzino estis permesata. Nenia tuŝo permesatis.

Ŝi volis ke lin tuŝu la odoro de la geedziĝa parfumo, por enverŝi en lian energion por luktado.

Lutz estis rompita, fermita por ĉiuj sensoj.

-Pardonu - li lacis.

Li eĉ spiri ne emis. Videblis ke nur eta kvanto da aero eniras lian pulmon. Li nur embarason konis.

- Mi elmetis vin al tiu situacio. Mi plej volonte malaperus.

-Nu, jen, nun ni malaperas kune.

Peza sento de kuraĝigo.

Nun en aŭto, Lutz streĉis la fantazion kaj eniris imagon por respondi al la demando kiel li imagas la lokon kien ili iras:

-Se mi devus fantazii, mi imagas Zagrebon kiel ejon de Csillag Anna. Csillag Anna ĉe la turka landlimo.

Tilla ridetis al la ideo pri Csillag Anna. Ŝi estis virino kun du metrojn longa hararo. Ŝi malkovris mirindan kremon kontraŭ elfalado de la hararo. Komence de la jarcento en multaj eŭropaj gazetoj la fabriko proponadis la laŭdire miraklan kremon, anoncante alsendon post la enpago de la mono al la viena aŭ la berlina adresoj.

Zagrebo unavide ŝajnis trista provinco. Tilla ĵetis timeman rigardon al li. Super lia nazo koncentriĝis jam profunda falto. Li volis nur alveni, ne gravas kien.

Ŝi metis sian manon sur la lian sur la stirilo por cementi la senton ke ŝi ne forlasos lin.

Ĉe la stratangulo ŝi prononcis la demandon pri la serĉata strato.

-Ĝis la teatro, kaj poste maldekstren! - la respondo ĝentilis germane, kvankam ŝi starigis la demandon france. Ŝi ne komprenis kial. La demandito hazarde estis la plej brila loka profesoro pri lingvoj, granda latinisto, fama pri fonetiko. Li kapablis diveni en kiu lingvo la demandanto denaskas. Li levis la ĉapelon salute, dum ŝi dankis konfuzite. Ŝi ankoraŭ ne lernis ke ŝi hontas pri la germana.

Malantaŭ la dorso de la profesoro estis montrofenestro kun infanludiloj. Rapide esploris ŝia rigardo la enhavon: eta trajno kun vagonoj, du pupoj kun ondumita hararo, pilko kun desegnitaj papilioj.

Ŝi residiĝis ĉe Lutz, kiu jam aŭdis la instrukciojn pri la strato.

-Ne eblas sen teatro - ridetis Lutz dum la aŭto preteriris la imponan konstruaĵon en la flavo de Maria-Theresia**. Du diketaj anĝeloj en la fasado super la enirejo jam disblovadis la novaĵojn.

- Estas ankoraŭ io bonaŭgura: la pilko en la montrofenestro havis desegnitajn papiliojn.

- Ne malbone por komenci. Eĉ la flagoj mankas sur la konstruaĵoj

Komento ne necesis. La lasta pilko kiun Tilla vidis en Berlino en montro-

fenestro de infanludila vendejo, estis ornamita per svastikoj. Tio terurigis ŝin.

Baldaŭ ili haltis antaŭ la serĉata ĝardeno. La stratnumero kiun ili serĉis kaŝiĝis malantaŭ akacioj. Sufiĉis tuŝi la anson kaj la dommastro jam aperis por saluti ilin.

La vicdirektoro en la banko, la unuan fojon ludonis parton de sia domo. Sinjorino Kunari estis iom nervoza post la telefona demando de ŝia amikino, kiu elmigris al Svisio, ĉu ilia suba loĝejo estus luebla?

La gesinjoroj Kunari ankoraŭ ne bone al kutimiĝis ke ilia filo foriris studi al Vieno. El Svislando venis la informo, ke la luanto estos germana aktorino volanta trankvilon. Nenio pli.

Jen nun ili en la suba ĉefĉambro kiu ne plu havas ajnan signon de la viena studento. La sinjorino ĵetas esplorajn demandojn al la damo kun nigra pelta boao dum ŝi aliras al la fenestro kaj demandas ĉu teatro estas en tiu direkto.

Lutz malaperis kaj malantaŭ li jam eĥis brua akvofalo en la banejo.

La dommastrino malfacile glutis ĉiujn demandojn, kiuj boris en ŝi kaj reduktis ilin al la ĝentilaĵoj.

- Je kioma horo la gesinjoroj bonvolus havi la matenmanĝon? Ĉu certe nun sufiĉus teo? - en la demandoj tiriĝis malnova ĝentileco, iom timema.

Tilla ĵetis sin sur la geedzan liton, svingis la boanon ĉirkaŭ sin kaj rektigis la spinon dum iom da tempo.

-Ĝis nun, ne malbone!Ĉu tiel simple eblis fuĝi?

La teo venis en la ĉambron, la kakao kuko estis ornamita per flava floreto el citron-ŝelo, Tilla ridetis al tiu flava saluto en la bruno. La mano kiu tenis tranĉilon ne povis tranĉi tute rekte. Kortuŝis ŝin malperfekteco de la hejmo.

Lutz fosis en sia valizo. Tilla jam konis la ritaron. Li elprenos sian piĝamon, sian hejman mantelon, sian bansalon. Li kuŝos dum la venontaj du horoj en varma akvo por malstreĉiĝi, aldonante iom post iom pli da varma akvo.

Dum li elprenadis siajn rekvizitojn, ŝi elprenis la monujon por lerni pri la novaj bankbiletoj. Ili nomiĝis dinaroj.

La pantofloj kuŝis sur la tapiŝo kiel du endormiĝintaj katidoj.

-Nenio tiom ripozigus min nun kiel muziko.

-Ho, ne, ne eblas hodiaŭ, post 600 kilometra veturado.- Lutz defendis sin tre rapide.

-Ĝuste pro la veturado. Ĉu ne ĝenus vin se mi sola elirus ĝis la teatro transe?

Lutz post kelkvara geedzeco ankoraŭ miras pri la konduto de Tilla.

-De kie via energio nur venadas!

-Sed vidu, la teatro estas transe de la domo. Kaj ne unu fojon mi iris sola al la prezentaĵo. Kiam vi revenos el la banejo, mi jam preskaŭ estos ĉi tie.

Li tiris la ŝultrojn. Ne indus kontraŭstari.

Kiel trinkemulo malkovras trinkaĵon, ŝi jam baldaŭ staris ĉe la teatra enirejo.

Post tiom da jaroj dum kiuj ŝi eniradis tra la pordo por aktoroj, estas strange vicostari kaj peti bileton. Ŝi pagis senvorte per sufiĉe granda monbileto por eviti embarason demandi kiom kostas. En la spektejo ŝi ridetis vidinte la larĝan lustron alte sub la anĝeloj, al kiu ŝi rigardis dum la gastado, kiam tondris aplaŭdo por ŝi. Tiam ŝi staris aliflanke, sur la scenejo.

Ŝi trovis lokon en la spektejo kaj trankviliĝis. Tiel faris Cindrulino kiam ŝi post la noktomeza balo revenis al cindroj: ŝi ne plu aktoras. Ŝia lingvo fariĝas simbolo de la brunaj ĉemizoj, ne plu de la arto.

Ŝi rigardis kiel dancas polvoj en la reflektora lumo kaj petis sin ne patosi. Estas provizore tiel. Nur provizore. Iu flustris preĝon en ŝi.

Baldaŭ leviĝis la kurteno kaj la nekonata lingvo alŝprucis ŝin. Ŝi imagis, ke ŝi sentos doloron, sidante en provinca teatro meze de duaranga teatraĵo kun nekonvinka primadono. Sed ne estis tiel. Tiu aktorino sur la scenejo tute ne havis provincan etoson. Ŝi havis orelkaresan voĉon kaj la lingvaj kaskadoj de nekonata intrigo de iu loka aŭtoro fluis milde kiel la nokta pluvo al la laca vojaĝanto.

Dum la paŭzo, kiam lumiĝis la spektejo, nur tiam revenis la prema sento de soleco. Ŝi estas reduktita al spektanto dum en ŝia berlina teatro iuj hurlas: Judinoj for el la teatro!

Ŝi ekfosis en sia eta sako por trovi naztukon. Teni sin je la naztuko ne donas la plej fortan senton de apogo.

Ŝi rigardis tra la salono. Tie ŝajne ĉiuj konas sin. La amasoj malsuprenlitis al la teatra kafejo. Ŝi sekvis.

-En kiu lingvo mendi ĉe la verŝtablo?

-Ĉu permesate helpi? Kia honoro havi vin en la publiko! Ĉu vi estas sen

akompano ĉi tie?

La frazoj fluis en la germana. Iu virino kavalire proponis helpon.

- Mi apenaŭ kredis kiam mi ekvidis vin en la spektejo. Mi vidis vin en *Don*

Carlos en Zagrebo kaj mi vidis vin en Berlino en Wedekind***. Post kiam vi foriris el Zagrebo, tiom da homoj parolis pri vi! Post *Don Carlos* vi, pardonu la vulgarecon, ĉi tie famis kiel kafomarko.

Tilla sentis kiel flato grimpas al ŝia koro. Tie, en la loko kiun ŝi imagis fora

kiel Honduraso, meze de nenio, rekonis ŝin iu, evidente klera. La sinjorino antaŭ ŝi, kun senkulpigoj, interesiĝis pri ŝiaj trinkpreferoj. Tilla soifis sed ne kuraĝis konfesi ke ŝi prefere lektuŝus konjakglason ĉe tiu unua renkontiĝo kun sia publiko en Honduraso. Ŝi imagis, ke ŝi estos komplete nekonata ĉi tie. Ŝajne ŝia imago ne trafis. Ŝajne ŝi estas ĉi tie multe pli proksime al si mem ol ŝi kredis, metante la hondurasan pasporton en la sakon.

La sinjorino antaŭ ŝi havis viglan senton por kompreni la situacion. Laŭ la malforta rideto de Tilla, laŭ la fingroj kiuj kelkfoje grimpis al la lipoj, ŝi tuj konkludis ke ne estas bone starigi multajn demandojn.

La sinjorino prezentis sin sed la triobla slava nomo tuj elflugis el la orelo de Tilla dum ili manpremis.

Zlata Lubienski Adrovski en la unua sekundo dum ŝi vidis la aktorinan profilon tuŝitan per la palpilo de la lumreflektoro en la publikejo, komprenis ke en la teatro anonime sidas la plej granda heroino de la germana teatro. Tilla Durieux sidis sola kaj aspektis kiel halucino. La teatra direktoro devus loki ŝin en la prestiĝan gastloĝion. Li eĉ ne aperis ĉi vespere. Li havas neniun ideon kiu estas en lia teatro. Estas evidente ke la gastino venis anonima, ke ŝi volas resti tia.

-Mi miras ke ne estas grandaj amasoj ĉirkau vi. Vi maskis vin tiel, sen ŝminko en la publiko. En la urbon nuntempe alvenas ĉefe nur rifuĝintoj. Sed havi vin ĉi tie!

Tilla rigardis la alparolantaron. Agresema ŝi ne estas. Fajneco elradiis el ŝi. Sed Tilla timis de abundo de slava helpemo kaj preferis reteni anonimecon.

Zlata akceptis teni la distancon, kiun diktis la sinteno de Tilla. Ŝi demandis nenion.

-Se vi hazardade restus en la urbo pli longe, se vi bezonus iun ajn helpon, sentu vin libera kontakti min. - Ŝi etendis la nomkarton.

-Koran dankon! Mi ne scias. Mi nun alvenis, mia edzo malpakas miajn valizojn, planoj ankoraŭ ne estas klaraj.

-Sen iaj devigoj! kuraĝigis Zlata, timigita ke ŝi aspektos altrudiĝema. Vi estas bonvena ĉe mi iam ajn.

-Estas plezuro aŭskulti vian germanan.- rimarkis Tilla.

-Mi havis bonan guvernistinon knabinaĝe. El la ĝusta regiono. Se vi parolus dialekte eble ankaŭ mia germana forglitus dialekten...

Sonorilo. Manpremoj. Akompano al la sidloko. Rideto sigelis la konatiĝon.

Kiam la kurteno leviĝis, Tilla vane klopodis memori la nomon de la sinjorino. Sed varmigis ŝin io en ŝia voĉo, ne nur la sento renkonti sian

adoranton. Dum la posta akto Tilla kelkfoje sentis kiel la rigardo de la sinjorino glitas super ŝia haŭto.

El la vestejo, Zlata diskrete kapsvingis al ŝi. Tilla signomontris ke ŝi komfortas sola. Zlata revenis al sia societo.

Tilla gaje marŝis tra la teatra placo ĝis la akacioj en la nove akirita ĝardeno.

La longa ŝlosilo bruete turniĝis en la ĉefporda seruro.

Lutz jam ronkis sub la eta lumo. Lia kolonja akvo penetris tra la fumo de la ĉambro. Tilla malfermis la fenestron, freŝa humido el la ĝardeno ekgrimpis al ŝi. Ŝi tiris la kovrilon al la ŝultroj de Lutz. Li ne vekigis nur premis ŝian manon.

Estis agrable duŝi. Longe ŝi brosadis siajn mallongajn harojn kaj faradis S-movojn per la broso tra la hararo. Tiam ŝi kuŝiĝis apud Lutz. Dum ŝi fermadis la okulojn du grandaj flagoj kun svastikoj svigiĝis super iuj kolonoj. Ĉu tio estas Berlino?

La sonĝo ne konturis respondon. Ŝiaj lipoj moliĝis de senzorgeco. La dormo estis indulga.

Ekstere kuŝis la eta Zagrebo, provincgusta kaj humida de siaj pluvoj. La kapo jam faris komfortan truon en la lanugoj de la kuseno.

La monogramo de la domluantino enstampis sin en la vangon de Tilla.

La granda ekzilo povis komenciĝi.

*Friedrich Schiller (1750-1805) germana poeto

** dum la regado de la romia-germana imperiestrino Maria Theresia (1717-1780) multaj konstruaĵoj estis kolorigitaj per certa nunanco de flava koloro

*** Frank Wedekind (1864-1918) germana verkisto

LA ĜARDENO EN HONDURASO

La matenmanĝo estis servita sur la teraso, kiun atingis piraj branĉoj sur kiuj pendis etaj fruktoj apenaŭ elirintaj el florpetaloj. Flavo mankis al ili.

Tilla kontente prenis sian lokon. La panetoj estis krispe freŝaj, la buterpeco iom tro plumpa kun forta odoro kaj la ovoflavo de tiom intensa flavo, ke ŝi sentis esti denove en vilaĝo. Fruktoj en la aprikota marmelado retenis iom de sia somera malmolo. La servistino servis freŝe amelitajn buŝtukojn kaj proponis teon kun rumo kaj citrono, laŭ la gusto de la domestro.

Tilla ekridetis je la vorto rumo. Ŝia avo havis ĉiam etan rumbotelon ĉe sia tetaso. Ĉi tie viroj ankoraŭ diktis la teservadon. La anglan lakton en sia tetaso neniu ankoraŭ malkovris. La vido de tia matenmanĝo spronis la memorojn de Tilla.

Ŝi havis bezonon vaste rakonti pri la hieraŭa renkontiĝo en la teatro. Lutz ŝajnis ripozita, videblis tio en la maniero kiel li ellasis fumon el sia cigaredo, sed la falto kun ŝi vidis la unuan fojon hieraŭ dum la stirado, jam fiksiĝis super lia nazo neelviŝebla.

-Estis brila ideo aperi hieraŭ en la teatro. Alproksimiĝis al mi iu loka sinjorino, evidente damo el bona domo. Ŝi rekonis min. Imagu, ŝi memoris min el *Don Carlos* kaj ŝi eĉ spektis min en Berlino en iu teatraĵo de Wedekind. Sed ŝi ne estas spektanto de agresema tipo. Estis kvazaŭ renkonti iun parencon kun kiu oni simpatiis en junaĝo. Ŝi estas blonda, fajna bluzo, broĉo el ĉeĥaj granatoj, iom diketa sed ŝi scias kiel maski la talion. Mi ricevis inviton al ŝi, se vi iam emus akompani min.

-Pardonu, mi ne emas. Necesas tiom da paperlaboro por trovi la financan bazon en la venontaj monatoj. Mi ne volus eniri en iujn ajn rilatojn ĉi urbe.

Lutz estis ĝentila kaj li prisilentis ke la lasta afero kiu lin interesas estas konstati kiel iu kamuflas sian talivastiĝon ĉi-loke.

Tilla frapetis per la kulereto sian ovoŝelon en la antikva ingo kaj volis ne montri malkontenton. Ŝi aŭdis la lastan komenton, kiun li ne eldiris.

Ŝi ofte apud li sentis tiun grandan solecon kiun oni emus dividi sed troviĝas neniu kiu volus partopreni en ĝi.

Tial ŝi glutis la demandon kial ŝi trovis matene en la spegulo la spurojn de la litero Z sur sia vizaĝo, dum ili loĝas ĉe la familio K. Z por Zagrebo. Poste ŝi komprenas, ke por la gastoj oni kutime elprenas la plej fajnan litaĵon... kaj ĉi tie la plej fajna venis de la antaŭa generacio. La brodaĵojn de la avino neniu posta generacio kapablis imiti. En la familio Kunari famis iu avino Zofi.

Plaĉis al Tilla la ideo eble jam la morgaŭan tagon revidi la sinjorinon el la teatro, tiel tiu virino bonefikis.

Sinjorino Kunari venis saluti siajn gastojn post la matenmanĝo kaj demandi ĉu mankas io. Tilla klarigis, ke ŝi ankoraŭ ne komencis malpaki, la valizoj estas ankoraŭ malfermitaj, la ĉambro aspektas kiel bataalkampo, sed ŝi preferis hieraŭ iri al teatro por ripozi post la veturo.

Sinjorino Kunari prezentis sian filinon Ana. Se necesos iam ia kromhelpo al Tilla, Ana, gimnazianino, estas je dispono. La knabino salutis, freŝa kaj scivola, kun delikate pudritaj aknoj kiuj altiris pli da atento ol ŝiaj belaj dentoj.

La malpakado estis rapida. Tilla vivis @en valizoj@ tutan sian vivon post kiam ŝi forlasis la hejmon en Vieno kaj kiam ŝia panjo akompanis ŝin al provincaj gastadoj. La panjo havis fortan emon al grandaj valizoj en kiujn ŝi enmetis ĉion kio povus ekmanĝi survoje, ne nur fadenojn kaj kudrilojn. Foje dum iu restoracia vespermanĝo post aparte sukcesa teatraĵo, kiam la tuta ensemblo kunmanĝis, invite de la urbaj instancoj, la muzikisto gajigis la gastojn. Li muzikis je iu loka gitaraspekta muzikilo, fermadis la okulojn dum li kun kapo klinita malantaŭen, Entuziasme kantadis rekantaĵojn. Subite li ekhaltis meze de la muziko. Lia plektro rompiĝis. La panjo, rara gasto ĉe la teatra tablo, sidis apud Tilla kaj tuj rapidis al la muzikisto. Ŝi havis en sia saketo ne nur rezervan kordon sed ankaŭ la plektron. Panjo ricevis aplaŭdon por la savita koncerto. Tilla alrigardis ŝin.

- Sed panjo, vi estas pianistino, de kie la plektro? La panjo silentigis ŝin per manmovo kaj flustre klarigis. Oni enmanigis al ŝi plektron ĉe iu foirelmonro kaj ŝi prenis, ĉar oni povus uzi. Jen, oni povis uzi, 800 kilometrojn norde de la foirejo, en restoracio *Vespera sonorilo*. La panjo sidiĝis dignoplene. Fine ŝi havis la kronpintan pruvon, ke ĉio estas kunportinda.

Tilla lernis de la panjo kiel vojaĝi kaj ĝuste tial reduktis siajn valizojn. En la komenco de ŝia kariero, kiam ŝi mem devis havigi kostumon por ĉiu rolo, ŝi lernis ke la persona vestaro devas eniri la plej etan valizon.

La mano de Tilla rapide glatigis la robojn en la ŝranko kaj apartigis la gladendaĵojn el la valizoj. En la tempo de Paul, ŝi havis je la dispono lian kuiriston kaj lian serviston aldone al Helene, kiu zorgis pri ŝia garderorbo.

Sed la tempo de Paul amare finiĝis, nur Helene restis, sed ŝi zorgas pri la Berlina domo kaj atendas instrukciojn. Kion instrukcii?

La portreton de la avo Hrdlicka Tilla starigis sur la noktŝranketon apud sia lito. La avo lasis sin portretigi laŭ la bona gusto de la familio antaŭ la abiturienta ekzameno. Ŝi kontemplis la palajn trajtojn de la junulo sur kies genuo ŝi fotiĝis por sia unua portreto en 1905. Kie ajn ŝi vekiĝis, tie aperis apud ŝia kapo la ovalforma arĝenta kadro kun la vizaĝo de la junulo. Vidi tiun portreton rilatis al estado hejme. La unuan fojon la portreto de la avo alvenis tiom suden, preskaŭ al sia naskiĝurbo.

Lutz volis silenton ĉe la skribotablo. La dosiero de ilia malsuprenlito estis multpapera kaj netrasidebla. Li bezonis profundan koncentriĝon por trairi la papermarĉon.

Tilla decidis enketi kelkajn pliajn informojn pri la hieraŭa alparolintino. Sinjorino Kunari estis la plej elekvolta fonto. En ŝia vizaĝo ne montriĝis kiom da energio ŝi devas investi por teni distancon, ne starigi demandojn, gluti komentojn kiujn ŝi havis.

Tilla ne povis memori la nomon de Zlata kaj ŝi iris serĉi la nomkarton en la saketo.

-Ne necesas la nomkarto al mi. Mi konas ĉiujn en la teatro. Ĉu ŝi sidis ĉe la dekstra flanko? Ŝia kutimo vico estas tie, eble vico numero tri.

Tilla ne bone memoris.

- Ĉu ŝi surhavis mantelon el nigraj vulpopeltoj?

Tilla ne bone memoris.

-Ĉiuj konas ŝiajn peltojn, ŝia edzo estis fanatika ĉasisto kaj la peltoj restas

post divorcoj. Se ŝia nomo estis Zlata, se ŝi aspektis nobelule, ĉio klaras. Estas ja nur unu tia persono en la urbo. Ŝia familio estis senhonte riĉa, ili

estis grundtenaj nobeloj. En la familio oni du fojojn edziniĝis al la polaj grafoj, tial ili havas du polajn nomojn en sia familia nomo. Jam de multaj generacioj oni okupiĝas pri la arto en tiu familio, ili posedas unu el la plej riĉaj privatkolektoj en la urbo, ili heredis privatan kolekton de fama episkopo.

La vizaĝo de sinjorino Kunari ricevis entuziasman lumon, feliĉa ke ŝi havas la vorton kaj ke ŝi estas aŭskultata. Ŝi ŝatis rakonti, ŝi ŝatis teksti detalojn. Nun iu sekreta lumo haltigis ŝin. Ŝi frandis sur la langopinto la informon kiun ŝi volis meti al la taglumo, sed ŝi ankoraŭ hezitis. Kiam foje la diritaĵo eliros, ne plu eblos retiri ĝin. Ŝi malfermis la buŝon por diri la sekreton kaj tuj refermis ĝin. Ne, ne nun. Tiu sinjorino apenaŭ alvojaĝis. Ŝi ne meritas koni ĉion.

Tilla komprenis, ke Zlata estas bone konata persono en la urbo. Zlata havis du gefratojn, la fraton Albert kaj la fratinojn, kiu mortis junaĝe kaj oni ne plu memoras kio estis ŝia nomo. Ŝi falis de la ĉevalo. Ĉu Mary aŭ Jolanda ŝi nomiĝis? Jes, ŝajnas ke Jolanda ŝi nomiĝis, Jolanda falis de la ĉevalo.

Tilla sekvis amuzite sen kompreni kial Jolandoj kaj ĉevaloj ĉi tie rilatis.

Zlata disiĝis de sia edzo kelkajn jarojn post la geedziĝo. La sinjoro ege ŝatis ĉasadon, eĉ sian unuan fileton nur 4-jaran li instruis distingi inter la spuroj de leporo kaj mustelo. Nur por la ĉaso li disponigis sian tutan energion. Kaj ĉi tie, ĉe ni, oni vivas de tiom da aferoj, estas tiom da problemoj, oni ne povas nur ĉasadi, eble li povis tion permesi al si junulaĝe en Pollando. Ĉiukaze, eble post la Mondmilito, ili ne plu dormis sub kuna kovro. Li elloĝiĝis kaj foriris al Slovenio. Kiam la infanoj estis etaj li revenadis foje, sed nun jam de longe neniu vidis lin.

Por la vero de la rakonto necesus aldoni, ke skandalkronikoj diris, ke Zlata multe pli ŝatis virinojn. Nun ŝi vivas kun gefiloj kaj iliaj familioj rande de la arbaro. Ŝi vendas sian lingvoscion. Fine, ĉiu reĝimo bezonas lingvojn. Antaŭe ŝi tradukis el la franca, nun kreskas ŝiaj germanlingvaj servoj.

Ŝi vivtenas sin per ludonado de la loĝejoj en la familia palaco. La palaco postrestis el la tempo kiam ŝia panjo estis juna. De post tiam oni ne renovigis ĝin. Zlata junaĝe rajdis kiel knabo kaj pafis kiel soldato, ŝi rave muzikis, ŝia patro ja venis el la lando de Chopin, ŝi havis la plej bonan muzikinstruistinojn sed tiam subite estis skandalo pri ŝi.

SinJORino Kunari haltis. Ŝi sentis ke ŝi troigis, sed la rideto de Tilla spronis ŝin. Inklinojn al virinoj kaj skandalojn pri la muzikinstruistino ŝi almenaŭ povus prisilenti. Ŝi volus retiri la frazojn kiuj elflugis sed eblis nur fari rezignan manmovon.

-Kiu scias kie estas la vero.- ŝi aldonis filozofie por ricevi retiriĝeblecon.

La vero estis *jo-jo ludilo*. Ĝi malsuprenkuris laŭ la elasta fadeno kaj grimpas denove.

Silento. SinJORino Kunari profunde entiris aeron por karesi siajn pulmojn post tiom da monologado. Ŝi petis senkulpiĝon pro la malfajna babilemo.

-Ana volonte akompanos vin al la hejmo de sinJORino Zlata, kiam vi emos. Mi parolis kun Zlata antaŭ kelkaj monatoj laste. Se mi bone konkludis ŝi kompiladis tiam iun germanan frazaron.

De sia loko Tilla povis bone vidi kiel Lutz malfaldas la dikan dosieron sur la tablo. Lutz pri la paperoj paroladis nenion. Li ne volis lacigi Tillan. Tiujn procentaĵojn kiujn li nun tage-nokte kalkuladis ŝajnis esti sub ŝia perceptkapablo.

Li admiris kiel ŝi kapablas enkapigi senriproĉe grandegajn ĉapitrojn da monologoj kaj ne kapablas teni en la memoro la plej simplajn procentaĵojn.

-Sed tiuj ciferoj pri bonhavo konstante ŝanĝiĝas. - provis ŝi spriti.

Li kvitancis per rideto.

La gimnaziano Ana, kies germana sufiĉe lamiĝis, kaj kiu suferis pro aknoj pli ol pri lingvomanko, montriĝis iom kruda akompananto. Gruzo knaris sur la ĝardenaj padoj sub iliaj sandaloj. Pasis multe da tempo ekde kiam Tilla ŝokis gastojn aperinte en sandaloj sen ŝtrumpoj, ĉe iu akcepto.

Nun nekonata knabino gvidas ŝin en la ombro de la fasadoj en Monaĥina str. Tilla preteriris la preĝejon de Sanka Marko. Sen amuzo ŝi konstatis ke ĝia buntkahela tegmento konvenus al la rakonto de Grimm pri la kukdomo de la sorĉistino. La kaheloj desegnis sur la tegmento diversajn blazonojn. Sur ĉiu domo fera seruro en kverka pordego. La pordo kaj la seruro montris, ke la antaŭa generacio fartis finance pli bone ol la nuna. Ankaŭ la siringarbustojn plantis tiuj, kiuj poste translokiĝis al Mirogoj-tombejo.

-Morti kaj lasi siringarbuston odori. Ne malbone.

Tilla rigardis ĝardenojn.

- Ĉi tie. - Ana haltis ĉe la barilo, kiun voris hederavido. Helebaroj sur feraj stangoj, plantitaj en la barilon por gardi la domon, jam perdis siajn glavajn pintojn. Tilla streĉis la okulojn por deĉifri la nomojn de Zlata enforĝitajn en la mezo de la barilo: la ornamriĉaj A kaj L kuŝis en la sino de U. De la enirpordo videblis razeno al kiu eliris vasta teraso, kun mebloj el plektitaj vergoj.

Knabino kun blanka antaŭtuko aperis ĉe la pordo. Ŝi per unu rigardo rekonis Anan kaj ĉio klaris por ŝi.

- Ĉu vi bonvulus sidi sur la teraso. Estas ombro tie. Tuj venos la sinjorino .

Por atingi la terason Tilla kaj Ana devis trairi malhelan salonon kun pezaj kurtenoj. Tilla sub ŝiaj plandoj sentis, ke ŝi paŝas sur tapiŝaj cervoj, birdoj kaj stilizitaj arboj, kvazaŭ ilin desegnis infano. Familiaj oleportretoj en pezaj kadroj ornamis la salonon.

Zlata aperis tuj, gaja kaj neformala, en somera robo, kun rubando en la hararo, senŝtrumpa, kun unu sandalo nebukumita.

Ŝi kisis ambaŭvange la gastinojn kaj ne intencis kaŝi kiom ŝi ĝojas, ke Tilla honoras ŝin per la vizito.

-Vi vivas tiom feŭde ĉi tie!

-Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis aliajn klaĉojn pri mi? Mi vivas feŭde? Nu, jes, la domo

estis feŭda. Sed nun, kiam venas iuj noblaj gastoj, nia servistino ne povas trovi ses samgrandajn blazonhavajn telerojn. Disponeblas nur malkompletoj. La familia havaĵo dispariĝis. Ŝajnas ke nur kverkoj en la korto ankoraŭ restis kompletaj, sed ankaŭ ilin minacas someraj fulmotondroj. La konstruaĵo, ĝardeno, teleroj, eĉ la servistino estas heredita. Kaj la servistino anoncis edziniĝon venontaŭtune kaj mi devos transpreni ŝian laboron. La lastan monaton forlasis nin ĝardenisto. Se mi mem ne prenis falĉilon, urtikoj tiklus gastojn ĉe la akseloj.

Tilla ŝatis la ideon pri urtikoj kiuj tiklas gaston sub la akselon.

-Turkoj regis sude de la rivero Sava dum kvin jarcentoj. Mi ŝatas turkan kafon.

Ĉu vi preferus la vianan, kun lakto? Post kelkaj tagoj en Balkanio vi verŝajne jam sopiras al vienaj gustoj, ĉu? Zagrebo ĉiam sopiras pri Vieno, ĝi havas komplekson de provinco, kiun oni malfacile eltenas ĉi tie. Ĉio atingeblas piede ĉe ni. Ĉu vi jam spertis?

-Spertis malmulton. Ni alvenis nur hieraŭ. Mia edzo ankoraŭ ne elpakis siajn

valizojn. Ni ne decidis pri restado. Niaj geamikoj el Svislando proponis al ni familion Kunari, ni loĝas en la strato Gaja.

-Rakonti vi ne devos, ĉio videblos en via turka kafotaso - ridis Zlata. Kaj ne kredu, ke la strato rilatas al io gaja. Ĝi venas de la familia nomo. Oni dirus Kajo, ĉu ne Ana?

Ana sentis sin perforte tirita en la konversacion. Al ŝi iris la dankoj ĉar ŝi

alkondukis la noblan gastinon.

La kafotasoj alvenis, rondaj kaj malgrandaj kvazaŭ oni servos eliksiron.

-Mi trinkis kelkfoje sed neniam interesiĝis pri tio kiel oni faras tiun kafospecon.

-Ne eblas sen sorĉado. Ni montros al vi. Kata, la servistino, havas en la kuirejo specialan ilon en kiu ŝi rostas krudajn kafosemojn sur braĝo. Mirinde odoras dum tiu procedo. Kiam la semoj estas frititaj, ŝi muelas ilin en turka muelilo, vi vidos.

Baldaŭ aperis Kata por montri la ilaron. Stranga rostilo en kiun ŝi enmetis krudajn palajn semojn. Tiun ilon ŝi turnrostaras sur braĝo ĝis la semoj pretiĝas. La latuna ilo en ŝia mano estis la muelilo. Ĝi similis al stafeto kiun oni malfermas meze por enmeti paperan mesaĝon. Anstataŭ la mesaĝo en la truon eniras semoj. La fajna pudro faladis en la fundon de la skatolo post la ansturniĝo. Tilla provis turni la anson. Ne estis facile. Kramfo aperis en ŝia vizaĝo dum ŝi sukcesis ektorni la ilon.

-Vidu, tiun ilon ornamis la sama mano kiu ornamadis revolverojn.

Oni batas la latunan ilon de la mala flanko ĝis aperos reliefaj folioj.

- Nu, jen tiel ni kafumas. Iam Turkio tute ne estis for kun siaj

duonluno kaj la stelo. Memore al iu venko kontraŭ turkoj eĉ hodiaŭ oni niaurbe pafas per kanono por indiki tagmezon.

Tilla kun sia hondurasa pasporto en la saketo nur ridetis. Ŝi havis la

senton ke ŝi jam elglitis el Eŭropo.

-Kaj kio estas malantaŭ via ĝardeno?

-Niaj posedaĵoj estas ĝis la pado tie, antaŭ la arbaro. Post la arbaroj estas monto. Sljeme ni nomas ĝin. La montpinto. La monto nomiĝas Ursa, Medvednica.

-Vi fakte loĝas en arbaro.

-Nur parte. La strata flanko de la domo sufiĉe proksimas al preĝejoj. Kiam forpasis mia patrino mi transformis la domon en kelkajn loĝejojn. Mia panjo terurigis vidinte kion mi faris el la domo. Sed mi devas travivi. Teretaĝe loĝas miaj infanoj, mi havas du infanojn, filino kunloĝas kun sia edzo. Kata loĝas malantaŭe en sia ĉambreto. Kaj la suprajn loĝejojn mi ludonas al du familioj. Somere ni ĉiuj ĝuegas, kiel vi vidas. Sed vintre, la domo transformiĝas en glacikastelon. Rozoj el frostoj floras sur niaj fenestraj vitroj, vi povas imagi kiom da ligno kaj karbo eluzas niaj fornoj.

-La arbara pozicio provizas nin per diversaj bestoj. Ne mankas serpentoj.

Ana pintigis la orelojn. Serpentojn ŝi abomenas eĉ sur skulptaĵoj.

-Serpentoj?

-Ne timu. Nuntempe estas nur unu. Ĝi loĝas tute for, ne tuj ĉe la bedoj. Krome ĝi aperas nur en tre varmaj tagoj.

Ana faris grimacon kaj ĝojis ke hodiaŭ ne estas tia varmego.

La kuko kiun servis Kata estis el kategorio de pufkuko, kiun oni batas mane kaj lasas ripozi por ke la gisto pufigu ĝin. Venteto alportis ĝis la nazo de Tilla fortan odoron de citronŝelo.

-Ĉu ankaŭ citronoj venas el via ĝardeno?

Zlata devis ridi. Ni havas kelkajn citronujojn en potoj, sed ili ne portas fruktojn.

-Ĉu ili ne frostas vintre? - demandis Ana fakulete. Ŝi konis la historion el

sia propra hejmo.

-Ne, la potoj kun citronoj travintras en vitra dometo en la ĝardeno.

Zlata prisilentis kiom ŝi malŝatas la plantojn, kiujn necesas transporti por

travintri. Neniu el la domanoj emas helpi tiraĉi la kestojn kun pezaj arbetoj al protektejo. Ŝi pagas serviston, ĉar kiam venas momento de protektado, ĉiuj familianoj montriĝas ege okupataj.

La gastinoj direktiĝis al bedoj. Aro da arbustoj sur kies pikaj branĉoj pendis

oraj pilketoj. La sunradioj trapenetris ilin kaj videblis ombroj da semoj.

-Grosoj. - prezentis Zlata la frukton, vidinte ke Tilla heziteme rigardas ilin.

-Grosoj? ripetis Tilla penseme, tirante s-sonon pli ol necese. Videblis ke ŝi ne vidis la fruktojn dum jardekoj.

Tilla kaptis unu por gustumi.

-Ili kuŝas en sunŝelo kiel en eta epruveta protekto.

Ŝi metis la frukton en la buŝon.

- Haretoj sur la palato. Ĝuste tiel ĉe mia avo gustis la somero.

-Grosojn mi ŝatas. Ili ne estas postulemaj plantoj. Simile riboj. Kiam ni tri gefratoj estis malgrandaj, ni loĝis en la kamparo, en la bieno ĉe la avino. Ŝi ne permesis pikpreni du-tri berojn sed instruis al ni formanĝi plenan grapolon. Vidu, tiel, laŭ la maniero de la landinterno.

-Vidu!

Ŝi kaptis la grapolon kaj metis ĝin en la buŝon, la pinto de la tigo elstaris el la lipoj.

-Nun simple eltiri!

Ana kaj Tilla sekvis klaŭne.

La ribaj beroj diskuris sur la lango.

Sur la apuda ĉerizarbo birdoj koncertis.

-Merloj kaj fringeloj. Tio estas la lasta ĉerizarbo kiu nuntempe havas fruktojn. Ĉiuj aliaj jam fruktis en la regiono. Do, birdoj amase alvenas por vespermanĝi.

Tilla impresiĝis. Ŝi en sia lingvo malbone distingis kiu estas fringo kaj kiu fringelo.

Ana konfesis ke ŝi konas, krom papagon en la hejma kaĝo nur paserojn kaj merlojn.

-Vi scias ke flavajn bekojn portas virmerloj. Viroj ŝatas sin ornami, portas lipharojn, barbojn, flavajn bekojn... Je tiu horo birdoj kutime vespermanĝas kaj kantas. Ili ne konas Knigge.* Ĉe ili estas permesate fajfi kaj festeni.

Tilla devis ridi pri la aludo al la birda Knigge. Honduraso kiu konas Knigge? Kulture ŝi evidente ne forvojaĝis tro malproksimen.

-Jen pegu! Ĝi specialiĝis pri la larvoj sub la ĉeriza krusto.

Aŭdiĝis regula pafado sur la arbo.

-Kvazaŭ ĝi aktivigus iun etan mitralon.

Zlata prenis la altan bastonon kiu staris apogite al la ĉerizarbo kaj svingis per ĝi alte supren al la branĉoj. Ŝi sukcesis. Kelkaj fruktoj malsupreniĝis. Ŝi etendis fruktoparon al Tilla.

-Ĉu vi jam provis ĉi-jare ĉerizojn de la branĉo? Bonvolu, jen orelingo por vi. Ili konvenos al via blanka robo.

Zlata etendis paron da ĉerizoj kun kunkreskiĝintaj tigoj. Tilla pendigis ilin ĉe la orelo.

Zlata reskuis la branĉon. Jen la dua por kompletigi. La modelo 1934.

-Ĉu vi mem volas provi ?

Tilla prenis la bastonon, stariĝis sur siaj piedfingroj sed nur trakaresis kelkajn foliojn super sia kapo.

-Ha, ne estas tiel simple. Mi ekzercas tion la tutan vivon. Kaj mi jam pasis 45.

Tilla subite skuiĝis. Iu malvarmo trakuiris ŝian korpon.

-Ĉu malvarme? Ĉu ni eniru la domon?

Tintis la braceletoj sur la dekstra maleolo de Tilla.

-Io pikis min en la manplaton.

Ŝi montris ruĝan lokon kiu komencis ŝveli.

Zlata kaptis kuktranĉilon de la tablo, viŝis ĝin per la tuko kaj rapide alportis al Tilla.

-Kio? Per tranĉilo?

-Rapide metu malvarman klingon sur la vundon. La malvarmo helpas.
Nur premu ĝin delikate al la vundo.

Tilla sentis la agrablon de la malvarmo.

Zlata malaperis al la bedoj kaj revenis kun fasko da cepoj, tranĉis unu bulbon kaj petis la manplaton de Tilla.

-Permesu. Tiu suko eltiros la venenon. Estas iom specifa odoro, sed ĝi helpas.

-Ĉu vi vidis la beston, kiu vin pikis? Abelo, forfikulo, araneo, tabano? Iksodo ne estis. Ĝi ŝatas intimajn lokojn ne la manplatojn.

-Mi sentis nur la pikon. Kaj ne helpus multe se mi vidus la beston. Vi citis tutan bestĝardenon. Mi apenaŭ distingas inter abelo kaj vespo.

Zlata proponis komunan vespermanĝon, sed Tilla dankis. Ŝi ne volis tiom neglekti Lutz. La pufaĵo sur la mano iom mildiĝis.

-Vi diris ke vi legos al ni el la kafotaso, memorigis Ana por kiu tiu estis grava punkto de la programo.

-Mi ne volas tedi nian gastinon, sufiĉas ke ŝin pikis iu besto.

-Tute ne!- akceptis Tilla la ludon. Ĉu vi vidas estontecon en la kafejoj?

-El la feĉo restanta post kiam vi eltrinkis vian kafon. Tial oni turnas la tasojn kapaltere kaj lasas la feĉon sekiĝi.

-Mi funkcias nur individue, ne eblas grupe, unu post la alia. Ana ĉu vi emus pluki ribojn ĝis venos via vico?

Ana forpromenis kun la ujo al la bedoj.

Tilla kaj Zlata sidiĝis ĉe la kafotaso. Tilla gapis al sia ŝveliĝinta mano. Zlata diris antaŭ ol rigardi al la taso sur sia manplato.

-Zagrebo ne estas sufiĉe sekura por via edzo. Se vi bezonas iun helpon, kalkulu je mi.

Tilla rigardis antaŭ si, nudigita ĝis ostoj. Ŝi nur danke kapjesis trafita per tia komprenemo. Pasis apenaŭ plena tago de kiam ŝi renkontis tiun virinon. Al ŝi necesis nenion diri. Ŝi ĉion trasentis.

-Mi havas plurajn rilatojn, kiuj povus helpi, se estus necese.

-Mi ne scias kiel danki.

-Vi jam dankis, ĉar vi venis.

Tiam Zlata enrigardis en la kafotason de Tilla kaj kontemplis ĝin silente. Ŝi rigardis la eksteran flankon de la taso kaj diris malgaje:

-Nokte vi ploras, tage neniam.

Tilla sidis sur la teresa seĝo, la jukantan manplaton sur la femuro kaj rigardis senvorte al la ĝardeno. Neniu tiom rapide travidis ŝin kiel tiu virino. Tilla primokis ĉiujn sorĉojn post kiam amikino kuntiris ŝin al sorĉistino, dum Paul estis enkarcerigita soldato. Tilla en la berlina periferio, en eta salono de la vidistino, estis petita noti siajn demandojn kaj lasi ilin en la koverto. Tiam la virino dankis al ŝi kaj redonis senvorte la koverton kun la mono kaj la demandoj. Ŝi respondis al neniu demando en la koverto.

-Sed kial vi diras nenion? - Tilla insistis. La du vizitintoj gapis al la vidistino.

-Ĉu vere vi nenion povas diri?

-Mi ne scias la respondojn.

La amikino de Tilla insistis.

-Ĉion kion vi demandas rilatas al la tempo post julio kiam la sinjorino jam mortos.

La amikino, kiu pelis Tilla al la vidistino, nun kulposente ekploris. Tilla devis konsoli ŝin.

-Lasu, ĉio estas infanaĵo!

En julio ŝi estis tiom okupata ke ŝi forgesis kontroli kion ŝi faras en sia mortotago.

Nun ŝi konsterniĝis. La informo ke ŝi ploras nur nokte, trafis ŝin pli forte ol la anonco ke ŝi mortos en julio.

Zlata daŭrigis legi el la taso.

-Homoj transiras relojn. Vidu la figurojn pasantaj ĝis la relbarilo. Monperdo. Tiuj reloj gvidas al fora loko. De tie venas letero. Rigardu la koverton, ŝajnas io grava, kun stampo. Tiu vojo kurbiĝas. Haltas. Tri palmoj, oazo. Iu harlekeno. Ŝnurpupo. Viro. Virino. Valizoj. Kaj ĉi tie, lunserpo kaj stelo. Iel vi rilatos al Turkio.

-Ĉu vi rekonis ion?

-Nur la monperdon. - Tilla ĝojis ke ŝi trovis spritaĵon, kiu povas kaŝi kiom trafis ŝin la vortoj pri la nokta plorado.

Zlata remetis la tason sur la tablon.

-Ĉu ni voku Anan?- demandis Tilla, kiam la silento inter ili ekpezis.

Hejme ŝi entuziasmis al Lutz:

-Mi ne povis imagi, ke tiel kulturitan lokon mi trovos ĉi tie. La hejmo plena je olepentraĵoj kaj persaj tapiŝoj kaj vilaĝaj sorĉoj.

-Ĉu vi scias kiel Zlata kuracas insektpikon?

Ana ĝustaloke frapetis ĉe la pordo kun boteleto en la mano kaj flustris la misteran vorton:

-Pomvinagro.

Ana alportis la boteleton kaj bandaĝon laŭ la konsilo de Zlata.

Lutz sen entuziasmo, kun suspekto en la vizaĝo, mire flaris la fortan odoron de acido. Tilla fido-plene volvis la odorantan bandaĝon ĉirkaŭ la manplato.

Lutz fine trovis spacon por enŝovi realan informon en ŝian entuziasmon.

-Konfirmite. Post kiam ni pagos la jaran lupagon ĉi tie, se ni tiel decidus, ni ne rajtos fumi pli ol kvin cigaredojn tage. Nur ekstrema ŝparado povas savi nin.

Tilla ne akceptis ĉagreniĝon. La energio per kiu ŝarĝis ŝin la ĝardeno ankoraŭ tenis.

-Plej grave estas ke ni komencu ion labori. Senfaraj ni ne rajtas resti. Mi devas forgesi pri la teatro. Aktorado estas pasinteco. Ne eblas apartigi nuntempe la germanan lingvon de Hitler. Mi ne rajtas rilati al la scenejo. Iun alian okupon mi devas trovi ĉi tie. Nur ke mi liberiĝu de tiu pezo, ke mi estas aktorino. Ni sukcesos, vi vidos!

Ŝi riparadis la pomvinagran bandaĝon sur sia manplato. Lutz malpermesis al si la sesan cigaredon kies vico venis.

-De kie al ŝi la energio kredi?- Responde eblis nur levi la brovojn.

Post tiom da jaroj da geedzeco Lutz devis admiri ŝin. Ciferoj sur la papero al ŝi diras nenion. Ŝi vivas per siaj propraj internaj konvinkoj. Tiuj puŝas ŝin meandre antaŭen.

Per la broso de la avo Hrdlicka, ŝi karesis jam sian nukon ĉe la spegulo. Du rubandoj pendis surbruste de ŝia noktoĉemizo. Ŝi etendis la vizaĝon al li por la bonan-nokton-kiso.

-Ne ĉagreniĝu!

Lutz nur suspiris kaj enŝaltis la plej etan ĉambran lumon.

Tilla sentis kiel ŝin jam entiras la dormo. Ie ĉe la fono, inter dormo kaj nedormo, kunfandiĝis jam revo kaj realo.

Dronante pli profunden, estis al ŝi klare, al kio aludis Zlata dum ŝi citis kion ŝi

vidis en la tasofundo. *Homoj transiras relojn*. Tio estas la titolo de la pentraĵo, ŝia lasta van Gogh kiun ŝi vendis al Erich Maria Remarque **por havigi la hondurasajn pasportojn. Figuroj pasantaj ĝis relbarilo. Kiel ŝi ne rekonis tuj?

- Kia estus la valoro?- la verkisto levis la brovojn kaj paŭzis. Ŝi malsuprenigis

la rigardon de la glate razita vizaĝo al la kvadratoj de lia jako. Ŝi koncentris la tutan forton al la teksaĵo de unu kvadrato en lia jako kaj eldiris la sumon.

-Kaj mi bezonus la monon kontante. - aldonis ŝi, por ke ĉio estu klara.

La sekvan fojon kiam li surhavis la samon nigrekvadratan jakon li transdonis al ŝi la koverton.

Ŝi fartis malkonforte kiam ŝi antaŭ li nombris la monbiletojn. Eble tio estis parteto de la sumo kiun Metro Goldwin Mayer ***pagis al li por la scenaro de la filmo *En Okcidento nenio nova?*

La dormo ne plu permesis al ŝi ligi la fadenojn de la realo.

* Knigge - la aŭtoro de la libro pri reguloj de ĝentila manĝaĵo kaj la samnoma regularo.

** Erich Maria Remarque (1898-1970) germana verkisto

*** MGM - usona filmkompanio

SUB LA SPEGULETO

Tilla post la reveno hejmen el la ĝardeno de Zlata unue en la banejo kontrolis ĉu hazarde iksodo enloĝiĝis en iun molejon. Kun eta spegulo en la mano ŝi komencis traserĉi la molojn de la akselo. Neniu pentristo kiu desegnis ŝian portreton rigardis ŝin tiom severe. Nun ŝi klopodis per la rigardo eniri ĉiun falteton de sia korpo. Tie, en fremda banejo, sub la lampo kiu elradias ombron kaj ne lumon, Tilla kun la etendita kolo antaŭ la spegulo proksimigis pecon post peco de sia korpo al la pala lumo.

Kun la levita brako, ŝi memoris sian betulon el la viena ĝardeno al kiu ŝi kuris post la leciono en la lernejo por informi ĝin pri la matenaj lecionoj. La betulo, kiun Tilla nomis *ŝi*, aŭskultis multe pli kuraĝige ol la paĉjo aŭ la panjo. La betulo lasis la impreson ke Tilla pravis, ke morgaŭ ĉiu kiu ofendis ŝin senkulpiĝos. Tiutempe al Tilla gravis pravi. Dum ŝi staris antaŭ la betulo kaj levis la brakojn al ŝi, la vento agrable karesis la akselojn, dum ŝi tuŝis la foliojn sur la supra branĉo. Tilla estis la aŭgusta infano, kiu ŝatis la venton sur la haŭton.

Post la vento ĉe la betulo ne estis malfacile manĝi venton tagmeze. Kiam la dudeka jarcento estis en sia beboago, la aktorinoj devis mem prizorgi la kostumojn por teatraj roloj de siaj heroinoj. La panjo, kiu post la impulsa vangofrapo je la ideo fariĝi aktorino, decidis akompani sian infanon al la unua posteno en Olomouc, en Moravio. Pri investoj al teksaĵoj ŝi ne avaris. Nur pri

la manĝoj. Ŝi donis ĉiujn siajn ŝparaĵojn al la vendisto de teksaĵoj. Por manĝoj apenaŭ io restis. Tilla kaj la panjo ŝuldis sian gracian talion ĉefe al malsatado.

La malsatado daŭris dum ĉiuj unuaj teatraj jaroj. Iel la panjo ne insistis ŝanĝi la profesion. Belgajn pralinojn kaj la pasteĉojn el ansera hepato Tilla alportadis nur en la lastaj vivojaroj de la panjo. Pri ili ŝi ĝojis, kvazaŭ ili estus gajnitaj per la unuaj salajroj de Tilla, el la epoko de la vento.

La vento nenie estis tiom bela kiel alte en la aero. Tilla ŝatis flugi. Kiam la fratoj Rumler provflugis per sia aviadilo - ŝi estis ilia unua provfluga gasto.

Al neniu ŝi kuraĝis diri ke ŝi volus flugi. Sed kiam Paul demandis tiun vesperon, kio estas ŝia plej granda deziro, ŝi ne hezitis malkaŝi la sekreton. Li ŝatis la respondon.

-Ni flugos.- diris li penseme kaj kisis ŝin. Liaj kisoj havis tiun vesperon la odoron de helaj nuboj.

Ili flugis la sekvan sabaton. En balono. Ŝi estis preta unu horon antaŭ la ekiro, je la naŭa jam, en sia ŝpruce teksita kostumo. Li sidis apud ŝi, ĉirkaŭbrake tenante ŝiajn ŝultrojn malantaŭ la dorso de la manipulisto, kiu okupiĝis pri la balonŝnuroj. Sube kuŝis la tero. Vento blovis en la vizaĝon. Ili flugis dum tri sabatoj sinsekve, poste venis ŝtormo kaj ili devis paŭzi.

Foje post la munkena teatraĵo venis telegramo. @Tuj eniru trajnon al Berlino.@ Tie atendis surprizo. La surprizo estis sufiĉe unika: Paul aranĝis por ŝi flugadon en balono. Paul havis senton por ekstravagancaj donacoj. La plej forta certe estis - ke ŝin pentru Renoir. Sed en la unuaj jaroj de ilia vivo, li akompanis, por rigardi kiel ŝi ĝuas.

El la tempo de betulo flugi en balono estis ŝia revo. Ĝis Paul al neniu eblis mencii ĝin. Li komprenis tuj kaj ili flugis ofte. Ili ŝategis. La akcidento pri la flugado okazis nur unu fojon. Tiam kiam en la balono kun ili estis ankaŭ lia frato.

La spegulo ekstremis en la mano kiam ŝi memoris la falon de la balono en iun ĉeĥan vilaĝon, la subitan senton vidi la teron rapide alproksimiĝi kaj povi fari nenion por protekti sin. Bonŝance ĉe tiu falo neniu rompis ion ajn, sed ĉiuj tri vojaĝintoj kontuziĝis. Tilla forigis la spegulon por ne devi revidi la teron, kiu venas ĉiam pli proksimen al ŝiaj okuloj

Nun jam, la jaregoj kaj mortoj post la falo de la balono, kun speguleto en la mano, serĉante la iksodon, kiu ŝajne tamen ne ennestiĝis, ŝi rigardis sin per la okuloj de ĉiuj pentristoj kiuj ŝin desegnis. La unua fama portreto Tilla kiel *Salome**. Max Slevogt** desegnis ŝin en 1907. Rubando en la hararo. La peniko de Max estis leĝera, kvazaŭ ĝi ne havus pezon.

Ŝi sentis sur la vango la varmon de la reflektoro en la fotostudio. La fotisto Schenker faris ses portretojn por la bildkartoj Tilla Dureiux. Estis brunnuancaj la kartoj. Tilla kun la potforma ĉapelo, Tilla nudŝultra kun la frizaĵo nomata *bubi*. Tiklis ŝin ĉe la genuo la franĝoj de la mallonga jupo dum la fotisto kaŝiĝis sub la nigran tolon de sia fotilo. La unuajn bildkartojn ŝi subskribis al la aplaŭdintoj, kiam ŝi eniris restoracion en Bleibtreustr.

-Ĉu mi rajtas peti nun? - petis junulo alproksimiĝante al ŝia tablo. Ŝi ne tuj komprenis, kion li volas kiam li el la poŝo eltiris bildkartojn kun ŝiaj portretoj. Li volis ke ŝi subskribu ilin.

Ne nur la unuan fojon ŝi surpriziĝis, kiam oni petis ŝian aŭtografon.

Ŝia panjo, kiu preskaŭ freneziĝis pro timo pri malriĉo post la morto de la patro, povis imagi nur unu profesion por Tilla: instruistino de piano. Lecionoj ĉiamis. Por elteni ilin, Tilla havis ideon: sur la klavoj marŝos nanoj. La unuaj nanoj iras malrapide, nun ili rapidas, unu kuras kun la korbo, la aliaj sekvas, rapide, rapide, rapidege.

Kiam ŝi diris al la panjo ke ŝi ŝatus, nu, esti aktorino, la panjo, instikte, per vangofrapo, kvitancis la ideon. Nun la panjo ŝatus vidi tiun junulon kiu alproksimiĝas timoplene al restoracio en Bleibtreustr. kaj demandas ĉu estas la ĝusta momento por peti la aŭtografon de la granda aktorino. Tiom da pianlecionoj kaj ili ne faris pianistinon el ŝi.

La duan vangofrapon la panjo ne donis. Ŝi akceptis ke Tilla havu dum unu jaro teatran edukon kaj poste, oni vidos. La panjo per slava impulsemo klopodis defendi sian filinon de la fantomoj de la arto. Kial la filino de kemiisto ne volis ion alian, pli realan? Fine de la 19a jarcento ne eblis multa elekto por virina profesio. Eble la panjo volis savi sin mem.

Ankoraŭ en la gepatra hejmo, Tilla ŝatis konversacii kun la kahelforno en la ĉambro. La forno estis komprenema, kuraĝigis, jesis, neis, malkonsilis. Sufiĉis nur fikse rigardi ĝin kaj starigi la demandon en si mem.

Kiam iu eniris la ĉambron, ŝi rapide turnis la dorson al la forno por ne malkovri la aliancon. Estus terure suspektinde se oni ekrakontus ke ŝi parolas kun objektoj.

Okaze de la unua sursceniĝo, ŝi memoris la vangofrapon kaj ne volis kaŭzi skandalon al la familio. Ŝi aperu sub alia nomo, ne la vera nomo de la familio. Ŝi nomiĝu, ŝi nomiĝu... la fantazio ne iris tro malproksimen. De ŝia hugenota patro ŝi portis la francan nomon. Por la unua teatra programo, por la rolo de knabo el Tirolo, ŝi elektis la nomon de la franca avino. Tiel Duriuex ekfaris la nomon. Ŝi elektis ĝin tiel kiel ŝi elektus ĉapelon. La nomo devus bone sidi. Ĝi sidiĝis kaj ne velkis dum multaj jardekoj.

Tilla turnis la spegulon. Ĝi faris rondan signon sur la plafono. La iksodo ne estis trovita. Ŝi surmetis la noktoĉemizon kaj gaje revenis al Lutz. Li super siaj kalkuloj tute ne rimarkis, ke ŝi intertempe denove flugis en balono.

*Salome – Biblia virino, fama pro danckapabloj< la samnoma verko de Oscar Wilde (1856-1900) angla irlanddevena verkisto

** Max Slevogt(1862-1932) germana pentristo kaj grafikisto

FRAZARO

Supre en sia eta ĉambro Zlata listigis la esprimojn por la slipoj. Ŝia frazlibro ne volis progresi. La interkonsento kun la eldonisto estis transdoni la tekston ĝis printempo. Ĉu ŝi sukcesos?

La printempo ŝajnis malproksima sed nun ŝi estis en la fazo kiam ŝi nur listigadis la esprimojn kaj ordigadis ilin laŭ la sistemo, kiun nur ŝi povis sekvi. Ŝi devis eltrovi la kaĝon en kiu la vortoj bone kuŝos.

Dum la nokta papilio lasis sian pudron klopodante alproksimiĝi al ŝi, Zlata ordigadis la liston en la skatolo, en kiun ŝi enĵetadis la esprimojn. Hodiaŭ temis pri virino.

- Ŝi estis virtuozo pri ridetarto
- La haroj estis tinkturitaj sed ne provoke
- Ŝi luktis vane kontraŭ la disvastigo de la propra kvanto
- Ŝtele ŝi deviŝis unu larmon el la okulo
- Ŝi eldevigis la promeson per la senĉesa ripetado

- Ŝi havis liplekan apetiton pri
- Li invitis ŝin kaj ŝi tuj foralis tien
- Ŝia tuta esto radiis purecon
- Ŝi estis tiu kiu kuraĝis diri ke la reĝo procesias en sia pompa nenio
- Kisdistance ŝi retiriĝis
- Ŝi moke forgrimacis la konsilon
- Ŝia figuro estis sangosprona, li sentis tion nervokoste
- Liaj okuloj trotis post ŝi
- Ŝvelpufiĝis la knabinaj jupoj
- Ŝi kun la kaveto en la vango
- Oni ŝin trudedzingis al
- Ĝuu ĝis satiĝo vian kuŝon
- Li tradraŝis la edzinon
- Virina harmodo
- Ŝi estis malseka kiel lutro
- Ŝi ĵetis la brakojn ĉirkaŭ lian kolon.
- Ŝia punta mamzono

Ŝi haltis iomete ĉe la vorto mamzono. Ĉu enmeti tiel? Estis la jaro 1934, la rozkolorajn mamzonojn oni butonumis dorse per du perlamotaj butonoj. Oni enmetu! Josephine Baker* dancos venotmonate la unuan fojon en Zagrebo en sia robeto el bananoj.

Menstruo. Ŝi haltis kaj serĉis la frazon por eltiri la vorton el la vortaro. Nenio venis en la kapon. *Menstruo* seninspire kuŝis apud la *mensogo* en la vortaro.

Zlata senmove rigardis la esprimojn. Ili ŝajnis kiel kornoj el sako kaj ne volis ordiĝi. Kiel trovi formulon por vicigi ilin? Kiun esprimon enlasi en la kaĝon de la libro?

Silento. La nokta papilio sur la ekstera vitro brue sopiris al la lumo.

Zlata formetis la paperojn kaj malfermis tirkeston de la skribotablo. Ŝi rigardis momenton en grandformatajn striitajn foliojn plenigitaj per nigra inko. Sube de la papero la impostmarko de du kronoj sur kiu la hungara reĝo St.

Istvan sur la ĉevalo. El la ĉevalharoj sur kiujn la hungara reĝo apogis sian manon, elstaras la hungara kruco kaj la dato la 17a de novembro 1915.

Tabelo de grandaj provincaj posedaĵoj

Peš'eno, ĉefdomo, helpkostruaĵoj en la korto kaj ĝardeno, puto, herbejo, fruktejo, parko arbreto, 4 paŝtejoj, konstruaĵoj, arbaroj.

En Pod Rebar domo n-ro 8, arbaro, kampo, paŝtejo, ĝardeno, fruktarbejo, paŝtejo, fojnkampo, plugkampo. En Vrbno paŝtejo, arbaro, fojnkampo vojo al Futakovina, Arbaro en Husinec, Plugkampo en Husinec, Vitejo kaj viteja domo, fojnkampo kaj muelejo, paŝtejo, fruktarbejo, domo n-ro 5, arbaro, puto, vitejo Niegus, plugkampo kaj vinbereja domo Niegus, vitejo Niegus.

La dokumento atestis ke ne ĉio apartenas al la grafino. Urbigitajn komunumojn ŝi dividis al certaj okonoj kun vilaĝaj komunumoj Kreber, Cvetko, Krivak.

Sube de la listo la subskribo de la posedantino Albertina nobl. Adrovsky, naskita baronino Unukić.

Zlata suspiris kaj remetis la dokumenton pri la posedaĵoj en la tirkeston.

Sur la fenestro la papilio ankoraŭ battremis al la lumo.

*Josphine Baker (1906-1975) franca, usondevena dancistino

LA DOTO DE SALOME

- Panjo, mi edziniĝis al Eugen lastsabate en tre eta rondo, sen multaj formalaĵoj, por ne eksciti la familion. Ĉu vi volas veni vidi la novan loĝejon? Tiel. Unuspire eldiri ĉion.
La panjo unue decidis sveni, sed tuj refortiĝis ĉar, fine, ŝi estas la pelikano kiu per sia sango nutras la idojn. Ŝi sentis ke tio okazos tuj kiam Tilla konatiĝos kun Spiro. La pentristo Eugen Spiro estas ĝuste la pentristo kiu fine de la 90-aj jaroj desegnis la portreton de la patro de Tilla D-ro Richard Godeffroy. Ovalo 29 x 21 cm.

La panjo retrovis sian energion kaj turnis sin al la ŝranko por elpreni la doton, kiun ŝi kaŝe preparadis.

Noktĉemizoj, someraj 4, unu kun floretoj, 3 blankaj kun dekoltaĵo puntita

Noktĉemizoj vintraj 3, manikoj longaj, 2 rozkoloraj, unu blua

6 banejaj tukoj teksitaj

6 fajnaj tukoj

6 malfajnaj, piedaj, linaj

24 kuirejaj lintukoj, 12 striitaj, 12 kvadrataj, blanke-blauaj

6 vintraj litotukoj, kun monogramo TD

6 someraj litotukoj, monogramo kun floretoj

arĝenta manĝilaro de la franca avino Durieux, tiu de kiu nur la nomo restis

kaj la manĝilaro en la kesto kun blua veluro

porcelano Limoges, 6 kompletoj, desegno de ĝardena rozo, kiun la panjo ricevis kiel novedzino de sia franca bopatrino Durieux

mankis 1 suptelero, rompita ĉe malpako

Ne necesas diri ke la rompo de la suptelero estis malbonaŭgura. La telero duoniĝis post la falo kaj la antaŭjuĝoj malpermesis uzi la gluaĵon por la doto. La panjo paliĝis vidinte la rompaĵon.

-Ne zorgu! Nenio malbona! - konsolis rapide Tilla.

Kompreneble ke la panjo ne povis endormiĝi tiun nokton, imagante kion fari kiam venos ses gastoj kaj oni servos supon kaj la sesa gasto ne havos la saman supteleron kiel la ceteraj ĉe la tablo.

Arĝentaj saluoj, unu paro nova, unu heredita de la avo Hrdlicka.

Damaskaj tablotukoj blankaj 6, du grandformataj por 12 personoj, kiam oni grandigos la tablon por la gastoj, enkonstruante la kromtabulon.

-Mankas nur la sabro de la avo Hrdlicka.- ridis Tilla, kiam la panjo ordonis, malpaki ĉiujn kestojn kun la doto.

Kaj tiam, la ĉefaĵo: sur la buŝtukaj ringoj la panjo jam ordonis gravuri ŝian novan monogramon TS. S por Spiro. Tilla neniam alprenis tiun nomon, sed spiris larĝe, vidinte ke la panjo, la pelikano, ĉion konjektis pri la geedziĝo kaj ne forgesis la novan monogramon.

Kiam oni edziniĝas, oni ne plu devas vespere reveni hejmen al sia panjo. Estis tute bele surmeti nokte la rozkoloran noktĉemizon kun blua

rubando, kombi la harojn per peza arĝenta broso el la familio Hrdlicka kaj direkti sin al la geedza lito. Neniu grumbloj de la panjo aŭdeblis.

La modesta loĝejo de la novgeedzoj ne havis fluantan akvon en la banejo. La vizaĝon Tilla lavis verŝante el digna porcelana kruĉo akvon al la fundo de la lavujo. Oni lavis sin korpoparton post korpoparto, frotante la korpon per lavanda sapo pakita en silkan paperon . Tilla fine de la lavado levis la arĝentan spegulon por alrigardi siajn kombitajn harojn de ĉiuj flankoj kaj elmontri la dentojn al la spegulo.

-La dentobroso ne estis heredita - malicis Tilla, dum ŝi ŝovis ĝin en skatoleton kun soda-bikarbono. Laŭdire tiu kemiaĵo helpas al dentbrilo, oni asertis de post kiam la episkopo laŭdis la rideton de la avinjo Ana. - pensis Tilla kaj aŭdis kiel Eugen ankoraŭ foje turnis la ŝlosilon en la seruro.

En Berlino tiam estis la jaro 1904. Malantaŭ Tilla jam estis teatraj sezonoj el Olomouc en Moravio (meleagroj sur la strato kiam ŝi kaj la panjo alvojaĝis el Vieno por ekloĝi.) Poste ŝi ekrolis en la teatro de Breslau kaj kun koro batanta ŝi aperis en Berlino. Ke Berlino jesis al ŝia kandidatiĝo estis sensacio, ke jesis neniu alia ol Max Reinhardt, ŝi apenaŭ kredis. Necesis rompi kontraktojn kun la alia teatro en Breslau kaj akcepti malsaton en Berlino. Nur tiom. La panjo ĉie sekvis post ŝi kun siaj akcipitraj okuloj.

Eugen Spiro, la juna pentristo, ses jarojn pli aĝa ol ŝi, kun kaprina barbeto, jam ricevadis siajn unuajn pentristajn mendojn.

Por ŝi li estis la savo de la panjo -persekutanto. Tilla jesis, sufiĉe rapide al lia propono pri geedziĝo, unuavide por saviĝi de la kontroloj de la panjo.

Eugen portis longajn kalsonojn, ili havis rubandojn por fermigi iliajn finaĵojn super la maleolo por ke la friŝa berlina aero ne enŝteliĝu ĝis lia haŭto. Tamen li havis tre malvarmajn piedojn, ne nur la unuan nokton. Tia estis ŝia memoro el 1934. En 1904, la novedzino, dum la tuta infanaĝo aŭdinta pri cikonioj kiuj disportas infanojn, post la forpreno de la blanka vualo kaj demeto de blankaj gantoj havis konfuzitajn memorojn. Premis ŝin la sento ke ŝi trompis la panjon, jam nomata la hejma pelikano, tiu kiu per la propra sango nutras siajn idojn. Tial neniel eblis lasi sin senbride al la brakoj de Eugen. Li unue devis lerni paciencon.

Ŝi, akuzita de la panjo pro libera vivo, rapide retiris la manon la unuan nokton post la geedziĝo, tuŝinte lian nudiĝintan korpon. Matene ŝi ne kuraĝis rigardi liajn okulojn.

Kaj li paciencis. Li tuŝis ŝiajn harojn kaj diris signifoplene:

-Sed nun vi estas mia edzino.

Kaj estis neniu dubo: liaj glaciaj piedoj estis multe pli tolereblaj ol glaciaj rimarkoj de ŝia panjo.

El la miela monato la plej forta memoro estis la vezikinflamo. Jam antaŭe la novgeedzoj interkonsentis, ke la vera mielmonato okazos, kiam ili finance pli bone fartos. Tiam ili krozos sur Rejno.

Matene la novgeedzoj volis regali sin per promeno en la bestĝardeno sed ŝi ne povis. Dologis ŝin la veziko, ŝi devis konstante reiri al la necesejo, ne povis stari rekte, ŝajnis al ŝi ke doloras malpli, se ŝi kaŭras.

Tilla pasigis sian mielmonaton sola en la lito kun tranĉaj doloroj, sopiranta al varmo. Eugen iris al la domastrino kaj anoncis, ke lia edzino malvarmiĝis hieraŭ kaj ŝi petas ĉu eblus prunti varmigilon.

La sinjorino signife alrigardis lin kaj diris tre klare, ke tiu problemo ne venas de promenado en bestĝardeno kaj informis ke en tiaj kazoj helpas nur varma tegolo enpakita en tukojn. La tegolon oni devas teni sur la ventro. Krome trinki teon el la planto uva.

Por Eugen tio estis novaĵoj, sed la ino imponis per sia ilaro. Ŝajne scioj de tiu speco ne mankis al ŝi. Al Tilla pli plaĉis la bandaĝita varma tegolo ol la teo, sed per la helpo de ambaŭ, ŝi feliĉe finis la mielmonaton kaj revenis al teatro, iom malforta pro la kuŝado.

Al la laboro, jen la diferenco, ŝi ne plu piediris. Trambileto estis la unua investo de Eugen por sia edzino.

Jam okazis la premiero de *Salome* kiam Tilla revenis.

La plej forta memoro el tiu epoko certe estas *Salome* de Wilde. La fama aktorino, kies prezentaĵo estis disvendita sep tagojn antaŭe, la trian tagon post la premiero, sin anoncis malsana. La reĝisoro Reinhardt* aliris Tilla en la ekzercejo dum ŝi ripetis sian etan rolon, kaj simple demandis:

- Ĉu vi eble povus hodiaŭ vespere anstataŭi Salome?

Tilla alrigardis lin senvorte. Estis ses horoj antaŭ la komenciĝo de la

teatraĵo, kiam la ĉefrolulino anoncis, ke ŝi malsaniĝis. Ŝi dum semajnoj ekzercis la dancon de Salome. Nun kun Tilla oni ekzercos la dancon dum unu horo.

-Mi povus. La tekston mi konas. - ŝi diris aŭdace al Reinhardt, sed kiam li danke eliris, kun doloro en la stomako pro la ŝanĝo en la vespera programo, ŝi sidiĝis senforte sur iun amason da kurtenoj, kiuj kuŝis tie.

-Kiel ŝi kuraĝis? De kie la aŭdaco?

Sed la piedoj devis marŝi al la loĝejo por trovi iujn taŭgajn vestojn por la rolo. Ja neniu kroma kostumo disponeblis. Iun tukon por meti ĉirkaŭ la kokson, sed kion meti sur la bruston por ne iriti la cenzuriston el la loĝio? Diademo restis el iu antaŭaj roloj, kiel bone ke oni nenion forĵetas.

Ĉion portaĉi piede ĝis la teatro por ŝpari transportmonon.

- Manĝi? Jes, matene, du bulkojn, antaŭ ol venis la granda novaĵo, ke ŝi estos la anstataŭa Salome ĉi vespere.

La publiko grumblis malkontente kiam oni anoncis la ŝanĝon en la ĉefa rolo. Sed oni ankoraŭ ne fajfis, nur grumblis. Kvazaŭ ŝi starus antaŭ glacimonto, tiom malvarmis el la malhela publikejo. Tiam leviĝis la kurteno. Ŝi staris tie sola kontraŭ la ondo de malkontento.

Post la unuaj momentoj silentiĝis la rumoro. La glacio de la publiko ĉesis elradii malvarmon, iu amika venteto ekblovis de ie, ŝi havis superecan rideton sur la lipoj. Tiu estis la vespero en kiu ŝi volis ludi. En kiu ŝi povus ludi la leonon se Reinhardt petus. Sed li petis nur Salome.

La obstina kuraĝo, kiu de ie venis, starigis ŝin antaŭ la mallumon.

La unuan fojon ŝi aŭdis tondran aplaŭdon kiu nur al ŝi rilatis. Larmoj rapidis ĝis la palpebroj. Ŝi tenis la brakojn sur la brusto ĉar malloziĝis la tukoj el kiuj ŝi konstruis la supran parton de sia kostumo. Reinhardt venis al ŝi entuziasme.

-Vi estas bonega! Vi devus ludi alterne Salome.

Revizio de la kontrakto signifis pli ol du bulkoj matene.

Hejmen ŝi revenis kun la ŝminkitaj okuloj de Salome kaj plore ĉirkaŭbrakis Eugen. Li ĝoje enverŝis bieron en ŝian glason. Ŝi soifegis. Ili kune manĝis la kolbaseton, kiun ŝi aĉetis matene, kaj kiu enpakita en paperon, atendis en vestejo ke Salome findancu. Tilla estis gaja, la gajo estis

tro granda por tiu mala ĉambro, kiu odoris je la diluilo por la sekigitaj penikoj de la edzo. Ŝi volis grimpi sur la tablon, danci kaj flugi. Eugen partoprenis ŝian ĝojon nur dum la unua glaso. Kiam la ĝojo ĉe la dua ne ĉesis, li komencis farti malkomforte. Ĉe la tria glaso li komencis froste rigardi kiel ŝi pivote turniĝas. Li ne kapablis dividi la ĝojon. Ĉu li ĵaluzis? Ne precize.

-Revizio de la kontrakto. Ĉu vi komprenas tion?- biero pelis ruĝon en ŝiajn vangojn, varmo jam makulis la senriproĉajn okulojn de Salome.

Ŝi kuŝiĝis sur la liton en ŝtrumpoj kaj robo.

La edzo metis manon sur ŝian bruston sed ŝi jam peze dormis kiel iu, kiu tutan tagon portis brikojn por konstruado de Babilono. Eugen ne povis kredi ke iu estas tiom laca kaj dormas vestita, kun ŝtrumpoj.

Ŝi vekigis post du horoj kaj kun konsterno vidis la ofenditan Eugen en piĝamo apud ŝi. Nur kiam ŝi forlavis la ŝminkon el la okuloj de Salome, ŝi deprenis la ŝtrumpojn kaj delikate lavis ilin. La ŝtrumpoj eltenu ĝis venos la mono el la reviziota kontrakto. Ili estis ŝiaj lastaj.

Kiam la fama aktorino resaniĝis, kaj revenis al teatro por repreni la rolon de Salome, ŝi pretis murdi Tilla, sed jam estis pendigita la horaro por la venonta monato: Tilla Durieux ĉiun duan vesperon, en la rolo de Salome.

Post la malvarmaj piedoj de Eugen, post Salome, la plej granda evento en ŝia geedzeco estis Liebermann.**

*Max Reinhardt (1873- 1943) aŭstra reĝisoro

** Max Liebermann (1847-1935) germana pentristo

LA KAPO SUR LA DIVANO

Tilla ridetis al Lutz post kiam li anoncis ke ili rajtos je nur kvin cigaredojn tage ekde nun.

-Ni sukcesos!

Li rigardis ŝian memfidon. Ŝia mentono estis obstine levita, kiel de ŝia busto de Hermann Haller en la Zurika Galerio.

Li vidis tiun memfidon en la hejmo de Tilla kaj Paul en Viktoria-Strato, kie sur verdetaĵaj muroj pendis jam tiom da *van Goghojaĵoj** kaj *Manetaĵoj*** kune kun la fama *Arles-anino* de van Gogh. Tie la memfido konvenis. Sed nun post la konstanto, ke la sesa cigaredo tage ne plu estos permasata pro ŝparado, ĝi ŝajnis al li falsa.

Sed la memfido nestis en ŝi. Tilla Durieux nepre estis la plej multe pentrata virino de la dudekaj jaroj.

Slevogt desegnis ŝian vizaĝon, kun rubando en la hararo. Salome.

Poste

faros Kokoschka***. Memfida virino kun disaj okuloj, abunda hararo, iom furiozaspekta, kiel la ekspresionismo postulis. Ŝia edzo mendis la portreton ĉe Kokoschka. Corinth****, Purrmann, van Kardorf, Gulbransson,***** Max Oppenheimer, Orlik*****. Orlik, la delikatajn liniojn, la nazeton obstine supren, la manoj muzikas super la klavaro de la kanto *Haenschen klein*.

Skulptis ŝin Hugo Lederer kaj Hermann Haller. Hermann Haller tiun kapon kun la obstina mentono turnita iom tro supren, ŝi ja sciis kion ŝi volas, kaj li komprenigis tion. Portretis ŝin Renoir.

Estas ŝi kiu diktis la modon ĉe la berlinaj sinjorinoj tuj post kiam oni eldonis ŝiajn bildkartojn. Fakte, Ernst Barlach***** la unua skulptis ŝian kapon, ĉu tio estis 1912? La kapo kun haroj binditaj ĉe la dorso en la gipsa kaj la argila teknikoj restis post la ekspozicio ĉe ŝi. Vere ŝi estis emociita kiam ŝi en la jaro 1917 vidis sian kapon skulptitan kaj lumigitan en la ekspozicisalono. Estas alia sento ol vidi sin en la spegulo.

Ne, Barlach ne estis la unua, unua estis Karl Liebermann, kiu pentris ŝin.

Ne, la tute unua estis ŝia edzo, tiam nur amiko, Eugen Spiro, dum ilia restado en Provenco, antaŭ la geedziĝo. Sed tio estis, nu, familia laboro. La unua serioza pozado okazis al Liebermann. Kiam Liebermann venis iun tagon al ilia loĝejo, la servistino alportis lian vizitkarton, Tilla rigardis Eugen, kiu ion legis el la posttagmeza ĵurnalo. Tilla prononcis la nomon de la fama pentristo presitan

per maldikaj orlitteroj sur la vizitkarto. Eugen saltis kiel pikita, li kredis, ke la granda majstro venis trakti kun li, la pentristo. Sed surprize, la nobla artisto, kiu iom strangete rigardis ilian modestan ĉambron, esprimis la peton al Tilla. Ĉu ŝi emus pozi al li? Li serĉas *kapon por Dalila****?

Tilla ne povis spiri pro surprizo, ŝi ja kredis ke Liebermann venis pro Eugen kaj jam desegnis enmense la edzan svingon en la kariero, sed jen, pozi, doni sian kapon. Ŝi ne ŝatis la ideon. Post Provenco, ŝi memoras laciĝon, kiam ŝi pozis al Eugen, senmova dum horoj. Sed kiel rifuzi la grandan artiston? Diri ne al Liebermann? Ne eblas. Hieraŭ ŝi admiris iun lian pentraĵon en katalogo, sinjorino sur benko en parko, sunlumo sur ŝia ĉapelo. Nun Eugen okule stimulis ŝin, li esperis bonajn rilatojn por sia propra pentrokariero kaj senvorte petis ke Tilla komplezu, malgraŭ ŝia malsimpatio. Ŝi pozu!

Ŝi sentis la peton de la edzo sur sia vizaĝo kaj ne rifuzis la proponon de la

penstristo. Juna ŝi estis, scivola pri lia ateliero, sankta Dio, kiel aspektis ĉe li en la Strato Pariza apud Brandenburg - Pordego. Kaŭri ĉe iu divano en la ateliero de Liebermann, kuŝi senmova en la kostumo kiun li elektos, kaj lasi la pensojn ŝvebi.

Tiu pozado apartenis al humiligaj momentoj de ŝia vivo. La granda pentristo babilis dum li pentris. Plaĉis al li klaĉi pri la edzo de Tilla, dum ŝia kapo de la divano rigardis la pentraĵojn sur la muro. La famaj *Asparagoj* de Manet videblis tra ŝiaj palpebroj. Kiom da impresionismaĵoj sur la muro, tiom da arĝentaĵo sur la matenmanĝa tablo. Ankaŭ la sinjorinon Liebermann ŝi renkontis kelkfoje. Lia pentrista gusto antaŭiris laŭ la francaj impulsoj. Tablogusto postrestis en la klasika tono. Aŭ ĉu la sinjorino diktis la tablodekoraĵojn el la peza arĝento? La sinjorino humiligis Tilla jam per la unua alrigardo. Kvazaŭ Tilla estus kruĉo por la peonioj, kiujn desegnos ŝia edzo.

La etoso de la matenmanĝo estis terura, sed ĝi ne povis forigi belecon de la matenmanĝa tablo. Plaĉis al ŝi la kombino de beleco, abundo kaj rafineco. Ŝi sciis ke baldaŭ finiĝos la glaciaj rigardoj de sinjorino Liebermann.

Kiam Liebermann findeseĝnis la kapon de Dalila, Tilla sentis la senpezigon. Li por ŝia honorario donacis iun sian etan pentraĵon kiun ŝi portis hejmen.

Al Eugen, ŝi pensis malice, post la malflataj opinioj pri ŝia edzo eldiritaj de la pentristo.

-Vidu, kara! Aŭtentika Liebermann, pagita per mia kapo sur la divano.

Eugen iris serĉi martelon sed revenis kun pesilo, per kiu li decidis frapi la

najlon. Kie pendigi ĝin? Ili gaje portis la etan pentraĵon de muro al muro por vidi, kie ĝi plej belos. Kie la sunlumo plej agrable elstarigus ĝin de la fono de la muro kaj ne vundus ĝin? Kie la pentraĵo plej rapide forgesigos, kiom koste ŝi estis ricevita.

Sed fakte, tiu ricevita Liebermann tuj alvokis aliajn pentraĵojn kaj komenciĝis naskiĝi tre rafinita pentraĵkolekto. Ĉu la pentraĵoj venis ĉar ŝi aŭdacis lasi la provincon Breslau kaj alvenis en la kernan kernon de la artistaj deziroj – Berlino?

Kun Liebermann sur la muro, Breslau ŝajnis kuŝi malantaŭ multaj jaroj

jam. Ŝi ŝatis la malnovan urbodomon de Breslau el la 13a jarcento, ornamaĵojn

sub la tegmento, la ŝipojn kiuj matene karboŝarĝitaj fordirektiĝis el Slezio. Ŝi ne rajtis tro longe resti ĉe la bordo de Oder, ŝia panjo jam grumblis.

La panjo grumblis seninterrompe kontraŭ Tilla, konservinte tiun grumblokutimon el la tempo de Vieno, kiam ŝi kreadis pianistinon el Tilla. Por forpeli ŝian lecionan torturon, Tilla preferis enmense sur la klavaro organizi promenadon de nanoj. Nanoj ĉiam helpis. Ĉiu nano estis aliel ŝarĝita, ĉiu portis alian korbon kaj en ĝi ion, verŝajne, oni ne bone povis vidi, de ŝia loko, ĉar la korbo estis kovrita per ruĝkvadrata tolo. Foje la nanoj komencis kuri. Pli rapide, la korboj tiritaj apud ili, flugis bone kovritaj por ke Tilla ne vidu, kio enestas.

Poste la panjo decidis forgesigi la vangofrapon pro la decido ke

Tilla fariĝu aktorino. Ŝi neniam precize cedis, sed lasis permesi la ideon, ke oni elprovu unu sezonon en la provinco. La panjo akompanos. Ŝi kudros kostumojn. Ŝi glados. Ŝi estos tajloro de Tilla. Ŝi kuiros varmajn ajlosupojn nokte por restarigi ŝian voĉon ĝis matene. Kaj tutan tempon ŝi ripetos, ke ŝi estas la viktimo, la pelikano, kiu nutras la idojn per sia propra sango. La grumbloj ĉiam ripetiĝis

- Kaj tiuj falbaloj por *Kabale und Liebe* kostis kiel unu bona matraco el

ĉevalharoj. Kaj la blonda peruko de la markizino kostis kiel bona kovrilo el la anserlanugoj, kian eblis mendi sur la ĉefplaco ĉe sinjorino Taubowska.

Ĉiuj panjoj por knabinoj el bonaj familioj preparas la doton. Patoj kun kavetoj por baki ovojn, viandmaŝinoj por mueli porkaĵon kaj bovaĵon, nuksomuelilo, brilaj arĝentaj manĝiloj kun knabinmonogramoj, glasoj kun ĉizitaj anĝeloj, kiuj lavas piedojn, trempante ilin ĝis genuo en blanka vino. La panjo vidis belegan porcelanan servicon en la montrofenestro, sed ne eblas, nun oni devas unue aĉeti fajne kroĉetitajn blankajn gantojn por tiu rolo ankoraŭ.

La panjo dum jaroj postsekvis Tilla klopodante kapti ŝin *in flagranti* *****en iu granda amskandalo. Ĉiu viro estis suspektinda. Eĉ la kapitanoj de la ŝipoj kiuj forportis karbon el la haveno al kiu Tilla rigardis tiun posttagmezon. Al la ŝipo, ne al la kapitano, sed panjo havis alian opinion.

Kiam Eugen aperis, tio estis simple savo. Ja li nomiĝis spiro. Ŝi ekspiris

dum ili du, per la helpo de la amikino Klara, komplotis kontraŭ la panjo kaj planis la geedziĝon.

Ĉu estos tiel simple fuĝi de la drako?

Klara helpis plani, ŝi organizis ĉion, kaj puŝis Tilla simple sciigi la panjon, ke la geedziĝo okazis. La inkubo pri tiu diro cirkle ripetiĝis.

Tilla preparis sin ke la panjo unue volos sveni. Estis tiel, ŝi kaptadis la aeron per stranga sono, tio daŭris certan tempon. Tilla alproksimiĝis kun la akvoglaso en la mano, sed ne necesis, la panjo jam sidiĝis por organizi la doton, ĉar ŝi estis la pelikano, kiu ĉiam estis en la servo de la filino.

Nun el la vidpunkto de 1934, post la informo de Lutz ke ili rajtas al nur kvin cigaredoj tage, Spiro ŝajnis tiom pale malproksima kiel la viena pianleciono kun la nanoj kurantaj kun plektitaj korboj.

Vincent van Gogh* (1853-1890) nederlanda-franca pentristo

Edouard Manet** (1832-1883) franca pentristo

Dalila*** knabino el Biblia rakonto, danĝera delogulino, kiu fortranĉis la harojn de Samson kaj pereigis lin

Oskar Kokoscka**** (1887-) aŭstra pentristo kaj verkisto

Levis Corinth ***** (1858-1925) germana pentristo kaj grafikisto

Olaf Gulbransson***** (1873-1956) norvega desegnisto kaj pentristo

Emil Orlik *****1870-1932) germana ĉeĥdevena pentristo

Ernst Barlach***** (1870-1938) germana skulptisto, grafikisto kaj verkisto

in flagranti *****latine: *kaptita ĉe freŝa faro*

LA VESPERO DE LA ROZKOLORA BLUZO

Berlino, 52 gradoj de la norda latitudo, 13 gradoj de la orienta longitudo, 20

grandaj stacidomoj, 121 trajnoj al antaŭurboj, 14 urbaj fervojoj, 27 rondlinioj - legis Zlata.

Tilla trikis lanan ŝtrumpon per kvin trikiloj kiuj tintis. La kato Mici sidis en ŝia sino, en la sino de la granda germana heroino, carino, kokoto, martirino kaj klaŭno kaj tie per sia dekstra piedo glatigis siajn lipharojn. Nek Tilla nek Mici komentis kaj Zlata daŭrigis. Lutz hieraŭ forveturis al Opatija por trakti kun sia nova partnero pri aŭtobusa fabriko. Li estis konvinkita ke tia lando, li iom hezitis ĉu diri povra aŭ malriĉa, unue bezonos aŭtobusojn por organizi sian enlandan transporton kaj ke akcioj de la aŭtobusa kompanio estas la plej bona investo. La busoj en 1934 havis komforton kaj aspekton de montgrimpaj ŝuoj. Malantaŭ ili svingiĝis nigra fumo kvazaŭ ili fuĝus el infero.

Nokte pluvis, la ĝardeno odoris je ozono, la ĉielo estis pura post kiam la noktaj fulmotondroj forskrapis de ĝi nubojn.

-En Berlino en la jaro 1927 mortis 48 742 personoj, sen mortnaskitoj.- legis Zlata. 4570 mortis pro ftizo, 6443 pro kancero, 5656 pro kormalsanoj, 4816 pro la malsano de sangvojoj, 5140 pro apopleksio, 2419 pro pulmoinflamo, 941 pro kokluso, 562 infanoj mortis de diferio kaj 123 de skarlateno, 93 pro morbiloj. Entute mortis 3640 suĉinfanoj. En Berlino en 1927 naskiĝis 42 696 homoj.

-Pri la memmortigoj diras via artikolo nenion.- subite tranĉis Tilla.

Zlata pardonpetis. Ŝi legis pri Berlino ĉar ŝi volis surprizi Tilla pri informoj, la teksto entiris ŝin senpripense, ŝi ne konjektis, ke la pensmeandroj de Tilla sen zigzagoj tuj direktiĝos al la morto de Paul.

Tilla formetis la trikaĵon kaj kaptis Mici. Ĝi pendis sekunderon tiel kiel lernilo kiam Tilla instruas piediradon al la animigantoj de pupoj. Tilla alten levis sian brakon kaj ŝia irado movis la pupon. La pupo staris sur tri fingroj de ŝia mano, la pupvesto kaŝis ŝian brakon ĝis la kubuto. La pupvestoj estis kudritaj el la robo de Tilla, tiu por la Nova jaro 1926, la lasta kun Paul. La studentoj entuziasme gapis al la brako de Tilla. Ŝi marŝis kiel feino, kiel maljunulo, kiel ebriulo. La pupo supre sur ŝiaj fingroj imitis ĉiujn ŝiajn irmovojn. Fascine.

Mici sciis ke hodiaŭ ne estas dimanĉo, studentoj mankis, ia mishumuro estis en la aero. Ĝi rapide kaptis sian kvarpiedan pozicion kaj elegante foralis al la ĝardeno.

Tilla rigardis al la kalendaro kaj melankolie konstatis, ke estas la datreveno de ŝia renkontiĝo kun Paul. Estis la jaro 1908. Post la sukcesa prunto de la kapo al Salome de la pentristo Liebermann, Tilla ricevis inviton al pentrista renkontiĝo. Verŝajne Liebermann sendis la invitilon, pro ĝentileco. Por Tilla tiaj invitoj ĉiam estis mornaj momentoj ĉar ŝi havis neniun festan robon por vesti. La sola festa bluzo jam havis iom travideblajn kubutlokojn kaj ŝi decidis preni pli novan, kiun ŝi neniam portis. La elektita bluzo estis iu rozkoloraĵo, la naskiĝtaga donaco de la panjo. La panjo ŝatis la farbojn kiuj bolis kaj ankaŭ tiu rozkoloro estis speco de frambokrema nuanco, kiu akre dolorigis la okulojn.

Ŝia edzo Eugen petegis ŝin kuniri al la renkontiĝo de pentristoj, ĉiam kiam montriĝis ebleco. Li komprenis ke tio povus esti unu el la turnoj en lia

pentrista kariero. Tilla akceptis sen entuziasmo, tiel kiel ŝi akceptis pozi al Liebermann. Ŝi senvorte eltenis la terurajn matenmanĝojn ĉe Liebermann kiam lia edzino traktis ŝin kiel pecon de gipsa modelo. Tilla trinketis teon kaj admiris la belaĵojn sur la matenmanĝa tablo de la geedzoj Liebermann. Ŝi sentis kiom lukso dorlotas ŝian gustsencon. Ŝi ŝatus servi similmaniere matenmanĝojn, sed ŝi kaj Eugen vivas tre modeste.

Sur la ŝtuparo, jam proksime al la vilao, kie okazu la akcepto, ŝia mano apogis sin al tiu de Eugen. La juna paro eniris la domon. Ŝi aŭdis laŭtajn paŝojn malantaŭ si. Tiu sinjoro kiu tiom memfide ridis malantaŭ ŝia dorso post kelkaj minutoj estas prezentota al ŝi kiel Paul Cassirer. Ŝi konis la nomon de la fama pentraĵvendisto nur supraĵe. Ke li estas adoranto de la franca impresionismo, artmeceno kaj arthistoriisto, kiu revoluciigas la berlinan pentroguston kaj ne malpli fama eldonisto, tion ŝi eksciis nur tiun vesperon. Montriĝis ke al li apartenas la pentraĵvendejo en Viktoriastrato pri kies ĉiu najlo sopiras junaj pentristoj. Sufiĉis alrigardi la vizaĝon de Eugen kaj kompreni ke ekspozicii ĉe Cassirer signifis havi rekonon de la plej severa aŭtoritato. Eugen ĝentile premis la brakon de Tilla. Tiu premo signifis helpokrion, peton ne turni al la aŭtoritato la dorson.

En la fluo de la vespero ŝi ricevis sidlokon ĝuste apud la fama aŭtoritatulo, kiu primokis ĉion kio venis en la fokuson de lia parolo. Kaj subite enfokusiĝis la rozkolora farbo de la bluzo de Tilla. Ĝuste tiu bluzo kiu dum monatoj kuŝis en la ŝranko ĉar Tilla malŝategis ĝin, kaj nur ĉi vespere vestis ĝin por ne elmontri la kubuttruojn de la festa blanka bluzo. La sinjoro artkritikisto bonvolis aludi al la koloro de ŝia gusto. Ridetoj. Ŝi leone ekdefendis sin. Nepetite ŝi defendis ankaŭ la guston de la edzo.

-Ne pensu, estimata sinjoro, ke tio estas mia gusto. Mi kaj mia edzo simple ne havas monon aĉeti la aĵojn kiuj plaĉas al ni laŭ nia gusto kaj ni montras almenaŭ estimon al la aĵoj donacitaj.

Ŝiaj vangoj ruĝiĝis pro fervoro de defendado.

Sinjoro Cassirer, kiun malmultaj aŭdis pardonpeti, senkulpiĝis kaj silentiĝis, humiligita. Lia rigardo evitis ŝin. La knabo ricevis la lecionon. La riproĉo trafis lin profunde.

Ŝi batalis tiun vesperon por la edzo Eugen sed neniam pli frue kiel tiun vesperon ŝi vidis, ke li sidas ĉi tie, malgranda kaj sensignifa kopianto. Kaj dum ŝi aŭskultis kiel memfide la sinjoro artkrikisto parolis kaj defendis siajn starpunktojn pri la pentraĵoj, ŝi sentis jam ke la ĉeffluo de la arto ektiris ŝin kaj ke Eugen restis je la alia flanko de la riverbordo.

Eugen ne povis kompreni kio okazas. Li ne konjektis, ke ŝin ravis la viro kiu ŝin ofendis.

Ŝi staris kun Eugen en la alia ĉambro de la salono, sed kiam Cassirer rigardis en ŝian direkton, ŝi sentis, ke la kunkudraĵoj de ŝiaj ŝtrumpoj kurbiĝas de lia rigardo.

Li estis la reĝo de la vespero. Liaj kritikoj estis nerifuteblaj, liaj ŝercoj la plej trafaj, ne ekzistis temo pri kiu li ne kapablus suverene diskuti.

Ŝi sopiris iri hejmen kaj formeti la damnan rozkoloran bluzon sed ŝi ne volas ke finiĝu tiu vespero, en kiu ŝi aŭdis tiom da interesaj aferoj. Neniam en la vivo ŝi spertis ion similan, tiun kirliĝon de artaj temoj kies konsistiga parto ŝi fariĝis.

Kaj kiam ŝi kaj la edzo adiaŭis kaj revenis al ilia ĉambreto, estis tiel stulte rigardi Eugen hejme. Li trempis sian maldekstran piedon en iun tinkturaĵon por kuraci siajn ungfungojn. Tilla ankoraŭ ŝvebis en la aero kaj ne povis reveni al la piedfungoj.

Eugen rimarkis nenion, ensorbita de sia fungoakvo.

Tilla, en la lito apud Eugen repensis la vesperon. Ŝi tuj konsciis ke ŝi neniam plu rajtas vidi Cassirer. Li altiris per energio al kiu ŝi havis nenion por kontraŭmeti. Feliĉe Deutsches Theater ĝuste tiam uzis ŝian plenan energion. Max Reinhardt havis multajn spritajn laborideojn, kiuj okupis ŝin tuttage.

Sed nokte dum Eugen drivis sur la etaj ondoj de ronkado, revenis la memoro pri la sinjoreska Paul Cassirer, pri kiu kontraŭvole kolektiĝis la informoj: elkreskis en riĉa familio, studis en Munkeno, edziĝis en Berlino, eksedzo, lia filo Peter loĝis ĉe lia edzino, ĉe li estis la filino Suse. Ne malproskime de la Potsdammer Platz estis lia artsalono. Li fifamiĝis de post la jaro 1901, ĉar li estis la unua kiu ekspoziciis la francajn impresionistojn en Germanio. Pro la ekspozicio de Cezanne* reagis la reĝo Vilhelmo la Dua, kun komento, *ke tiu P.C. klopodas enporti francan fiarton al Germanio*. La

organizanto de la unua ekspozicio de Cezanne en Germanio petis iun bankistedzinon aĉeti pentraĵon, nur por povi pendigi la ŝildeton *vendita* en la salonon. La bankistedzino akceptis la proponon. Ŝi iom rigardis la pentraĵojn kaj elektis sen longa hezitado.

La unua pentraĵo de Cezanne kiu restis en Germanio estis florbukedo por la bankista sinjorino kiu pagis 250 markojn.

Tilla kontraŭvole aŭdis multajn informojn pri li. Ke la du fratoj Cassirer posedis kablofabrikojn, la plej aĝa frato estis specialisto pri nervmalsanoj, kuzo kunestris la eldonejon kun Paul, la alia kuzo estis filozofo.

Cassirer apartenis al artdirekto de secesistoj, al tiu kiuj *turnis sin kontraŭ kiĉo de la oficiala arto*, kiel ili ŝatis ripete ekspliki sian ribelon. Li blovigis la novan venton en la berlinan pentristan guston.

Alvenis invitilo por la balo de la secesio. Tilla instinke sciis kiu invitas la geedzojn Spiro. Ŝi kudrigis sian unuan balrobon. Eugen havis la taskon ŝnuri la rubandojn sur la dorso de la balrobo.

Belaj damoj, spritaj kostumoj, la artistoj ornamis la murojn de la salono per siaj originalaj desegnoj. Tilla enmarŝis kuraĝe, konscia, ke ŝi ne plu surhavas la rozkoloran bluzon de la panjo. Ŝi portis la balrobon laŭ la propra gusto.

Paul Cassirer venis saluti ŝin kaj la edzon. Li kapablis baldaŭ forigi ĉiujn el ilia societo. Ankaŭ ŝian edzon. Tilla kaj Paul Cassirer restis solaj salonmeze. Li havis kelkajn proponojn por ŝi. En la jaro 1907 kiam decis malmulte, Tilla pretis el la secesia balsalono en la nova balrobo tuj foriri kun Paul.

Antaŭ noktomezo Eugen reaperis por demandi ĉu ŝi pretas iri hejmen. Kapklinoj. Ridetoj.

Hejme la realo. Ŝi ne rajtas tion fari. Ŝi promesis ke ŝi vizitos la artsalonon de Paul, ŝi ne iru. Ŝi promesis ke ŝi promenos kun li. Ŝi ne promenu. Neniun promeson kiun ŝi donis al Paul ŝi rajtas teni.

Ŝi eltenis tri tagojn. Tiam alvenis la invitilo al la eldonisto Samuel Fischer. Eniri la domon de la granda eldonisto povis nur tiu kiu havis nomon. Eugen ĝin ne havis. Havis ĝin Tilla. La ĉefstelo de la vespero estis la verkisto Gerhardt Hauptmann**.

Eugen brilis ĉar li rajtis ĉeesti. Tilla hazarde ricevis lokon ĉe la tablo apud sinjoro Cassirer. Ŝia brako apenaŭ leviĝis. Ĝi ŝatis esti proksime de lia kubuto. Ŝia robo estis je spiratingo de li.

Paul demandis al Eugen ĉu li ne ŝatus foje alvenigi la sinjorinon al lia artsalono. Eugen danke akceptis. Li jam vidis turniĝon en sia kariero. La turniĝon faris Tilla, ne li.

Kelajn tagojn poste ŝi diris al sia edzo la veron. Li ne volis aŭdi. Mizero de la konfeso. Li pruntis monon por sendi ŝin al trankvila sanatorio por pripensi la situacion. Ŝia ĉefo Max Reinhardt donis al ŝi forpermeson de la teatro, timigita per ŝia malbona aspekto.

Eugen engaĝis sian amikinin Klara por akompani Tilla al sanatorio. Klara ploris kiam ŝi parolis kun la kuracisto. Tilla obstine silentis.

Ŝi fuĝis de tie du tagojn poste kiam ŝi komprenis kiel funkcias la trajnoj al Berlino. Ĉapelon kaj gantojn ŝi metis sur la tablo, valizon en la ŝranko. Kvazaŭ ŝi estus proksime. La trajno kun ŝi jam rapidis al Berlino.

La hotela pordisto, antaŭ kiu ŝi aperis je la sesa, sen ĉapelo, etendis al ŝi la ŝlosilon de la ĉambro, rigardante ŝin de la kapo ĝis la piedo. Li donis al ŝi la ŝlosilon kaj laŭ la aspekto de la ĉambreto ŝi komprenis kion li opiniis pri ŝi. La stratdamo iom heziteme kuŝiĝis, kovris sin per mantelo kaj dormis ĝis la naŭa kaj tiam rigardis kiel moviĝis la montrilo de la horloĝo. Al la elegantviva Paul oni povas telefoni nur je la deca horo.

Li persone levis la aŭskultilon en la galerio. Li jam sciis ke Tilla malaperis el Berlino.

Oni en Berlino parolis pri ŝia malsano.

-Kie? En la hotelo *Ruĝa falko*?

La pordisto ricevis grandan trinkmonon por ellasi Tilla al la nova vivo.

La

advokato aranĝis rapidan divorcon de Eugen. En la teatro vespere Max rimarkis ke ŝi ne plu tudas. Ŝi ŝnuris siajn ŝuojn por la scenejo, kvazaŭ okazus nenio. Okazis. Paul elradike ŝanĝis ŝian vivon. La sian same.

Ilia unua feriado en Nederlando, dometo kun blankaj dometoj en dunoj apartenis al Paul. Vizitoj al la pentraĵoj de Rubens*** kaj Frans Hals****. La plej elokventa arthistoriisto, pri kiu Germanio disponis, tenis ŝian manon.

Kurso pri rajdado. Damstilo. Plendi ŝi ne rajtis, ĉar li maldungus la instruistinojn.

Nokte li legis al ŝi el la rusa literaturo, el Tolstoj kaj Dostojevski.

-Tilla, lerni, tio plej gravas.

Mevoj sub la fenestroj.

*Paul Cezanne (1839-1906) franca pentristo

** Gerhardt Hauptmann (1858-1921) germana verkisto,
Nobelpremiito pri literaturo 1912

*** Peter Paul Rubens (1577-1640) flandra pentristo

**** Frans Hals (1580-1666) nederlanda pentristo

ÊE RENOIR, JULIO 1914

Ŝi ne plu memoras kiel venis la ideo, ke Paul petu Renoir* fari ŝian portreton. Iom aŭdaca penso, sed havinte ĝis 1914 jam tiom da desegnoj de ŝiaj okuloj sur la muro kaj negocinte tiom ofte kun parizanoj, iun tagon Paul simple revenis hejmen

kaj diris al ŝi

- Dragiĉka!

Tiun slavan vorton Tilla foje diris al li klarigante, ke ĉe ŝia avo oni per ĝi anoncis iun bonan novaĵon.

- Diru dragiĉka!

-Dragiĉka!

- Renoir jesis.

Ŝia mano flugis al la buŝo, nekredante.

- Renoir volas vidi vin en julio en sia ateliero Boulevard Rochechouard!

Paul ŝatis alporti bonajn novaĵojn kaj dum ilia anonco mieni kvazaŭ temus pri nenio. En Tilla slave kirliĝis la ĝojo.

Tilla komencis saltadi pro feliĉo, faldinte la pojnajn ĉe la vangoj. Estis malfacile kredi, ke tiom facile plenumiĝos tiu deziro. Ĉu vere ŝi sidos antaŭ li? Ĉu povus esti, ke ŝi estos unu el tiuj rozkarnaj vivplenaj virinoj el lia peniko? Ŝi ĉirkaŭbrakis rapide Paul kaj daŭrigis danci ĉirkaŭ la tablo. Ĉe ĉiu rondo ĉirkaŭ la tablo ŝi revenis por karesi lin.

- Ĉu vi kredas? Sen vi tio ne eblus!

Ŝia entuziasmo forigis la ŝajnigitan flegmon de Paul. Sed li tuj avertis Tilla, ke Renoir jam estas tre malforta, la flegistino per rubando jam regule ligas lian penikon al la mano, ke ĝi ne elfalu. Sed Renoir daŭre laboras, eble ne plu tiom ofte li portretas.

En julio 1914 ŝi jam kvar jarojn estis la edzino de Paul, ili aranĝis plene sian loĝejon en Viktoriastr. La negocoj bone prosperis, lia ekspoziciejo, lia eldonejo, lia antikvaĵejo glate funkciis. Malmultaj havis lian scion kaj lian lerton. Liaj unuaj eŭropaj beninaĵoj malkovritaj ĉe iu antikvaĵisto en Frankfurto, ankoraŭ ne estis estimataj, sed li ne plu devis telefoni al konataj

bankistedzinoj por peti aĉeti iun francan pentraĵeton por helpi ĉe la aŭkcio de nekonataj novaj parizaj artistoj. La edzinoj kapablis jam mem elekti sian florvazon, sen lia stimulo kontribui al la bonhavo de la franca artisto post la pentraĵelmontro en Berlino.

- Tilla, planu vian venontan iron al Parizo ne nur por aĉeti vesperajn robojn.

Tiu pikaĵo kiun li aldonis, celis kompreneble ŝian lastan robon, kiun ŝi portis en *Pygmalion*. Ŝi jam pretigis por pozado la blankan jupon en sia valizo, tiun faman

de Poiret** sur kies flankoj pendis malhelaj brokataĵoj en kiun estis enteksitaj violkoloraj lilioj. Paul sciis, ke ŝi ne nur ŝatis la aspekton de ĝi sed ankaŭ la fakton ke ĝi portis la markon de la fama *Poiret*. El la vendejo ŝi rapidis al ilia hotelo por senspire vesti ĝin kaj montris sin al li.

-Kun aliaj ŝuoj, ne malbone - li komentis ŝian aspekton.

-Kompreneble, la aliaj ŝuoj!

Al Parizo ŝoforo transportis ilin en ilia aŭto. La robo de Poiret estis enpakita apud ŝi. Ŝia koro batis forte tuj post la eksido.

Paul ŝategis mem ŝofori, sed dum la vojaĝo atakis lin mishumoroj, li konstante grumblis kontraŭ ĉio. Poste li silentis, obstine silentis ĝis ili estis en la strato de Renoir.

-Vi devos peti grandformatan portreton, ne akceptu malgrandan.- ordonis li subite.

Ŝi alrigardis Paul. Li traktis kun la pentristo, do, ne la modelo, diktu la dimensiojn de la linaĵo. La majstro faru laŭ sia plaĉo.

- Mi petos nenion. Li mem decidu.

Paul ne toleris malobeon. Kolere li tiris la sonorilon.

Modestaspekta servantino nur duone malfermis la pordon.

Tilla imagis vidi la luksan atelieron kian ŝi konis kiam ŝi pozis por Dalila al Liebermann, sed ĉi tie, de la traboj modeste pendis araneaĵoj. Nur sur la muroj brilis liaj pentraĵoj. Aro da ili, diversformataj, precipe virinaj, kun

malstreĉitaj esprimoj kaj vivĝojo. Veninte de la ekstera mondo, Tilla ankoraŭ sentis streĉon en si.

La helpantino gvidis ilin en la atelieron. Etformata linaĵo jam staris sur la longkruraj desegnoj, atendante la peniktuŝon. La kruroj de la desegntabulo estis pezliga, kvazaŭ de pendigilo. Ne estas facile movi tiun ilon.

Tilla rigardis ĉirkaŭen. Sur breto artlibroj, turnebla seĝo, kaj la dua kun plektita sidilo, larĝaj bretoj sur la planko. Mildigis la vidon nur la molaj faltoj de la diketaj sinjorinoj, kiuj pendis kadrigitaj sur la muro. En la kvadrata spegulo videblis la portreto de la sinjorino kun plumĉapelo.

Paul tuj levis la brovojn en la direkto de la malgrandformata linaĵo kaj okulsignis al Tilla, ke ŝi devus esti ne uzota. Lia mieno insisitis pri pli granda tolaĵo. Sed la helpantino jam alvenis, ŝovante en la rulseĝo la grandan artiston, maldikvizaĝan kiel post pulmmalsano. Renoir havis la fingrojn antaŭ la buŝo, penseme. La ŝtofa ĉapeto sur la kapo donis al li aspekton kvazaŭ li planus forpromeni kaj ne pentri. Grandaj antaŭaj radoj de la rulseĝo knaris, etaj malantaŭe obee sekvis, la helpantino post la saluto senvorte fiksitis la kolortabulon en lian maldekstran kaj per rubando ekligis la dekstran manon al la peniko.

Tilla komprenis la brovdirekton de sia edzo - petu pli grandan formaton! Ŝi skuis la hararojn nee.

Ŝi estis tro emociita vidinte, ke la peniko estis rubande ligita por ne elfali el la maljuna mano. Ŝi retiriĝis por trovi lokon por ŝanĝvestiĝi. La ravan kostumon kiun ŝi planis, ŝi elprenis el la skatolo. Ŝi ekscite surmetis la elegantan veston malantaŭ ŝirmilo. La planko estis malbone balaita. Ŝi staris iom malantaŭ la ŝirmilo kaj atendis ke li voku ŝin. Nenio okazis. Ŝi eliris. Li mane montris kien ŝi devas sidiĝi. Pezis ŝiaj vangoj. Eĉ unu vorton de la franca ŝi ne povis elbuŝigi. La enboritaj okuloj de la granda pentristo direktiĝis al ŝi.

Paul diskrete fermis la pordon kaj malaperis. Renoir komencis skizi kaj faris kelkajn unuajn striojn sur la linaĵon. Estis granda silento, oni aŭdis kiel li tiras la penikon. Tilla apenaŭ kuraĝis spiri.

Tiam subite li ĉesis labori kaj vokis la helpantaron. Tilla atendis kio okazos. Li flustris ion mallaŭte. La helpantino forprenis etan linaĵon de la pezaj bretoj kaj muntis la grandan. Renoir reprenis la penikon kaj rekomencis.

Paul ie en kafejo jam kontente ridis. Ĉu telepatie li solvis sian deziron?

Tilla venadis dum du semajnoj antaŭtagmeze kaj posttagmeze. Foje venis filmistoj, por filmi la laboron de la majstro. Paul mendis ilin kaj traktis kun la pentristo pri la permeso. Interesis lin noti kiel ekestas la portreto. Renoir konsentis. Li klarigis ke li portretas la germanan aktorinon Tilla Durieux. La kameraisto starigis la kameraon por vidi kiel ekestas la vizaĝo. Ĝi naskiĝis el rozkoloro kaj ruĝo kiel rozpetaloj.

La pentristo montris al rozo en la vazo.

- Metu ĝin, mi petas.

Tilla pendigis ĝin ĉe la orelo, ŝi jam sentis sin iom Carmenece***, cigane. La kamerao notis kiel kreskas la rozo malantaŭ ŝia orelo. La francaj filmarkivoj konservis la filmon pri la unika laboro.

En la dua semajno de la portretado estis jam pli amika etoso, malstreĉiĝis ŝia franca, la kameraistoj foriris.

Ĉiun tagon kelkajn horojn. Estis silente en la ateliero, ŝi aŭdis nenion. Subite la pentristo diris, ke li estis en Munkeno kaj ke plaĉis al li blankaj kolbasetoj kaj la germana biero.

Tilla ridetis je la imago pri blankaj kolbasoj kiuj nutras la genion. Kuraĝe ŝi respondis al li per forta germana akcento. Baldaŭ de la kolbasoj la konversacio foriris al muziko de la germanaj aŭtoroj. Li konfesis ke li trovas Wagner tro minaca. La granda majstro konfesis, ke li ŝatas Mozart: *ĉe li la rideto estas kristaliĝinta larmo. Kiam la doloro transformiĝas al rideto, tiam ĝi esprimas la kulminon de la doloro. Tiel estas ĉe la gotikaj skulptaĵoj.*

Tilla aŭskultis. Larmoj grimpis al ŝiaj okuloj pro kortuŝeco de la difino.

Ŝi ricevis multajn malbonajn kritikojn por la roloj ĉar ŝi abomenis videblan surscenejan suspiradon de siaj kolegiinoj. Ili kapablis nur tiel esprimi grandajn emociojn. Al ŝi oni riproĉis mankon de emocioj ĉar ŝi montis ilin tro diskrete.

Nun Renoir difinis al ŝi malĝojon. Ŝi ridetis tra larmoj, la larmoj transformiĝis en rideton. Ne ĉiu tion kapablas distingi.

Ĉe la foriro ŝi flustre dankis lin por la speciala homa sento, por la hodiaŭa riĉiĝo. La granda majstro kiel eta knabo konfuziĝis pri la laŭdo.

Sur la koridoro ŝi renkontis knabon kiu portis varon el la apuda presejo. En la korto li pakis grandajn flavajn afiŝojn.

Afiŝojn ŝi ĉiam ŝatis, ĉefe teatrajn. Ŝi haltis por vidi pri kio temas. Ĉi foje ne estis teatra afiŝo. Universala Kongreso de Esperanto, Parizo, julio 1914 - ŝi legis rigardante la belajn konturojn de la flavaj konstruaĵoj. Ŝi palpebrumis. La afiŝoj jam estis pakitaj en dikan paperan tubon.

Nenio teatra, pensis Tilla, kaj sentis kiel ŝiaj piedoj facile portas ŝin. En la ateliero de Renoir sekiĝis ŝia portreto. Preskaŭ preta. Farita per la plej fama mano.

- Post kiom da tagoj vi rekomendas transporton de la pentraĵo? Kiom longe ĝi devas sekiĝi? - Tilla demandis la lastan posttagmezon.

La majstro tre malbone aŭdis.

- Forporti ĝin? Venontsemajne eblos.

Vane ŝi petis de Paul diri kiom li pagis al Renoir. Paul obstine silentis. Neniam li konfesis al ŝi la prezon. Sed li postulis multon de Tilla.

-Rekompence vi devos finligni la germanan. - li pikis.

Li ĉiam asertis, ke ŝi parolas *la malbonan germanan*, ke dum jaroj neniu devigis ŝin forigi ŝian vian akcenton, kiun ŝi tiraĉas kun si tra urboj kaj sezonoj kaj ke jam tempo estas ke ŝi dece regu kaj finfajlu la lingvon en kiu ŝi prezentas.

En la garaĝo, la ŝoforo atendante ilin, informis, ke ili devus tuj reveni hejmen.

Paul ridis. Tiuj ŝoforoj vere agacas, tiu ĉi eĉ diktas la konduton kion kiam fari. Sed la ŝoforo ne volis silentiĝi.

-Sinjoro, io politika okazis, ĉiuj germanaj aŭtoj jam foriris de ĉi tie.

Paul turnis la kapon dekstren, maldekstren. Vere, li ne rimarkis, la garaĝo estis preskaŭ malplena, nur francaj aŭtoj restis, neniuj fremdlanda.

Li tuj aĉetis la gazeton.

La murdo de la aŭstra tronheredonto en Sarajevo - ĉeftitolis.

Estis lundo, la 29an de junio 1914. Pri la vorto Sarajevo li ne aŭdis de studentaj jaroj. Pri la ĉeesto de la aŭstra tronheredanto Franz Ferdinand ĉe manovroj en Bosnio li havis neniun ideon. Ke iu serba mezlerneano levis la pafilon, kiu ŝanĝos tiom da vivoj, Paul ne povis imagi.

Li tiom rilatis al artistoj, ke li dum la lastaj tagoj eĉ ne degnis legi ĵurnalojn.

-Tilla, ni estas en la malĝusta ŝtato. Baldaŭ povus komenci la milito.

-Sed la portreto devas sekiĝi ĝis venontsemajne! - Tilla ne povis imagi ke eblus foriri el Parizo sen ĝi.

-Nu, bone, ĝi sekiĝu. Ni prenos ĝin kiam pasos la ŝtormo. Certe temas nur pri la sabromuziko de nia reĝo.

Kiel multaj homoj, li unue tute ne povis imagi, ke okazos milito, kaj imagis ke oni nur iom minace svingas per sabroj. Kiam la milito jam estis deklarita, li kredis ke la milito finiĝos post du monatoj, ĝis tiam tute bone sekiĝos la penikstrioj sur la vizaĝo de Tilla en la ateliero de Renoir.

Tio estis la unua mondmilito kaj oni ankoraŭ ne sciis, ke ĉiu daŭras almenaŭ kvar jarojn.

Rapide adiaŭi. La lastaj germanoj kiuj adiaŭis de Renoir estis Tilla kaj Paul. La pentristo malforte ridetis kiam Tilla premis danke lian manon. Ili forportos la portreton kiam ĝi sekiĝos, post iom da tempo, oni interkonsentis. Pri la milito, neniuj vorto. Paul kun multe da ĝentilaĵoj volis transdoni la bankbiletojn. Renoir nur leĝere mansvingis kiel pri malgravaĵo. Paul metis la koverton estime sur la tablon antaŭ li. La mano de la pentristo ne moviĝis al la koverto.

Tuj ili ekrapidis hejmen tra Nederlando. La helpantino Helene postsekvis kun iliaj valizoj.

En iu malgranda trajnstacio, amaso da vojaĝantoj serĉis transporthelpon ĉar haltis ĉiuj trajnoj. La aŭto preterzumis la homojn kaj la pakaĵojn.

Dum la ŝoforo ĉerpis benzinon apud la stacidomo, Tilla turnis la kapon, iu eta homo, helpis al sia edzino teni la valizon. Paul kiu al neniu ci-parolis kaj ĉiam tenis sin super la aliaj kunhomoj, nun ĝentile interŝanĝis kelkajn vortojn france kun la paro, atendente ke la benzinujo pleniĝu.

-Ĉu vi komprenis kien ili volas?

-Ŝajne al Varsovio. Ili celis Parizon, sed ĉiuj trajnoj haltis.

-Nu, Varsovio ne estos tiom facile atingebla.

Tilla rigardis kiel la lako de ŝiaj ungoj komencis degluiĝi.

La aŭto estis denove vojaĝpreta. La ŝoforo repetis ilin enaŭtiĝi.

Hejme atendis ilin la gaja Germanio.

-Oni militos!

Paul estis kaptita de la ĝenerala entuziasmo.

- Mi anoncos min tuj kiel volontulo. Kaj vi serĉu laboron en iu hospitalo. Oni ne aktoras en la milito.- planis Paul.- Ni vidos kiam ni povos repreni la pentraĵon.

La ideo, ke ŝi estu medicina helpantino post siaj Kleopatroj kaj post la pozado ĉe Renoir ne volis eniri ŝian kapon. Sed ŝi tuj obeis al la ideo de Paul. Tio estis ŝia unua milito. Ŝi ne tuj sciis ke ŝi devos helpi ĉe la amputado de kruroj.

Germanio venkadis ĉiuflanke, dum ŝi vizitis la kurson pri la helpo al vunditoj.

Jeder Schuss -ein Russ' ****

Jeder Stoss - ein Franzos'

Jeder Tritt- ein Brit'

reeĥis el ĉiuj gastejoj dum la manĝoj malvarmiĝis.

Paul klopodis kontakti siajn francajn kunlaborantojn por trakti pri la pentraĵoj. Meze de la konversacio, iu interromis la linion, *en la intereso de la regno.*

En la intereso de la regno li anoncis sin por volontuli. En Berlino en la unuaj militsemajnoj homoj vicostaris por anonci siajn aŭtojn por la milita helpo. Por eniri volontulan servon necesis havi bonajn kontaktojn ĉe altaj instancoj. Ĉiuj lokoj jam plenis. Pri la milito oni havis sufiĉe romantikan penson: rapide partopreni la sperton ĉar la unikaĵo neniam ripetiĝos. Baldaŭ li sendis sian unuan leteron el Belgio. Li estis ie ĉe Ypern. Ŝi ne plu legis en letero tiun entuziasmon per kiu li foriris.

Tiel, dum ŝi en la dua semajno de pozado por Renoir jam zumis por li melodiojn el Mozart, monaton poste ŝi en la hospitalo de Buch lavis fenestrojn por purigi la ejon por akcepto de la unua transporto de la bataalkampo.

Septembris. Dudek litoj, malplenaj, atendis la vunditojn. Iu mishumura dikulino montris al ŝi kiel vesti la litaĵon sur la hospitalan liton, mokante ke tio ne estas teatro.

La unua transporto alvenis vespere. La ĉambro pleniĝis per dudek diversaj veoj. Ŝi glutis la salivon. Oni ordonis ke ŝi tuj eniru operaciejon por helpi. Kiam ŝia ĉefo-kirurgo transdonis al ŝi la amputitan kruron por meti ĝin for, en la angulon, kiam ŝi kunpremis la dentojn por ne lasi la naŭzon regi ŝin, nur tiam ŝi konsciis, kien ŝi venis. La kruro lasis post si dikajn makulojn da sango, kiun ŝi vane klopodis sorbi per gazaj buloj. La pezon de la unua kruro, kiun ŝi tenis en la mano, ŝi memoros por ĉiam.

Ŝia iom pufita vizaĝo per kiu ŝi eksimilis al riĉkarnaj legantinoj kaj banantinoj de Renoir ankoraŭ staris fiksita sur la tenilo de la ateliero, atendante la instrukciojn el Germanio. La malrapida helpantino de Renoir elĵetis nur septembre la sekigitan rozon de julio. La modelo kiu kun la granda majstro diskutis pri doloro transformiĝinta en rideton, la modelo kun malhelviolaj lilioj enteksitaj en la verdan brokaton, ĉi monate pacience viŝis la puson el la ŝveliĝintaj vundoj kaj vespere mem bindis siajn maleolojn per malvarmaj vindaĵoj por povi la morgaŭan tagon elteni la tuttagan staradon apud la vunditoj.

Renoir en julio 1914 estis la lasta franco kiu traktis germanon per peniko. En la rilatoj oni jam preferis aliajn ilojn, pli fajrajn.

Kiam aŭtune ekpluvis, Renoir tuis kaj la bindado nur malbone povis teni la penikon. La bindita mano ne volis kunlabori.

La knabo kiu pakis la afiŝojn en la korto ĉe Renoir estis mobilizita. La afiŝoj kiujn li devis disporti restis en la kelo, neelpakitaj.

Estis la jaro 1914. Aŭtunis ĉe ĉiuj estontaj tranĉeoj.

August Renoir* (1841-1919) franca pentristo

Paul Poiret * * (mortis en 1944) franca modisto kaj parfumisto

Carmen *** ĉefrolulino en la opero de la franca komponisto Georges Bizet (1838-1875)

**** Ĉiu pafo - unu ruso

Ĉiu piko – unu franco

Ĉiu surpaŝo - unu brito

MILITVOLONTULOJ

Paul ĉe la fronto, Tilla medicina helpanto en la hospitalo en Buch ĉe Berlino, la domo plena je artaĵoj malplenas. Nur Helene viŝas la polvon de la porcelanaj Budhaoj kaj antikvaj ujoj por sekigitaj fruktoj el la 17a jarcento.

Helene blovas en la vizaĝon de Budhao kvazaŭ la mastroj ĉi vespre revenus: ŝi ĝisbrile frotas la senmortigan persikon en lia mano kaj penseme rigardas la ŝvebantajn nubetojn sur la vesto de Budhao.

Helene ankaŭ pedante frotas la artaĵojn el Benino kaj Paskinsuloj, kvankam ŝi indiferentas al ili. Por ŝia gusto ili estas tro infanecaj, tiu ina kaj vira praŭlo el Paskinsuloj.

Ŝi ne konas la historion: kiam iu ĉifita afrikano malfaldis la foruzitan franclingvan gazeton, la frankfurta artkomercisto ne sciis kion fari pri tio kio prezentiĝis. Li hezitis, sed tamen proponis iun malgravaĵon al la alportinto.

Kelkajn semajnojn poste eniris Paul en la vendejon. Li ofte aĉetumis ĉi tie, li rajtis mem fosi sur la bretoj. Sub la servtablo li tuj vidis tion kion li volis havi.

La brilo en la okuloj de Paul ne hezitis la antikvaĵiston. Li sciis ke tiu sinjoro havis absolute fidindan nazon pri aŭtentika artaĵo kaj li rapide kvarobligis la prezon kiun li pagis al la afrikano. Kial li ne petis la afrikanon reveni kun pli da objektoj?

Helene per pluma fasko en la granda salono tuŝis la kadrojn de van Goghaĵoj kaj Manetaĵoj. Ŝi kantetas, el ĉiuj ŝi plej multe ŝatas la Arlesaninon.

Helene jam loĝas en eta loĝejo super la gesinjoroj kune kun Georgo. Pri Georgo estis antaŭ la geedziĝo granda skandalo, kiu jam mildiĝis. Sed Georgo estis tre lerta elektrikisto mendita speciale de la teatro de Tilla por prilumi la scenejojn de Kleopatro. Georgo svatis Helenon, ŝi ne akceptis: ŝi ne rifuzis lin, sed ŝi ne volis forlasi la sinjorinon Durieux pro la geedziĝo. Georgo furioziĝis kaj ĉantaĝis al la tuta ensemblo: li ne lumigos ĉivespere la bordojn de Nilo, se Helene ne jesos. Oni kuris al la garderobo de Tilla por denunci lin. La unua akto devas komenciĝi post dek minutoj. Georgo ne degnis munti siajn kablojn apud Nilo. Tilla rigardis la mesaĝiston en sia garderobo de Kleopatro kaj telefonis al Paul.

-Ĉu vi donus la permeson ke Helene restu loĝi ĉe ni kun la edzo?

Paul pretis grumbli, kial oni nun telefonas, ĉu oni ne povus pri tio trakti poste.

- Ne povus, Georgo rifuzas lumigi la teatraĵon. Li volas tuj scii ĉu Helene

estos lia edzino. Se ne, li ne volas lumigi.

Paul ekridis. Ŝercojn li ŝatis pli ol ĉion, ĉantaĝojn malpli.

Eklumis la bordoj de Nilo tiun vesperon.

Nun Helene revas kie aĉeti iun kolbaseton por konservi ĝin ĝis la momento

kiam la sinjoro revenos de la fronto.

La sinjoro ne interesiĝis pri kolbasoj. Li tiutempe jam estis en malsanulejo, ĉar

li rifuzis manĝi kaj trinki. Oni vokis la edzinon. Tilla per la unua momento de konversacio kun la doktoro komprenis, ke ne temas pri malgravaĵo.

- Se vi ne devigos lin manĝi hodiaŭ, mi estos devigata sendi lin al mensmalsanulejo.

La vorto la unuan fojon estis prononcita lige al Paul. Ŝi trovis lin maldikan kaj

obstinan. Li ne volis rigardi kion ŝi alportis al li.

Necesis tuta teatraĵo por konvinki lin malfermi la donacon. Eta faldebla glaso.

Li ne interesiĝis. Vane ŝi rakontis ke la akvo el ĝi laŭdire havas iom alian guston.

- Ĉu li akompanus ŝin ĝis la puto en la hospitala korto?

Ŝi trinkis plezure.

- Nu, provu.

Ŝi mense pretiĝis ke li obstinos. Li elverŝos la fluidaĵon sen tuŝi ĝin.

Li prenis la glason kaj ne elverŝis la akvon. Supre sur la fenestro blankis la kitelo de la kuracisto. Ŝi rigardis kiel la gorĝo de Paul moviĝas dum li glutas.

-Vidu, mi trovis miajn malnovajn ŝuojn en la ŝranketo, ŝajne tiujn mi neniam

uzis antaŭe, tiom ili novas.

Ŝi metis sian malgrandan piedon apud lia soldata boto.

- Bela paro, mia kaj via ŝuoj.

Li silentis.

- Kio haveblas en via kantino?

- Mi ne scias, mi ne manĝas.
- Ĉu rajtus manĝi mi, helpantino de la hospitalo en Buch? Ĉu vi preferus

sidi ekstere dum mi manĝos? Atendi ekstere, sur la benko ĉe la puto, mi revenos baldaŭ. Aŭ ĉu vi volas kuniri kun mi?

Ili sidiĝis en angulon. Tilla alportis nur unu teleron. Pantranĉon ŝi prenis kaj

maĉis konvinke parolante pri la problemo kiel fiksi la prezon de la pentraĵo de Adolf Menzel* kiu vendociele aperis ĉe ili en la galerio? Ĉu mi alportu la pentraĵon venontfoje al vi ke vi pritaksu kaj diru la prezon?

Plaĉis al li vidi la pentraĵon en la hospitalo. Ŝi forgesis ke ŝi, por atingi lin, devas kvar fojojn ŝanĝi la trajnon kun multaj pakaĵoj por liaj soldatkamaradoj kaj ke la armiloj de la kunvojaĝanta roto alproksimiĝos al la pentraĵo.

-Bone, mi alportos *Menzel* venontfoje. Cetere ĉio iel marŝas sen vi, nur ke la

deĵorantoj ne kapablas memstare fiksi prezojn ĉe novaj akiraĵoj.

Rizo jam estis sur ŝia telero. La artmeceno forgesis ke li ne manĝas. Forko kun

la rizo iel jam estis ĉe lia buŝo. Li ekmaĉis meze de la diskuto pri la pentraĵo.

Tilla sciis ke ŝi tiam savis lin de mensmalsanulejo.

Ŝi ne memoris la unuan signon de lia malsano en Nederlando. Ŝi vekiĝis ĉar

li mankis en la lito. Ŝi trovis lin sur la balkono, en piĝamo, li minacis al la vento. Li tiam volis ke la vento ĉesu. Nun la ventoj fariĝis tre malobeemaj.

Al ŝia hospitala adreso venis multaj leteroj el lia plumo. Li akuzis ŝin, li riproĉis, ŝi estas la kaŭzo de lia malsano.

Ĉu povus esti? Ĉu vere li fartus pli bone sen ŝi? La penso timiga.

De kiu

peti konsilon? Ĉirkaŭ ŝi nur diligentaj helpantinoj kaj veantaj homoj. Ŝi elektis por la konsultanto la familian kuraciston, la fraton de Paul. Ŝi volis informiĝi pri la speco de la malsano. Ŝi portis al li sakon plenan da riproĉleteroj.

La bofrato tiutage estis pli bofrato ol kuracisto. Li ne kapablis kaŝi la entuziasmon ke ŝi povus eksedziĝi de Paul.

- Sed mi ne volas eksedziĝi. Paul tion proponas. Mi venis peti konsilon kiel medicine helpi al li.

- Lasu min paroli kun Paul.
- Parolu sed ne pri la eksedziĝo.

Sed la vorto jam ekflugis tra familiaj rondoj. Paul mem aperos iun auron horon en ŝia ĉambro kun minaco, ke li mortpafos sin. Per la pistolo per kiu li minacis tiun matenon li pafos dek jarojn poste, dum subskribo de la kontrakto pri eksedziĝo.

De la hospitalo ŝi revenis en la teatron. La teatra repertuaro ne konis indulgon. Matene pistolo en ŝia ĉambro, vespere *Medea* en *Schauspielhaus Berlin*. *Medea*, la perfidulino.

Oni invitis ŝin gastigi en Bruselo. Ludi por la armea estraro. Ŝi akceptis. Ŝi ŝatis Bruselon, inter la altrangaj armeaj oficiroj ŝi havis kelkajn konatojn. Kaj ŝi ludis, sed ŝi sentis ke neniu belgo sidas en la teatro, ĉiuj kaŝis sin, deprimitaj, malantaŭ la fermitaj fenestroj.

Oni denove mobilizis Paul.

La tuta Germanio jam manĝis nur betojn, ŝi sukcesis per Helene trovi anseron kaj terpomojn por 25 kamaradoj de Paul. Ŝi havigis lanon por 25 ŝaloj, ŝi trikis ŝtrumpojn por la frostigitaj kruroj de la kolegoj de Paul.

Dum la Kristnaska vespermanĝo en la gastejo, kun la roto da liaj kolegoj, ŝi aŭdis ke Paul hieraŭ estis ellasita el la armeo ĉar malsana. Sed li ne volis foriri el la armeo, ĉar li ja promesis al siaj kamaradoj la Kristnaskan vespermanĝon kaj devis ĝin finfari.

Elarmeigita pro malsano, Paul vendis sian vendejon, komercis per siaj pentraĵoj dum Tilla vivis apud li provante ne inciti lin. Neniun sian problemon ŝi kuraĝis montri al li por ne maltrankviligi lin. Kaj problemoj ne mankis. Ŝi tenis ĉiujn en la skatolon enfermitajn, ŝlositajn per duobla seruro.

Kun la reveno de Paul el la milito, revenis kulturaj vesperoj en ilian domon. Foje kolektiĝis tricento da homoj en la publiko. Ŝi legis pacisman novelon de Leonard Frank. La publiko entuziasme ekstaris kaj komencis voki Pacon!

Pacifismo de intelektuloj legeblis en la ĵurnalo. Paul estis revokita militservi. Ĉi foje al la hospitalo de Ratenau. Nervmalsano. Noktaj hurloj. Klopodo elsalti tra fenestro. Provo engluti venenon. Ŝi luktis kontraŭ li matene por forpreni de li la venenboteleton kaj vespere ŝi kantis en opereto *Vesperto*.

Oni ellasis Paul denove el la hospitalo, li foriris al Svislando. Oni avertis ŝin ke kontraŭ li kuŝas akuzo de la mililtribunalo. Mililtribunalo? Kial? Ŝi enketis la kialojn, ŝi subaĉetis, ŝi komprenis ke la vespermanĝo por militkamaradoj estis korupcio: la invitita oficiro rifuzis veni, rifuzis akcepti pentraĵon.

Ŝi volis sekvi Paul al Svislando. Oni ne donis al ŝi pasporton. Oni rifuzis la peton. Ŝi serĉis kromvojojn. Ŝi trovis, ŝi venis post li en Svislandon.

*Adolf Menzel – (1815-1905) germana pentristo kaj grafikisto

** Medea – sorĉistino el la greka mitologio, preta krimi pro amo

SVISLANDO, 1916

La renkontiĝo komenciĝis per plorado. Ploris ŝi. Ne ĉar li aspektis malsane, sed pro la laktokruĉo kiu elvaporigis sur la matenmanĝa tablo. Laktujo plena da varma lakto plenigis ŝiajn okulojn per larmoj. Ŝi ne parolis, prenis silente peceton da butero sur la teleron antaŭ ŝi. Dum ŝi tiris la tranĉilon sur la surfaco de la pantranĉo, la larmoj jam gutis sur ŝian bluzon.

- Kio nun? Paul maltrankviliĝis. Larmojn li timis. Li ŝatis sanajn kaj bonhumorajn

homojn. La malsanojn de Tilla li neniam konsideris.

- Kio doloras? Kio mankas?

- Mankas nenio. Estas tro.

Tilla subite singultis, ne nur pro la lakto kaj la beboj kiuj kreskas sen koni laktoguston. Ŝi komencis rakonti al li kiel oni rifuzis ŝian pasporton por Svislando.

Nun necesus diri ke ŝi malkovris militribunalan akuzon kontraŭ li, sed tion ŝi

ne plu kapablis elbuŝigi.

Paul aŭskultis kun kunpremitaj lipoj. Nun li ne koleris je ŝi. Je Ĝi eble, la mondo.

Li etendis la manon kaj per montrofigro viŝis la larmon super la matenmanĝa tablo.

La mano memorigis la konsolan tuŝon de iamo. Ĝi rilatis ankoraŭ al la varmo de la krepuskhora kiskontrolo en ilia nederlanda dometo: ĉu ĉeestas ĉiuj haŭtmakuloj sur ŝia dekoltaĵo.

Ŝi vigliĝis.

En Svislando tiutempe svarmis multaj germanaj intelektuloj serĉintaj ŝirmejon: poetoj, pentristoj, arthistoriistoj kaj muzikdirektoroj. Ŝi retrovis la germanajn verkistojn Frank Wedekind, Franz Werfel, Stefan Zweig.

Ĉe iu tablo Paul montris al ŝi du rusajn politikistojn: Lenin kaj Trocki.

-Tiun Trocki* mi memoros.- ŝi iom turnis la kapon por alrigardi ilin pli bone.

Li ŝajnas esti spitulo.

Paul havigis kuracistajn paperojn kiuj montris, ke li estas malsana kaj sendis ilin al la armeaj autoritatuloj. La paperoj ne mensogis: li vere suferis de tio kio estis skribita.

Li decidis kun Rascher fondi pacifisman eldonejon. Por fari tion, li devis alporti sian kapitalon el Germanio. Tio ne eblis sen konsento de la aŭtoritatoj. Li estis vokita al la germana misio por klarigi kial li bezonas tiom da mono.

Li ne multe detaligis, nur menciis la eldonejon. La respondeculoj entuziasmis: li ricevu financan subtenon de la germana regno por lia eldonejo. Paul serĉis tre ĝentilajn vortojn por rifuzi la proponon. La altranga oficisto elektis malpli fajnan vorttrezoron po rifuzi lian peton pri la propra mono.

La propran monon necesis kontraŭbandi. Oni faru!

La eldonejo Rascher & Comp. estis fondita. Paul iel sukcesis elporti ankaŭ la belajn pentraĵojn el ilia germana hejmo kaj ornamis la svisajn murojn.

-Venu ion vidi! - li vokis ŝin, dum ŝi sidis ĉe la kafotaso sur la hotela teraso. Ŝi preskaŭ svenis vidinte *Arlesaninon* el la ĉambro apud ŝia svisa lito.

- Sed kiel vi faris? Kiel vi alportigis la pentraĵojn?
- Scii vi ne rajtas, ĉar vi estus kunkomplico. Ne demandu kiel.

Ŝi petis lin ĉiun tagon ke li diru al ŝi. Li amuziĝis pro sekreteco kaj volis nenion

malkaŝi pri la transportomaniero. Tiam aperis la alvoko ke li devas resoldatiĝi. Se li estas mensmalsana, oni volis lin en mensmalsanulejo. Irrenanstalt Freiburg estis la loko kie la armeaj instancoj volis lin vidi. Tuj.

La germana konsulejo evitis doni al li la pasporton: intertempe la germana diplomata misio jam entiris lin en siajn planojn kontakti kun Francio pri eventuala packontrakto. Li utilis pro siaj abundaj francaj kontaktoj. Aliflanke, tuj kiam ĉe la germana flanko aperis la plej eta venko, pri la subskribo de kontrakto neniu plu parolis. Ĉiu mencio pri tio estis danĝera. Tiel zigzage de venko al malvenko. Paul konis tro multajn detalojn pri la kontraktado por ke oni lasu lin foriri el Svislando.

Genudoloro intertempe akriĝis ĉe Tilla, ŝi definitive lamis kaj sciis ke la operacio estas neevitebla. Tiel, lamanta ŝi akompanis lin al la landlimo. Li tamen devis prezentiĝi persone en la mensmalsanulejo.

Ŝi staris ĉe la landlimo kaj rigardis kiel li piede foriras. La spaco inter ili kreskis: metro, cent, kilometro, kvindek kilometroj.

Oni enfermis ŝin en sanatorion.

Paul frapis iun matenon al la pordo de ŝia ĉambro en sanatorio: Iu kuracisto en Freiburg donis al li la dokumentojn ke li ne plu taŭgas por la militservo. La kuracisto ne mensogis.

Ŝi estis tiom feliĉa ke ŝi forgesis redemandi per kiu vojo venis la impresionismaj pentraĵoj el ilia berlina domo al la svisa ĉambraro.

En Ĝenevo okazis ekspozicio de la granda svisa pentristo Ferdinand Hodler. Li mortis la 18an de majo 1918. Tilla ankoraŭ malforta post la operacio rapidis kun Paul al Ĝenevo por vidi liajn pentraĵojn.

Paul havis la okazon konatiĝi kun la filo de la pentristo Hector. Okazis tie ĉe la bestprotektasocio, kie Hector membris. Paul ŝategis bestojn kaj infanojn, kaj ankaŭ en ilia nova domo, la Hotelo Schwert, ĉiam paradis almenaŭ unu hundo. La hotelo estis la sama kie laŭdire Casanova** pekis kun iu loka knabino kaj kie Goethe *** revene el Romo nombris heksametrojn sur la dorso de belulino por siaj versoj en *Romiaj Elegioj*.

La filo de la pentristo Ferdinand Hodler, tio ne estis sufiĉe konate, ekde lernaja jaro okupiĝis pri la ideo de la Internacia Lingvo kaj ankaŭ

nun el la neŭtrala Svisio li gvidis solidarecan helpreton por helpi al militkaptitoj ĉe ambaŭ frontoj. Paul aŭdis dum la konversacio en bestprotektita societo ke Hector volus el sia mondlingva societo krei asocion por protekto de la homoj.

Nun survoje al la ekspozicio de Ferdinand Hodler Paul interesiĝis ĉu krom

Hector iu alia familiano heredos la imponan verkaron de la patro Ferdinand. Sed Tilla tiumomente ne sekvis kun intereso lian rakonton ĉar ŝi vidis narciskampojn el la trajna fenestro.

- Vidu, kara, narcisoj! - ŝi ekkrietis.

Paul neniam akceptis esti interrompita dum li parolis kaj ne plu volis tuŝi la temon Hodler kiam narciskampoj plenigis ŝiajn okulojn.

Ŝi vidis ke ŝi interrompis sian ideoriĉan edzon je la malĝusta loko sed obstine silentis. Ŝia mentono iom leviĝis pro osbtino, kiel en la skulptaĵo de Hermann Haller.

Haller loĝis kun la edzino transe de la lago kaj li foje venis kun la peto, ĉu Tilla ŝatus pozi al li. Tilla estis mishumora. Hieraŭ alvenis la mesaĝo el Germanio, ke ŝi estas en pluraj germanaj gazetoj atakita pro spionado. Ŝi sentis sin tute mizere, sed kiel rifuzi la peton de Haller?

Kunsthalle en Zuriko poste aĉetis la verkon de Haller farita matene en la ĝardeno apud la lago. Tilla nur unu fojon malsuprenigis sian rigardon al la argila amaso antaŭ la skulptisto, el kiu kreskis ŝia vizaĝo.

Post tiom da narcisekfloroj, ŝia obstinesprima kapo staras tiom proksime de la verkoj de Hodler.

trotz – germanlingve: spite al

**Giovanni Giacomo Casanova (1725-1798) itala aventuristo

***Johann Wolfgang Goethe (1749-1832) germana verkisto kaj pensulo

PAFO ĈE LA ADVOKATO

- Mi gardis lin de venenflakono, de pistolo, de transfenestra salto kiom ajn mi povis. La ideoj ke ni eksedziĝu atakis lin regule kiel febro. Li estis pli ol nervoza, liaj neurotikaj ĵaluzoj akceptis neverŝajnajn dimensiojn, el li elverŝiĝis malamo al ĉio, kaj precipe al mi.

Nun post du jardekoj malfacilas paroli pri tio, sed tiam...

Zlata silentis, demandis nenion.

Nur unu fojon li sukcesis gluti la venenon. Estis tio ankoraŭ en la berlina hejmo, nokte, kiam ŝi laca revenis post la teatraĵo kaj Helene servis kiel kutime vespermanĝon antaŭ ŝin en la manĝosalono. Paul alkuris, frakasis ŝian plenan teleron en splitojn, kriis ke li ne plu povas kun ŝi kaj ke li tuj trinkos venenon. Ŝi vidis etan vitran ujon en lia mano kaj ekkuris post li ĉirkaŭ la tablo. Li estis rapida, li jam ion glutis kaj tuj poste falis.

Tilla krie alvokis Helene, pala pro timo.

- Kuraciston, tuj. Voku sinjorojn Cassirer.

La fratoj konsterniĝis kaj izolis lin for de Tilla kaj malpermesis ke ŝi vizitu lin.

Sed tuj kiam Paul povis paroli, li venigis ŝin ĉe si kaj pardonpetis. Li petis ke ŝi

neniam forlasu lin. Tiel, pompe.

Ekde tiam datas la malpermeso ke ŝi enlitiĝu sen li. Ŝi promesis, timigita per

mortproksimo, kortuŝita ĉar tio sonis kiel amdeklaro. Ĉiam ŝi tenis tiun permeson.

Estonte, vespere, ŝi atendis lian lacon. Foje ĝis matena horo en liaj gajaj societoj,

ŝi kun trikiloj en la mano.

- Mi sidadis tiel apud li, inter liaj geamikoj kaj trikadis, trikadis dum la tutaj noktoj.

Tintado de trikiloj trankviligas. Ankaŭ nun. Mi trikis puloverojn kaj noktajn *liseuses* eĉ foje el nigra lano iun vesperan robon, mi perdis la okulojn super ĝiaj etaj maŝoj, la nigra lano estis tre fajna. Multajn lanaĵojn mi fordonacis al la kolegoj.

Jam dum la milito mi trikis 25 ŝalojn por liaj soldatamikoj. Ja tiu triklaboro vere

ĝojigis la soldatojn, ili ĉiuj havis Kristnaske nudajn kolojn al kiuj vento alblovis.

- Ĉu vi vendis iam ion el tio kion vi trikis? – demandis Zlata subite.

-Vendis? Jes, lastvintre ĉe la zagreba bazaro du parojn da lanaj ŝtrumpoj al iu

sinjorino. Ŝi vidis ke tiuj miaj ŝtrumpoj estis iom aliaj ol ĉiuj aliaj trikitaj per la lano el Lika.* Ne diru tamen al Lutz ke mi sola iris vendi ilin. Li ankoraŭ ŝatas dignon. Iel tio estus pli ol li povas toleri, mi sentas.

Zlata etendis sian manon kaj karesis la hararon de Tilla. Pro la glutita veneno dum

tiu vespermanĝo kaj pro la venditaj ŝtrumpoparoj du jardekojn poste.

Multe ŝanĝiĝis ilia vivo post la militfino. La artmeceno Paul devis fariĝi simpla artvendisto. Tio ne nur agacis lin sed ankaŭ humiligis. Kolerigis lin la gusto de novriĉuloj.

Tilla sciis ke ŝi estas lia plej granda artverko. Sed ŝi iel subkonscie sentis ke ŝi superkreskis liajn konsilojn kaj ke ŝi ne plu povas lerni de li. Ŝi plej multe ŝatis tiujn rolojn kiujn ŝi prezentis sola dum turneoj, for de lia influo.

Lia mishumuro dispelis liajn amikojn.

Poste, tamen, en 1925, liaj kolerverŝiĝoj fariĝis tro oftaj kaj koncentriĝis nur al Tilla.

- Mi volis saviĝi, fuĝi, retiriĝi ien en silenton. Mi luis ĉambron en iu eta hotelo por trovi trankvilon. Paul sciis kiel trovi min kaj kiel vundi min. Venadis kurieroj kaj alportis al mi liajn donacojn. Donacojn de konsoliĝo? Tiel mi pensis la unuan fojon kiam la kuriero venis. La penso nur parte pravis: En la pakaĵo estis liaj iamaj donacoj al mi, frakasitaj kvazaŭ batitaj per martelo.

Foko skulptita de Gaul kiun mi tiom ŝatis, la bluaj orelingoj aĉetitaj por mia bonvenigo al la duna dometo en Noordwijk, broĉo en formo de hundo el la ĉeĥaj granatoj, donacitaj por ŝia turneo al Prago – *ke ĝi gardu vin*, harpinglo sukkena

el la antikvaĵejo kiam ni alteriĝis la unuan fojon post la balonflugo, skatolo por la kolĉenoj de Kleopatro. Furioza letero akompanis ĉiun amaseton da frakasaĵoj, kiuj iam estis la plej karaj donacoj.

Jam antaŭe li postulis ke ŝi redonu ĉiun lian donacon. Ŝi faris. Ĉiuj pentraĵoj donace ricevitaj reiris al li. Ŝi faris ĉion kion li volis. Ŝia advokato acide mienis al ŝiaj insistoj ke estu tiel.

Ŝi ne estis tute sola en la disfalo de ilia rilato. Estis iu viro kiu helpadis al ŝi. Li komprenis kio okazas. Li nomiĝis Ludwig Katzenellenbogen kaj li kun la edzino Estella apartenis al la rondo de Tilla kaj Paul. Fakte li estis fama

financa fakulo, investkonsilisto de la negocoj de Paul Cassirer. Malsubite el la financkonsilisto de Paul fariĝis konsolisto de Tilla. La sentemaj nervoj de Paul konjektis ke io plektiĝas inter la konsilisto kaj lia edzino pli frue ol tion akceptis kompreni Tilla kaj Lutz. Tuj poste tion ekspuris la skandalemaj paĝoj de berlinaj ĵurnaloj.

Ankaŭ al Tilla nun klaris ke eblis nur unu saviĝo: eksedziĝo. Ŝi petis sian advokaton aranĝi la necesajn paŝojn, laŭ ŝia iniciato.

La unua paŝo estis subskribo de komuna dokumento pri eksedziĝo. La advokato aranĝis la kunvenon de Tilla Durieux kaj Paul Cassirer en sia oficejo. Paul akceptis veni.

La horo fiksita.

Kiam Tilla eniris kun siaj violkoloraj okulringoj pro nedormo kaj humiliĝo, Paul jam estis en la oficejo. Lu kramfo tiriĝis ĉe lia buŝo kiam advokato petis ilin sidiĝi. La paperoj venis sur la tablon. La advokato enkondukis la kazon. Je la vorto eksedziĝo, Paul murmuris senkulpiĝon, ekstaris kaj direktiĝis al alia ĉambro.

La advokato rigardis Tillan, ŝi ne forprenis rigardon de la papero sur la tablo. El la flankĉambro aŭdiĝis pafo. Tilla alkuris al Paul pli frue ol la advokato.

Ŝi ne havis tempon pensi ke tio estis unu el liaj konataj scenoj – li kuŝiĝis jam en sangoflako kaj kramfiĝis al ŝi:

- Vi restos ĉe mi!

Sango algluiĝis al ŝia polmo dum oni transportis lin al la hospitalo. Ŝi kuniris. Li

tenis ŝian manon.

La nokto en la hospitalo. Ŝi rajtas estis en la ĉambro kun li. Foje li malfermis la

okulojn kaj diris al medicinistino apud la lito, ke tiu virino estis ĉiam tiom bona al li.

Li petas Tilla meti sian kapon apud la lian sur la kusenon.

Tilla murmuris iujn neklarajn preĝojn. La timo pri lia vivo forigis tutan indignon

pro la ĉantaĝo. Nur ke li resaniĝu! Nur ke li resaniĝu!

Foje li fordirivis en dormon. Ŝi fermis la okulojn enpremita apud li . Ekstere sur la nokta fenestro neĝeroj de la berlina januaro. Silento.

Ŝi levis la kapon. Estis tro silente. Ŝi rigardis lin. Li ne plu spiris. Ŝi krie vokis la kuraciston. Li povis nur konfirmi kion ŝi sentis.

Tiu speciala paciento endormiĝis tre profunde. Neniu plu problemo ĝenos lin.

La enterigo okazis la 10an de januaro 1926. La tuta kultura Berlino venis al lia artsalono en Viktoriastr. por adiaŭi de Paul Cassirer. Tie kie ŝprucis liaj ŝercoj kaj liaj sarkasmaj kritikoj okazis lia lasta ekspozicio. La ĉerko meze de ruĝaj rozoj. Ĉiuj familianoj Cassirer klopodis malhelpi, ke la virino kiu mortigis lin aperu ĉe la enterigo. Ŝi venis. Neniu etendis al ŝi la manon. Ŝi staris tiel, sub la nigra vualo, en sia plej malfacila horo.

Kutime pafas la pli malforta. La viktimo kuŝis en luksa ĉerko. La alia viktimo staris apud ĝi kaj silentis sub la vualo.

Tiu terura tago ne volis finiĝi: la familio Cassirer komencis tuj post la enterigo sian militiron kontraŭ la entrudulino. Ja ne vane oni nomis ŝin sinjorino Kasistino, aludinte al lia nomo sed tordante ĝin laŭ la vorto kaso. Unue oni senheredigis ŝin. Kontraŭ Tilla luktis la frato de Paul, la filino de Paul Aimée Susanne, la bofratinoj, la kuzoj.

En tiu longa listo mankis la filo de Paul Hans Peter. Li mortpafis sin kiel dekokjarulo tuj post la militfino. Memmortiĝo en la bestĝardeno. Tilla estis en munkena hospitalo tiutempe. Sed oni akuzis ŝin pro la la sorto de la filo same kiel pro la sorto de la patro.

Tilla alten levis la kapon por elnaĝi el tiu marĉo.

Subtenis ŝin Ernst Barlach, la skulptisto kiu la unuan fojon skulptis ŝian kapon. Li skribis al ŝi en la kondolencletero, *ke la profundoj de ŝia doloro estas grandaj kiel la sorto. Ĝi ne povas esti pli malgranda.* Se Tilla estus malpli granda – al ŝi estus atribuita pli facile elportebila sorto.

Surstrate la iamaj amikoj ne plu volis saluti ŝin. En la teatro kolegoj rigardis al

ŝi komplete, iuj koleginoj malice. Por la unua duono de la jaro 1926 ŝi jam antaŭe subskribis kontraktojn. Nun necesas ridi en la teatraĵo, vojaĝi kaj intertempe aŭskulti la komplikajn rakontojn de ŝia advokato kiujn ŝi, agacita, apenaŭ kapablis sekvi.

Kiom kostas tio?

Ŝi subskribadis ĉekojn.

Ŝi renkontis Lutz la unuan fojon en Parizo, for de la scivolaj okuloj, post kiam li jam estis eksedzo. Sed Parizo por ŝi estis la urbo kien Paul gvidis ŝin al Renoir kaj al la artaĵvendisto Paul Durand-Ruel kaj la nuna renkontiĝo kun Lutz sen la arta fono pli profunde tranĉis ŝiajn vundojn. La kuliso de Parizo ne helpis.

Eniri novajn rilatojn ŝi ne plu volis.

*Lika – regiono en Kroatio, fama pro ŝafoj kaj ties malfajnstila lano

LA TRIA NOVEDZINA BUKEDO

En la jaro 1927 ŝi sukcesis eliri el sia vivo de la aŭtomato. Iom movis ŝin. Kvankam ŝi kredis ke ŝi post la morto de Paul eterne indiferentos. Nun fascinis ŝin la teatra laboro de Erwin Piscator.*

Tilla admiris lian penson pri politika teatro. Ŝi estis sur la germanaj scenejoj jam kvaronjarcenton sed ŝi kapablis senti kiam io nova venas. Kaj ŝi pretis subteni tion ekstreme novan.

-Kiom da mono mankas por ke via teatro ekvivu?

Piscator ne sciis kion respondi. Li ne sciis precize kiom necesas por efektiviĝi siajn ideojn. Ŝi ripetis ke ŝi ne volas esti en la estraro de la teatro kiun ŝi financas. Nur la novon en la teatro ŝi volis helpi.

La ĉeko kiun ŝi subskribis surhavis tre imponan ciferon: 500.000 markojn. Piscator mutiĝis de la ago.

Lutz eksedziĝis de sia edzino Estella kaj lasis al ŝi kaj la infanoj ilian vilaon kaj duonon de la komuna pentraĵkolekto, ankaŭ tiujn pentraĵojn kiujn li

aĉetis ĉe Paul Cassirer. La onidiro ke s-ro Katzenellebogen konsolas la grandan aktorinon post la morto de la edzo ne volis malaktualiĝi en la klaĉrubrikoj de la gazetoj.

Kvar jarojn post la morto de Paul, ŝi diros jes al Lutz en Londono. La geedziĝo okazis for de la publikaj okuloj, en la germana ambasadejo, kun germana konsulo kiel atestanto de la nova vivo de la aktorino.

Antaŭ la solenaĵo kun Lutz, invadis ŝin la memoroj pri ŝia edziĝfestoj kun Paul: por la geedziĝo ŝi alvojaĝis de la turneo, la tutan nokton en la trajnvagono ŝi surhavis en la hararo harbukligilojn por pli bela frizaĵo.

Paul staris mishumora kaj acidmiena en la verdmura salono kaj pendigadis pentraĵojn, blasfemante kontraŭ la kadrigistoj. Helene preparis ŝian blankan kostumon. Jam antaŭ la turneo ili interkonsentis ke ili piedos al la registra oficejo. La geedziĝatestantoj alvenis, solene vestitaj. Tilla ne sukcesis pudri larmojn sur la vangoj.

- Sed kio okazis al Paul?

-Nenio.

-Sed kial li estas tiom acidmiena?

-Mi ne scias.

Paul kuniris per rapidaj paŝoj por havi *tion* malantaŭ si. Tio estis la esprimo por la oficialigo de ilia rilato, kiun li mem iniciatis. Ŝi tenis kun la floroj la malsekan naztuketon.

-Ĉu nun kontentaj? - demandis Paul morne post la subskriboj. La oficiala kiso sekvis.

Denove sur la strato, li rifuzis iri al la geedziĝa matenmanĝo mendita en la hotelo

Royal. Li volis iri labori.

- Labori? Nun? Faru laŭ plaĉe. – Komenciĝis la unuaj, pezkoraj cedoĵoj, al kiuj ne

eblis doni impreson ke por ŝi malgravas.

Tilla invitis hejmen la du geedziĝatestantojn. Ili akceptis. Iel ne decis lasi la novedzinon solan en tiu horo, eĉ se tiel ekstravagancan.

Posttagmeze revenis Paul el la oficejo. Jam trankviligita de siaj mishumuroj, li

pardonpetis kaj invitis ĉiujn al la matenmanĝo en la hotelo Royal.

La geedza vivo rajtis ekruliĝi.

Tilla puŝadis la memorojn sed ili ŝatis reveni.

Lutz brosis cigaredodoron el siaj dentoj por la unua geedziĝa nokto. Li ne konjektis ke unue li devos konsoli la novedzinon. Larmoj estis jam sur la kuseno. Li sciis ke la plej karaj rakontoj kiujn ŝi ŝatas aŭskulti, estas rakontoj pri lia infanaĝo. Baldaŭ displektiĝis la konsolrakonto. Li ĉirkaŭbrakis ŝin kaj ekfabelis:

- Klare, ke liaj skribiloj estis la plej multekostaj Kohinoor, lia lerneja teko el la plej fajna bovledo, lia inkujo el la plej lastatempa brita modelo el kiu inko ne gutas, kiam ĝi hazarde renversiĝas. La samklasanoj kredis ke la ujo por sandviĉoj kiujn li ricevis de la onklo naskiĝtage estas arĝenta, ĉar ĝi brilis nikele.

Tilla jam konis multajn detalojn el la vivo de Lutz:

Li ĉiam elstaris en sia medio. Tuj post la lernejo eniris la kontoron de sia patro kaj li komencis okupiĝi pri negocoj. Baldaŭ li eniris la detalojn de la kompanio *ĝis la kolo* kaj la direktoraro ne plu povis funkcii sen li. La juna fakulo ricevis printempan ferion por edziĝfestoj kun Estella Neumayer, fraŭlino de la amika kompanio. Ŝia doto impone plenigis ilian domon, kiun lia patro konstruigis ne malproksime de Kurfuerstendamm, kun pomarbo en la ĝardeno.

Tuj post la geedziĝo la juna sinjorino Katzenellenbogen pudris sian nazeton tre

ofte ĉar la gravediĝo estis konstantita. Ĝemeloj!

La novpatro verŝis al si el la trinkŝranko por tosti kaj por tiri sin el la knabjaroj.

Iel li ne plu tiom elstaris. La vivo tre rapide enordigis lin kiel aliajn.

Li kun la edzino vojaĝis kun gesinjoroj Cassirer el Ĝenevo al Munkeno.

Paul

volonte aŭskultis liajn financajn konsilojn. Neniu en la unuklasa trajnkupeo konjektis, ke tiu viro, kiu ne pli ol ĝentile retenis siajn rigardojn sur la vizaĝo

de la sinjorino Durieux, petos ŝian manon tuj kiam ŝi vidviniĝos. En la kupeo lia rigardo glitis al siaj gantoj el mola cervledo pli ofte ol al ŝi.

La rakontoj revigligis Tilla kaj sekigis la larmojn. La humuro revenis. Ŝi etendis la manon por karesi la vizaĝon de Lutz.

Super la brovo ŝia fingro stumpletis kontraŭ pustuleto.

- Ĉu vi edziĝis kun tiu nigraĵo?

Tilla koncentriĝis kiel akcipitro kaj komencis premi tion kio ŝin ĝenis sur lia haŭto.

Lutz ne kuraĝis protesti. Kiam la nigraĵo eliris el sia graseta groto, Tilla sentis sensarĝiĝon.

- Nu, jen, kia plibeliĝo!

-Atendu, mi havis tute alian imagon pri nia unua oficiala tranokto! Unue mi rakontas al vi fabelojn el la lerneja benko kaj poste rolas viktime en kosmetika salono.

Tilla ekridis. Ŝi forskrapis la nigran punkton el lia brovo kaj la geedzeco rajtis komenciĝi.

- Mia unua londona geedziĝo! - diris Tilla subite gaje, kvazaŭ ŝi citus berlinan klaĉon.

Lutz ŝatis la tuŝon de ŝia hararo sur sia kolo.

Revene, denove en Berlino, Tilla havis belan taskon: ekipi ilian novan hejmon. Lutz lasis ĉiun unuopan decidon al ŝi. Por li nur gravis havi siajn kvar ŝrankojn al la propra dispono. Mono en la domo ne mankis. La artisma gusto same. Sperto abundis. Baldaŭ ekpiĝis unu el la plej belaj berlinaj loĝejoj el la jaro 1930.

La nova edzo de Tilla provokis atenton de ŝia societo, ne nur per ekstera eleganteco. Vestojn li ŝatis, liaj ŝrankoj plenplenis per vestoj. Lia servisto por ĉiu vojaĝo zorgeme pakis nuancojn de liaj ŝtrumpoj kaj akordigis ilin kun silkaj tukoj en la poŝeto de liaj jakoj. Pluvmanteloj de ĉiuj tajlorstiloj harmoniis kun liaj pluvombreloj, grizaj pezaj manteloj nomataj *krombi* kunveturis kun li samkiel la brunaj el kamelharoj kaj la nigraj festmanteloj kun peltaj manumoj. Io kio definitive mankis en liaj ŝrankoj estis sportaj vestoj. Tiujn li ne toleris. El

la sportaj eventoj, li akceptis nur ĉevalojn, kiujn li nomis honestaj konkurantoj. Se li ion abomenis tio estis futbalo.

Lia servisto Georgo perfekte akordiĝis kun la opinio de la sinjoro kaj kapablis

lerte enĵeti siajn komentojn preparante por la morgaŭa tago la pantalonon kaj veŝton.

-Ĉu la sinjoro preferus morgaŭ *oksfordon* aŭ *ulsteron* por la mateno?

Li jam per palpebrumo de la sinjoro kapablis diveni pri kio la sinjoro por la morgaŭa vestoelekto decidis.

La koleginoj de Tilla rigardis lin scivole ne nur pro lia preskaŭ virina sento pri

ŝtofoj, sed ĉefe pro lia kapablo finance konsili. Ne estis sekreto, ke Tilla estis aktorino kiu plej bone kapablis investi siajn altajn honorariojn kaj ke la konsilanto estas li. Tiuj investoj estis la sekretoj de ŝia lukso.

Se oni demandus Lutz, Erwin Piscator neniam ricevus ĉekon por sia teatro. Tian specon da ludemo li ne aprobus, sed tiutempe Tilla ne konsideris liajn

konsilojn.

La unua kverelo eksplodis monaton post kiam la hejmo Durieux-Katzenellenbogen estis gastpreta . La tuta bankista societo venis gratuli. Tiu vespero malfermis la okulojn al Tilla. La bankrotiĝo venis nur unu jaron pli poste.

*Erwin Piscator (1893-1966) germana reĝisoro

LA LASTA BERLINA TEATRO

Du monatoj antaŭ la 10an de majo kiam forbrulis la judaj libroj sur la berlina placo, Tilla havis migrenon. Ŝi kverelis kun la kolegoj pro la ŝranko en ŝia garderobo. Ĉar fine, post tiom da jaroj da aktorado, ŝi ankoraŭ ne disponis pri propra ŝranko en la vestejo. Ŝiaj kostumoj pendis de diversaj fenestraj hokoj kaj ŝi decidis tion ne plu toleri. Ŝi iom troigis kaj minacis se la ŝranko ne tuj aperos, ŝi ne ludos en la tria akto. La ŝranko fine alvenis, apenaŭ post la dua akto. Ŝi tuj plenigis ĝin per siaj roboj, unu post la alia, laŭ la sinsekvo de la apero sur la scenejo. Kia plezuro ordigi!

Sed ĉe la matena provo ŝi jam trovis ke la ŝranko denove mankis. Iu bezonis ĝin aliloke. Oni ja hieraŭ alportigis ĝin nur por provizore trankviligi ŝin. Ŝiaj kostumoj denove pendis sur la fenestraj hokoj. Oni neniam vidis ŝin tiom furiozan.

-Kvazaŭ mi estus komencanto! - ŝi ekbrulis stelulvoĉe.

Tri jardekoj pasis jam de ŝia unua apero sur la scenejo.

Brunĉemizuloj, genuŝtrumpe vestitaj, kun mallongaj hartranĉoj, jam marŝis tra la urbo, kriante pri judbojkoto. Ŝia lukto por la ŝranko, estis ridinda, eta lukto por ordo kaj deco.

Berlinaj stratoj plenis de mizero kaj senlaboro, nenia miro, ke multaj lasis sin kuntiri de la fatamorganoj de Hitler. Li fariĝis kanceliero la 30an de januaro, la elektoj okazis la 5an de marto, la juda bojkoto estis anoncita por la 1a de aprilo 1933.

Tilla, kiun trankviligis nur la tria sonorilo, eliris el la vestejo. Meze de ŝia monologo, alkuris la direktoro kaj anoncis, ke la brunĉemizuloj venis

interesiĝi pri la aktorino Else kaj ŝi. Li decidis la morgaŭan tagon nuligi la teatraĵon kaj konsilis al la serĉataj aktorinoj tuj forveturi por saviĝi.

- Forveturu al Prago, multaj nun veturas tien, por eviti la interpuŝiĝon.

La teatraĵo daŭris ĝis kvarono antaŭ la dek unua. Tilla sendis en la paŭzeto meze de la akto ŝminkistinon al Lutz, kiu atendis Tilla en la hotelo.

La ŝminkistino portis etan paperon kun mallonga teksto:

- Mi petas, paku rapide la valizojn kaj estu en la trajno al Prago je la
23

horo. Mi venos al la trajno rekte el la teatro, post la lasta akto.

Lutz ne bone kaptis kial tia rapidego, sed obeis al la mesaĝo. Li ŝtopis laŭ sia

povo la vestojn el la hotela ĉambro en la valizon kaj direktiĝis al la stacidomo. Tie li staris, iom konfuzita apud la valizoj kaj rigardis al la granda horloĝo sur la fasado de la stacidomo. Tilla aperis, kun ŝminko sur la vizaĝo, kvin minutojn antaŭ la ekiro de la trajno. La kupeoj plenplenis de konataj vizaĝoj: gvidantoj de teatroj, famaj eseistoj, pentristoj, advokatoj kaj ĵurnalistoj, verkistoj.

La trajno al Dresden kaj Prago forportis el Berlino la artan kremon de la urbo.

Ducent markojn por ĉiu persono estis permesite elporti dum la eliro el la lando. La edzo mallerte pakis la valizojn. Tilla vidis ke el unu pendis la rando de ŝia noktoĉemizo. Lutz ĉiam havis servistojn kaj apenaŭ lastatempe li lernis la unuajn elementajn aferojn el la reala vivo. Ankaŭ la leciono pri portado de valizoj estis por li nova. Ke li nun elportas sian tutan havaĵon el Germanio, tion li ne konjektis. Ke li revenos kiel deportito, li imagi ne povis.

Fakte Lutz kaj Tilla jam kelkfoje parolis pri tio, ke ili devus foriri el Berlino. Sed la temon ili neniam finparolis. Kien? Ŝi proponis Usonon. Li rifuzis. La konkludo ĉiam estis forŝovita. Ŝajnis ke tamen ne urĝas. Kvankam pli kaj pli multaj homoj jam portas @kamelibandaĝon de la damo@, kiel iu sprite nomis la svastiksimbolon sur la blanka tolo ĉirkaŭ la brakmuskolo de hitleranoj.

Tilla vidis en la kupea spegulo la ŝminkon el la lasta akto sur sia vizaĝo. Ŝi lasis la ŝlosilon en la pordo de sia vestejo, kvazaŭ ŝi revenus

morgaŭ. Ŝi revenos el Prago nur por kelkaj tagoj por fini la teatran sezonon. La printepa turneo de la teatro estis ankoraŭ pasintjare antaŭvidita por Svislando, bela koincido kiu ebligos serĉadon de trankvilo en la lando sen la kamelia bandaĝo.

La enhavo de la valizoj kaj la monuoj sufiĉis por la semajnfina vizito al Prago.

Semajnfino? Per tiu foriro ŝi fakte restos dudek jarojn for de Berlino. Ŝia edzo iom malpli. GESTAPO kaptos lin en Thesaloniki en 1941 dum ilia vana klopodo atingi Turkion por fuĝi al Usono. Li mortos en iu juda hospitalo en 1943 en Germanio. Ŝi ekscios pri la morto en la ĝardeno de Zlata en 1944 tiun posttagmezon kiam ŝi enterigos la partizanajn dokumentojn enpakitaj en vinboteloj en la ĝardenan bedon.

Komence, kiel ĉiuj bonhavaj fuĝintoj, ili instalas sin en la luksan Hotelon Esplanade en Prago. Tilla lasis la akvon flui en la bankuvon kaj rigardis kurtenojn kaj tapiŝojn, en kiuj videblis la gusto de la jarcentkomenco.

Poste, dum iu ajn malfacila tempo, unue ŝi klopodos fluigi akvon en la banejo. Tio estas signo, ke eblas pensi, eblas esti pura ankoraŭ, eblas fari planojn, eĉ se misajn.

-Kien nun? Al kiu flanko? Berlino estis perdita por ĉiam. Ĉio kion ŝi havis, malaperis, kiam ŝi lasis la ŝlosilon en la serurtruo de sia teatra vestejo.

La ŝlosilo ankoraŭ surhavis spurojn de ŝiaj varmaj fingroj, la lokomotivo jam fajfis.

En la bankuvo de la Praga hotelo Esplanade estis decidite, kiam la danĝeroj iom mildiĝos, ŝi revenos el Prago al Berlino. Ŝi finludu la berlinan teatran sezonon kaj malmuntu tion kio restis el ilia hejmo post la lastaj katastrofoj pri la malliberigo de Lutz.

Ŝia edzo atendos ŝin en Svislando, ĉe geamikoj. Post la fino de la turneo ili daŭrigos kune al Ascona. De tie oni vendos ĉion vendeblan en Berlino, sen scio, ĉu eblos ricevi monon por tio. Bonŝance Erich Maria Remarque, la granda verkisto, jam post siaj famaj filmsukcesoj loĝis ĉe la Lago Maggiore. Al li Tilla vendis unu mirakle savitan van Gogh el la tempo de ŝia edzo Paul, el sia iame verdeta berlina ĉambro. Ŝi rigardis al liaj altaj brovoj, al la kvadratoj nigraj de la eleganta jako de Erich Maria Remarque

dum ili diskutis pri la prezo. Li pagos al ŝi en Svislando post kiam li sukcese prenos la pentraĵon el la berlina kaŝejo.

Fakte, pri Remarque, Tilla ne tuj komprenis, ke, kiam li forlasis Germanion, ke li foriris la unua, kaj ke aliaj artistoj sekvos lin. Post kiam lia libro *Nenio nova en la Okcidento* estis rifuzita de la plej fama germana eldonisto Fischer, ĉar *germanoj neniam plu volos ion primilitan legi*, kiel Fischer asertis, eldonis lian verkon en 1928 Ullstein Verlag. La Hollywooda versio de la filmo de Lewis Milestone atingis Berlinon en 1929, kaj estis akceptita per bojkoto. La verkisto Remarque de post la jaro 1931 radikiĝis en Svislando en la bela *Casa Monte Tabor* ĉe la svisa flanko de la lago Lago Maggiore. Nur du jarojn post li el Germanio devis fuĝi tuta aro de kulturhomoj.

Kelkajn monatojn daŭris la nescio ĉu oni sukcesos enmanigi la van Gogh-pentraĵon al Erich Maria Remarque. Jes, la plano sukcesis.

Tiel eta ero de 100 000 dolaroj kiujn la usona filmkompanio MGM investis en lian filmon *En okcidento nenio nova*, helpis al la nova vivo de Tilla kaj Lutz en Svislando.

El la disvendita vivo en Germanio venadis monbiletoj enpakitaj en sensignifajn libretojn. Ĉiu sendita katalogo enhavis ion. Ĉu ĝi sukcesos transiri la landlimon kaj eniri Svislandon?

Multaj pakafetoj sukcese venis. Kia ĝojo, povi loĝi en eta domo ĉe la lagbordo! Kelkajn monatojn da trankvilo. Lutz atendis hejme dum ŝi aktoris kaj turneis, veturante de urbo al urbo, zorgante ŝpari por konservi monon por la tempo post la turneo. Ŝiaj honorarioj tiom alten grimpis en Berlino, ke ŝi jam forgesis kion signifas ŝparado. Nun, vespere, sur la dorsa flanko de la teatraj programoj ŝi denove listigis siajn plej etajn elspezojn kaj renversis la sakenharon por trovi la monerojn kiuj elglitis en la sakfundon. Denove ŝi komencis zorge interesiĝi pri prezoj kaj ofte demandis:

- Ĉu ni povas tion permesi al ni?

Ŝi ne sciis ke la gastado en Svislando finos ŝian lastan teatran sezonon.

Fine, finiĝis la malfacila tempo de gastprezentadoj. Nun trankviliĝos la vivo. La bazan monon por la venonta tempo ili havigis. Lutz iom vigliĝis, eĉ decidis investi iom el sia etiĝinta kapitalo: li aĉetis jugoslaviajn akciojn de

aŭtobusa fabriko, por povi en Svislando ĝui ties interezojn. Li elkalkulis, ke tio estas favora. Ŝajnis ke la geedzoj trovis fiksan lokon en la neŭtrala ŝtato.

La letero, kiu venis iun matenon en la leterkeston simple informis, ke al Ludwig Katzenellenbogen oni ne plilongigos la restadpermeson en Svislando. Ŝi ja rajtis resti. Ŝin oni ne persekutis. Ŝi ne estis juda.

Kvankam dum la unuaj jaroj de ili komuna vivo, kiam ŝi apenaŭ eniris en la tedan socion de lia bankista mondo, ŝi pretis forlasi lin kaj fuĝi, sed ŝi hontis denove kirli la polvon pri sia vivo, nun, evidente, ŝi ne plu povis lasi lin.

Ŝi memoris la unuan interkverelon post la akcepto de lia bankista societo en ilia hejmo.

-Mi prefere iros *vaŝi* la vestaĵojn ol amikumi al tiuj homoj!

Anstataŭ respondo li nur levis la brovojn senhelpe. Li ne sciis ke por ŝi tiu mondo estos tiom malfacile akceptebla. Tiel, laŭ la leĝo de finaraĝitaj loĝejoj en kiu mankis plu nenu najlo, okazis ilia unua kverelo. Laŭta kaj minaca. Lavi la vestojn de aliaj. Ŝi uzis la dialektan vorton *vaŝi* por memori pri lavistinoj.

Sed ne daŭris longe la premo de la dorlotita edzino, kiu ne toleras la artistan guston de la kolegoj de la edzo. Pri lia societo ŝi ne plu havis tempon pensi. Ĉar per la forto de akvofalo ŝin inundis la realo: La bankroto de ĉiuj liaj bankoj, bierfarejoj, cementaj kaj tekstilaj fabrikoj alŝtormis paralele kun la akuzoj ke li falsis la bilancojn. Oni arestis lin. Pli granda humiliĝo apenaŭ estis imagebla.

-Kion signifas ke vi ne venos hejmen?- ŝi demandis kiam li telefone provis vane klarigi ke li estas malliberigita.

Li ripetis, ke la advokato venos por klarigi al ŝi ĉion.

Lia advokato ne havis facilan taskon prezenti la faktojn al la sinjorino. Sed tuj ŝi ekagis.

Tilla vendis ĉion por pagi advokatojn, por eltiri la edzon el la malliberejo, por operacii lian galvezikon, kiu krevis dum la procezo. El ilia novstila loĝejo por kiu ŝi rafinguste elektis ĉiun detalaĵon, sekvestristo elportis la lastan seĝon. Nokte ŝi eliris por kaŝe savelporti el la domo kelkajn pentraĵojn inkluzive tiun de van Gogh, la manĝilaron, damastajn tablotukojn, buŝtukojn, arĝentajn kuleretojn de la avo Hrdlicka, kiujn ŝi ricevis por sia

unua doto. Ŝi kaŝis ilin ĉe geamikoj, je noktomezo, kiel ŝtelisto. Matene la sekvestristo jam staris ĉe la pordo. Ŝi rigardis kiel oni malmuntas ŝian vivon. Luktis ŝi nur pri unu afero: pri ŝia ringo el knabina viana tempo, kiam la sekvestristo klopodis ŝiri ĝin de la fingro.

Post ĉio, denove al la teatro.

Ŝia voĉo post ĉiuj katastrofoj sonis kvazaŭ ŝi parolus el groto. Ŝi malfacile adaptiĝis al la vizaĝo en la spegulo de la garderobo. Ŝi ludis Lady Macbeth* kaj en la paŭzo de la teatraĵo silentis en la angulo de la vestejo rigardante al la granda nigra ringŝtono sur la dekstra montrofingro de sia mano. La mano rilatis al Lady Machbeth.

Neniam plu ŝi povos prezenti junulinojn post tiom da vivsperto.

La roloj tamen montriĝis mirindaj kuraciloj. Eniri alies vivojn, ensorbi alies katastrofojn, demeti la kostumon vespere, demeti la katastrofon. La propra ŝajnis pli eta kaj regebla.

Post kiam ŝi pagis ĉiujn advokatojn kaj kuracistojn, sanigis la galojn kaj nervojn, malmulto restis el la bonhavo. Ili loĝis en la eta bieno ekster Berlino, la sola nevendita posedaĵo kiu al ili postrestis. La bieno estis malfacile atingebla vespere, post ŝiaj teatraĵoj en la pluvaj noktoj. Foje tial ili tranoktis en berlinaj hoteloj post teatraĵo. Ankaŭ tiun nokton, kiam la fervojistoj starigis sur la unua kajo la trajnon al Prago, la edzo atendis ŝin en la hotelo. Tiel li estis facile atingebla la horon, kiam la direktoro alkuris al la scenejo kaj diris, ke la brunĉemizuloj demandis pri ŝi. Tial la edzo povis havi nur du valizojn kaj aŭtomate pretis foriri. Nenia dubo pri tio, kion necesus kunporti. Ĉion kion ili ĉehavis tiun vesperon en la hotelo.

Ŝi memoris la vizaĝojn de la kunvojaĝantoj, tiun nokton, kun malpezigitaj koroj kiam la trajno ekiris.

Iam antaŭ Dresden en la kupeon eniris armitaj junuloj kaj demandis raŭkvoĉe:

-Konfesio?

- Konfesio?

Ŝi deklaris sin katolika. Lutz protestanta. Ambaŭ ĝustis.

La junuloj ne rekonis ŝin.

El alia kupeo oni fortiris du virojn kaj elĵetis ilin el la vagono. Tiuj du, tremantaj, restis sur la kajo, dum la nokta trajno ree skuiĝis kaj ekiris en la direkton de Prago.

-Kio okazis kun tiuj du viroj restintaj sur la kajo?- pensis pri ili Tilla nokte en la lito de la sekura Svislando, monatojn poste kunligante silkajn rubandojn de la noktĉemizo sub sia mentono.

Ĉiu povis esti elŝirita el la trajno, ĉiam ajn, same kiel el la vivo. Tiu penso ne permesis al ŝi dormon.

Nenio estas pli laciga ol la devo decidi, kien iri por komenci trankvilan vivon. Kien foriri kun la edzo? Kie troveblus trankvilo? Ŝi eĉ ne kuraĝis pensi ke krom trankvilo ŝi ŝatus trovi lokon kiu rilatu al arto.

Ŝi komencis pensi kie trovi la vivon sen arto, sen kiu ŝi, ekde nun devos vivi. Ŝi estas artistino de la germana lingvo. La germana lingvo nun estas la simbolo de Hitler. Tiun identiĝon ŝi ne akceptis.

Iom tro ofte aperis en ŝiaj deziroj la vorto trankvilo.

El la gastturneo en la lasta vivojaro antaŭ ol la faŝismo forpelis ŝin al Svislando en 1933, ŝi foje ludis en Zagrebo. Plaĉis al ŝi la urbo, iom provinca, iom malriĉa, iom tro neglektita por ŝia gusto. Ŝi memoris la avon Hrdlicka, kiu ĉi tie studis juron, kiam, ĉu en 1870?

El la pespektivo de Svislando, ĝi ŝajnis provinca trankvila nesto.

Ŝi proponis Zagrebon al Lutz, kiel ŝi proponas savpajlon. Ŝi enketis ĉe iuj novkonatoj, kie eblus tie loĝi. La konato proponis peradon de la loĝejo en Zagrebo. En la humida urbo neniu sciis ke en Svislando la fama aktorino traktas pri modesta loĝejo. Kiam la loĝebleco estis trovita, ŝi ne plu longe cerbumis. Por la fuĝo ŝi elektis Zagrebon.

Pri la tiea burokratado ŝi sciis nenion. Per kelkaj fasadoj, pro la movo de kelnero dum li etendis bierglason al la sinjorino post la abunda aplaŭdo en la teatro, oni ne juĝu.

Sed ilia eta aŭto jam faris la unuajn kilometrojn en la direkto de Zagrebo. Survoje al la slava mondo ili lernis pri Honduraso, por iel rilatigi sin al la propraj pasportoj.

- Ni esperu ke Zagrebo ne havos hondurasan konsulejon. Mi preferus ne

renkonti hondurasanojn.

Do, ili unue iom enkapigu iom pri sia pasporta patrujo.

Honduraso, ili lernis kaj ne sciis ĉu plori aŭ ridi, dum ili parkeris la detalojn pri la nova lando al kiu ili nun apartenis:

112.85 m², surfaco, mono lempiro, ĉefurbo Tegucigalpa, hispana lingvo, 5 steloj sur la blanka fono de la bluranda flago, iame loĝata de Majoj, mezamerika lando, kariba, oriente de Nikaragvo, sude Salvadoro kaj Gvatemalo okcidente.

Sub la lupeo ili studis la blazonon de la ŝtato sur la unua paĝo de la pasporto por kompreni, ke kreskas pinarboj sur iuj deklivoj de la blazono. En la gazetoj ili legis ĉiun linion pri generalo Tiburcio Carias Andino, pri malpermesoj de politikaj partioj kaj sindikatoj, por perfektigi pri la politika situacio el kiu, laŭdire, ili fuĝis. Ili devis informiĝi pri la posedaĵoj de United Fruit Kompanio en Honduraso.

-Honduraso eble estas la lando kun la plej modesta literaturo en Latinameriko-legis Lutz al Tilla.

-Ĝuste tia lando savu nin.- Tilla pro iu kialo ne povis enkapigi la nomon de la preĝejo Virginia Dolore kaj la cerbo obstine volis forgesi la ĉefurbon Tegucilapa.

Ili preĝis, ke ili renkontu neniun, kiu vere devenas el tiu mondoparto.

La militaj jaroj almenaŭ ĉi-rilate estis indulgaj. Neniun el Hondouraso ili renkontis dum siaj hondurasaj jaroj en Zagrebo.

Nur post la milito Tilla komprenos ke la vera lando Honduraso montriĝis indulga al judoj: ĝi, samkiel Bolivio, akceptis dum la militaj jaroj judojn... se ilia profesio estis metiista.

Macbeth - kruela skota reĝo el la 11a jarcento, la ĉefa personeco de la samnoma tragedio de William Shakespeare

KVIN CIGAREDOJ POST BIERFAREJEOJ

La unuajn tagojn en Zagrebo ŝia edzo ne volis moviĝi el lia nova hejmo.

Li elprenis el sia valizo dosieron kun siaj bankpaperoj kaj kurbiĝis ĉe la tablo. Li, kiu pri bankaferoj sciis ĉion, nun deklaris, ke necesas severa ŝparado. Kvankam Tilla tion jam konjektis, la lasta informo sonis terure:

-Ne pli ol kvin cigaredoj tage ni rajtas. Kvin vi, kvin mi.

-Ĉu? Tiel do statas? - ŝi ridetis.

Ŝia rideto sensukcese provis eltiri lin el la deprimiĝo.

Tilla karesis la manon de Lutz. Li retiris ĝin. Por li la konscio pri nur kvin cigaredoj estis la plej suferiga leciono pri mizero, li sentis ke li mem devas elsuferi ĝin. Kiom kruelaj sekvos aliaj humiligoj, la eksa industria elitulo de Berlino ne konjektis.

-Kiam mi ligiĝis al vi, ĉiuj en la teatro min enviis pro viaj monlertoj, ne nur pro viaj bierfabrikoj, cemento, tekstilo. Mi aŭskultis komentojn plenaj je envio ankoraŭ lastatempe dum ni ekzercis Schiller. Oni enviis min pro vi, monmagiulo, kara mia.

-Sed mizeron mi konas de post mia dek kvina jaro. Ĉu vi scias, kiam mortis mia patro, ĉu mi rakontis? Ĉu mi diris al vi ke mia panjo preskaŭ freneziĝis pro malriĉo post lia morto? Ĉu mi rakontis ke li, fama kemiisto en Vieno, eksperimentis multe pri tio kiel fabriki silkon? Verŝajne jam antaŭ lia enterigo iu eniris lian laboratorion, kaj priŝtelis la rezultojn de liaj esploroj, ĉiuj tirkestoj estis malplenigitaj kiam la panjo alvenis. Oni trovis neniun spuron nek de paperoj nek de la homo kiu forportis liajn manuskriptojn. Nu, probable, estus malfacile imagi la recepton por silkproduktado preta en la tirkesto.

Mi neniam bone komprenis per kio li volis produkti silkon. El ligno?

Nu, kvin cigardoj tage, iasence estas multe, kompare al tio kion mi jam elspertis. Vi scias, dum la unuaj monatoj de mia teatra kariero post Olomouc, mi en Breslau laŭvorte malsatis. Du panetoj tage, mi tranĉis ilin en tre maldikajn pecetojn por longe maĉi ĉiun. Tio estis mia taga manĝo kaj sur la fingropinton mi kolektis la restintajn panerojn kaj lekis ilin.

Vi memoras, mi rakontis al vi, pri mia vizito al la hejmo de mia unua berlina reĝisoro, tutan tempon mi rigide tenis la kubutojn ĉe la korpo, por ke ne videblu, ke la bluzmanikoj ĉe la kubutoj estas tute travideblaj. La edzino de la reĝisoro Wolf poste fariĝis mia bona amikino, sed tiun vesperon ili ambaŭ kredis min strangulo, aŭtomato, kiu apenaŭ moviĝas. Mi premis miajn kubutojn kaj entiris la stomakon por ke ĝi ne hurlu malsate. Mi bezonis kelkajn jarojn por atingi tiun ŝtupon de la amikeco por konfesi al ili, ke mi terure malsatis tiun vesperon ĉe ili, ke dum monatoj mi ne manĝis varman manĝon kaj ke tiu fajna aro da bongustaĵoj nun servita sur la tablo antaŭ mi kapturniĝis. Nu, mi devis bridigi min, por ne vori rapide. Nur fera volo eblis

majstri mian apetiton dum tiu vespero. Mi ja akceptis la inviton ĉar mi esperis ricevi ion varman sur teleron.

Ŝajnas ke tio estis antaŭ tiom da jaroj.

- Sekve, ne zorgu! Kvin cigaredoj - kvin cigaredoj estas pli ol du bulkoj. Lukso! Aŭ? Ĉu intertempe ankaŭ la bulkokvanto estas jam fiskita?

Li silente rigardis ŝin.

-Kompreneble, plej terura afero estas, ke inter tiuj du bulkoj el la komenco de la kariero kaj nun staras viaj bierfabrikoj, viaj cementinstalaĵoj kaj miaj impresionistaj kolektoj. Kial la mono neniam volis gluiĝi al mi por iom longa tempo? Mi ĉiam rapide malsupreniras.

-Ĉu vi scias, ke Zlata rakontis al mi, ke en tiuj sudslavaj regionoj ekzistas terura malbeno. Ĝi tekstas: *Havu kaj poste malhavu.*

-Ĉu vi komprenas? Se vi tutan vivon havis ion, kaj subite malhavas tion, nur tiam vi komprenas la teruraĵon de la malhavo. Se vi tutan vivon malhavas, ne gravas, vi al kutimiĝis al du bulkoj, nenio terura. Ĉi tie, en la rakonto de Zlata la malhavado rilatis al - infano. Havu filon! Poste malhavu lin. Li mortu. Vi vidos kio estas malfeliĉo, ĉar vi spertis la delicojn de la havado.

-Havu bierfarejon. Malhavu ĝin.- tiel proksimume en via kazo.

Ĉe vi la problemo estas, ke vi ne konis nur du bulkojn. Vi ĉiam havis. Estas vero, ankaŭ mi havis foje.

-Pasis nur kelkaj jaroj post kiam mi donis tiun sumegon al Erwin Piscator.

Mi

kredis al la sukceso de lia teatro, impresis min lia teatra penso pri la teatro kiel politika esprimilo. Mi mem serĉis lin, post la teatraĵo, mi mem demandis, ĉu helpus al li mono. Kiom? Li malfacile kredis, kion mi proponis. Sed tiam mi disponis pri tiu mono. Mi havis ĝin. Kiom? 500.000. Imagu kion ni hodiaŭ povus fari per tiu mono en la poŝo. Nun venis denove la epoko de kvin cigaredoj! Sed ni elnaĝos el tio, vi vidos.

Lutz rigardis ŝin senvorte. Kaskadis ŝiaj *havu kaj ne havu*, sed ŝajne ŝia optimismo kapablas teni kandelon bruligitan. Kiel ŝi povas denove restariĝi?

Li volis lasi sin infektiĝi de ŝia bona humoro. Sed ĝi ne estis infekta malsano. Ĝi ne volis gluiĝi al li. Nur ĉe ŝi ĝi efikis. Ĉe li profundiĝis la falto super la nazo.

Ĉu Tilla aktoras optimismon? Ĉu ŝi ne montras frostiĝon de teruro? - li ne vortumis tiun frazon, sed Tilla samsekunde etendis siajn fingrojn kaj iom forte masaĝis siajn maleolojn. Ili envere frostis de mizersento.

-Do, ni luktos! Ne estas la unuan fojon!

Ŝia voĉo subite sonis kiel tiu de gimnastikinstruisto. Lutz enviis ŝin kaj ne volis tion montri. - Havi kaj malhavi! Terura blasfemo, ne pli teruran mi aŭdis.

Ŝi pensis pri sia dua edzo Paul kiam ŝi diris *malhavi* kaj la tranĉilo de disiĝo enboriĝis en la rideton.

-Se ni povus elpreni ankoraŭ ion kaŝitan el la berlina artkolekto. - ŝi suspiris.

Ŝajnas apenaŭ fareble nun, kiel atingi Berlinon, kiel poste eliri el Germanio kun la pentraĵoj?

Tilla rigardis al la portreto de sia avo, tiu *Hofrat** Hrdlicka, kiu studis juron

en Zagrebo kaj post la vienaj servoj emeritiĝis en Zemun**. Ŝi portis lian portreton de junulo kun si ĉiam dum la vojaĝo, kune kun la hejmangula krucifikso en leda skatolo. La bruno de la skatolo jam malheliĝis pro ofta portado tra la mondo. Kien ŝi venis, tie ŝi malfermis la skatolon kaj elprenis la statueton kun Jesuo. La kruco kun ruĝaj kaj bluaj artŝtonoj. Apud ĝi ŝi starigas la etan portreton de la junulo Hrdlicka. Kiam oni rigardas la portretojn de junulo tute ne videblas ke sur lia vizaĝo aperos la rideto de la vienregna konsilisto. Ĝi venis tri jardekojn poste, kunkreskis kun la lipharoj griziĝintaj.

Ne estas konate kiu tenis la penikon kiu olee pentris tiun junuleton.

Tilla

memoras la premojn de liaj genuoj dum ŝi sidis en lia sino, sesjara. La avo kaptis ŝian manon, kiu ĉiam moviĝis laŭ iu propra muzika ritmo.

- Haltu Tilinjo, rigardu tien, elflugos la birdeto! - li direktis ŝian rigardon

al la fotisto, kiu malaperis sub la nigra tolon. Ŝi aŭdis kiel tintas la glaso de la onjo, kiu enverŝis vinon al la onklo sidanta apud la avo. Neniu alia, nur Tilla rigardis al la fotisto, ĉiuj aliaj estis okupitaj pri siaj faroj. Onklo Karl rigardis kiel fluas la vino el la botelo, la panjo ion rakontis, oĉjo rigardis ŝin kaj tenis la alumeton por bruligi sian pipon. Tilla ŝatis tiun oĉjon el Budapeŝto, li havis tre dikan ĉenon sur la ventro kaj foje tiris ĝin por vidi kioma horo estas. La horloĝo elprenita el la pantalonpoŝeto faris belan tik-sonon kiam li malfermis ĝin. Tilla rigardis al la onklo, por vidi ĉu reaperos la horloĝeto el la poŝo, sed ĝi ŝajne dormis.

Ŝia lango iom ofte glitis ĉe la unua dento kaj subfosis ĝin pacience.

Ŝia unua dento tiun tagon ekmalfiksiĝis kaj ŝi volis ĉi foje mem elradikigi,

ĝin, sen ke la panjo faru la operacion. Dum la fotisto estis sub la nigra tolo, ŝajnis ke neniu atentis Tillan kaj ŝi tiris la fadenon de la silka tablotuko kiu ornamis la tablon kun la glasoj. Tio ne estis bona ideo, ĉar la tuta tuko decidis sekvi al la movo de Tilla kaj eĉ unu glaso volis postiri la fadenon.

-Kion vi faras! - oni alkriis ŝin kaj haltigis la glason el kiu jam la ruĝa maro

el vino ŝprucis ĉiudirekten. Tilla nur volis sola eltiri la denton kaj diri al panjo meti ĝin sub kusenon, ĉar se la dento tranoktas subkusene tiam leporo alportos novan denton jam matene. Alikaze oni devas longe atendi, ke la dento kresku.

Ŝi ne volis diri kial ŝi ektiris la fadenon kaj skuis ĝin for de siaj fingroj,

sed la fadeno algluĝis al la varmo de la manplato.

Ĉiam kiam ŝi vidas tiun foton el la korto de Zemun, ŝi memoras la avon kaj la verŝitan vinon kaj la sonon de la poŝhorloĝo de la onklo.

Kiom da eventoj jam mezuris tiu poŝhorloĝo kiu tiktakis en Zemun, en Aŭstro-Hungario kaj sen ŝanĝi la lokon poste en 1918 translokiĝis al Jugoslavio.

Tilla fumis sian kvaran cigaredon tiun tagon. La kvina cigaredo kuŝis

sur la tablo en la arĝenta cigaredujo de Paul, tiu kun la plej ofte desegnata floro de secesio, irido. Vesperigis en Zagrebo. La krepusko unue eniris la randojn de la glavofarmaj folioj de irido.

**Hofrat – germane: regna konsilianto*

*** Zemun – urbo proksime de Beograd*

LA DOMO DE LA EPISKOPO

La domo en la strato Jurjevska 27, estis ĉirkaŭita per impona parko.

La du virinoj staris en la ĝardeno, nudbrakaj, Zlata per la trankvilo de la bone informita muzea gvidanto, kiu sian fakon tre ŝatas, ĉenigis unu fakton al la alia:

-Tiun domon projektis en la jaro 1881 en la stilo de historismo ĉi tie fama konstruisto Kuno Weidmann. Lia plej fama konstruaĵo en la sama stilo estas la bela konstruaĵo de la Popola gazeto, nuntempe Leksikografia Instituto, ĉe la vojkruĉiĝo de la stratoj Frankopanska kaj Deĵeliĉeva.

La rigardo de Tilla vigle grimpis laŭ la dike forĝitaj feroj de la balkono. Ŝi ŝatis la kverkojn en la fono de la korto, sub kiuj la familianoj komence de la jarcento ludis kegloludon, susuris la longaj roboj de la sinjorinoj, sinjoroj en striitaj pantalonoj elegante kurbiĝis por svingi la globon. Servistoj postagmeze en la ĝardeno servis kafon kun gistaj papavfarĉaĵoj. La fraŭlinoj delikatmove riparigis siajn ŝvititajn bukletojn sur la frunto kaj premadis la fajnan punkton de siaj tuketoj. La sinjoroj elprenis el la poŝo grandajn blankajn poŝtukojn kaj frotis siajn nukojn. La servistino etendis la arĝentan sukerujon.

La rigardo iris laŭ la deklivo de la ĝardeno kiu malsupreniĝis al la proksima arbaro, kiu poste transkreskis al la montoj.

-La domo origine apartenis al la vicbanuso Jovan Jivković, prestiĝa membro

de la zagreba serba komunumo.

- Antaŭ ol ĝi estis konstruita, en tiu loko sian vinberejan domon havis fama

loka poeto Ivan de Trnski kaj de tie li rigardis en la vesperajn nubojn.

Tilla kontraŭvole ekpalpebrumis ĉiam kiam en la frazo de Zlata aperis iu slava nomo. Zlata ilin elparolis nature kiom permesis al ŝi la spirado, sen haltigo de la lango ĉe la dentoj. Tilla tute ne parolis la lingvon de sia avo Hrdlicka el Zemun ĉe Beograd. Ŝia viena hejmo aŭdis la slavan nur de ĉeĥaj servistinoj. Ŝia panjo gardis ŝin de la ideo lerni iun ajn alian lingvon krom la vianan germanan, eĉ la franca de la hugentfamilia patro estis nur sporade instruata. El ĉiuj slavaj vortoj por ŝi la plej kara estis iu magiaĵo nomata *dragiĉka!* Post ĝi regule venis bona novaĵo. Sufiĉis anonci la vorton. Diru *dragiĉka!*

-Dragiĉka!

-Diru *dragiĉka!*

-Dragiĉka!

-Nu, por ne paroli longe, en la jaro 1894 tiun domon aĉetis kaj ŝanĝkonstruis

episkopo Josip Juraj Strossmayer.

Zlata iom haltis kaj alrigardis Tillan kiel foje kiam ŝi timis ĝeni per komplikecoj de la slavaj konsontaj almontiĝantaj unu sur la alian. Sed ĉe tiu nomo Tilla ne bezonis multajn klarigojn. La nomo nek estis slava nek malproksima al ŝi.

-Episkopo Strossmayer, mia parenco! - ekkriis ŝi.

-Ĉu? La *u* en la demando de Zlata estis iom longa. - Ankaŭ la mia.

La du virinoj rigardis sin scivole.

-Tio signifas, ke ni estas parencoj! - Tilla komencis nereteneble ridi.

Ŝi tute hazarde malkovris Zlata en la teatro kaj faris el ŝi sian amikinon.

Nun malkovriĝis ke ili estas parencoj.

-En kia parenceco vi troviĝas rilate lin?

- Mi estas lia nevino. Ni nomis lin Grossonkel. Grandonklo. Avo-oĉjo!

-Lia fratino Magdalena estis mia avino. Magdalena Pupiĉ-Strossmayer

edziĝinta al barono Unukiĉ.

-Kaj vi?

-Mi ne povas respondi tiel simple. Mankas detaloj. Miaj geavoj estis geamikoj

de la episkopo. Mia avino Ana, la edzino de la avo Hrdlicka, mi ne scias ĉu estas vero... Mi povas nenion pruvi. Estas nur nebula informo.

Zlata ne lasis ke Tilla embarasiĝu.

-Pluraj onidiroj cirkulas ke la episkopo havis okulon por virina beleco kaj

ke en niaj regionoj vivas liaj posteuloj. - Tiel Zlata helpis enkonduki la padon al la temo.

- Nu, foje mi aŭdis, ke mia panjo envere havis tre moŝtan patron kaj ne la

patron Hrdlicka. Episkopon! Vi komprenas ke tiu sekreto estis kovrita per sep vualoj, kaj antaŭ la katolikaj infanoj oni ne rakontas ke episkopoj amoras. Mia panjo obstine rifuzis tuŝi tiun temon, malpermesante la ideon ke la episkopo peku, kaj des malpli ke li peku en nia familio.

Zlata ne povis retenigi la ridon.

-Mi konas la historion. Mi fieris pri mia onklo. Multaj homoj scias ke li, la

fama pastro, ĉe la Unu Vatikana Koncilo en 1870 en sia verva parolado porparolis ekumenismon. Multaj konas la fakton ke li arde ŝatis artaĵojn. Sufiĉe vaste estas distrumpetita la opinio, ke li laŭdire ne povis rezisti al la virina ĉarmo samkiel ne al iu bona pentraĵo. Virinoj ŝajne movis ĉe li pli ol la nuran estetikan gustimpulson. La klaĉoj disventis ke li patris al pluraj infanoj en nobelulaj familioj. Li estis granda artmeceno, sed li ne ŝatis nur pentraĵojn sed ankaŭ meblojn, precipe blankokoloran meblaron en siaj salonoj, blankan kokaron en la kortoj, fajnvizaĝajn blondulinojn. Tio konserviĝis pri lia gusto en

la onidiroj. Ke li ŝatis blankan meblaron kaj blankajn kokojn, mi persone memoras.

- Nu, rilate la blondecon, mia avino Ana estis blonda.

- Mi aŭdis foje en la familio ke liaj geamikoj faris al li ŝercon en iu gaja

societo, kie li gastis kaj ebriiĝis. Oni forportis lin post la diboĉado, kiam li endormiĝis ĉe la tablo, en la dormoĉambron de la baronino kaj lokis lin tie en la liton, por konsterni lin matene ĉe la vekiĝo.

- Kaj kiel vi ricevis ideon pri tio, ke li estas via avo?

- Mia panjo jam vidviniĝis kiam vizitis nin foje en Vieno iu moŝto el la

regiono de la avo Hrdicka. Li estis alta oficisto ĉe la dogano kaj lia edzino venis konsulti kuraciston en Vieno. Ili vizitis la panjon. La parolado tuŝis plurfoje iun kuracbanejon kie ili trinkis faman sanigan akvon. Estis multaj abundaj vortoj pri tiu akvo kun magnezio, kiu helpas ĉe stomakaj malsanoj, kontraŭ kramfado de muskoloj. La sinjorino ŝatis detalojn kaj priskribis miraklojn de la akvo. Dum la konversacio iu sonoritis ĉe la pordo kaj la servistino ne tuj malfermis, mia panjo senkulpiĝis kaj direktiĝi el la ĉambro por vidi kio okazas.

-Ne rakontu tiom detale. Ŝi estas la filino de la episkopo, ŝi konas la sanigan

akvon. – konsilis subite la edzo al la edzino.

-Mi estis en la apuda ĉambro, ĉe la pordo malantaŭ ilia dorso, ankaŭ mi volis iri vidi kial la servistino ne reagis al la sonorado kaj subite kontraŭvole aŭdis ĉion malantaŭ ilia dorso.

-Estas vere ĝentile ke ŝi havas sur la muro la portreton de la avo Hrdicka, li ja

donis la nomon se ne la infanon al la familio.

La sinjoro silentiĝis kaj ĝentile atendis la revenon de mia panjo en la salonon. Mi fingropinte retiriĝis kaj lasis la pordon duonfermitan. Nenio pli audiĝis.

Tuj kiam ili metis gantojn por adiaŭui, mi estis preta demandi la panjon.

Ŝi revenis, kontenta ke la teduloj ne longe ĝenis kaj aliris la tablon por sonorigi al la servistino. La kukteleroj post la gastoj ankoraŭ kuŝis sur la tablo, mi jam rapidis per mia demando:

- Panjo, kial la sinjoro diris ke vi estas filino de episkopo?

Ŝi vangofrapis min tiom rapide ke mi ne sukcesis retiriĝi. Ŝiaj ungoj ektranĉis mian haŭton. Mi ekkriis.

-Vi rajtas neniam diri tian blasfemon.

-Ne mi diris, la sinjoro diris.

Mi metis la manon sur la vangon, kiu brulis.

-Vi miskomprenis ion. Estas vero, ke nia familio havis amikon episkopon. La episkopo Strossmayer estis la amiko de viaj geavoj. - ŝi estis digna kaj ne allasis skandalojn al la familio.

Kaj por aldoni ke la episkopo nenion sekretumis en nia familio ŝi aldonis:

-Kaj li venadis el Djakovo al ni en Zemun per dupara ĉevalkaleŝo kiun li mem ŝatis stiri, belaj, blankaj Lipica*-ĉevaloj.

Tiam la panjo ordonis ke mi metu iom da brando sur la vizaĝan vundon. Mi obstine ne volis obei. Tiun recepton pri la brandobandaĝo sur la vundo oni flegis el la epoko de la avo Hrdlicka en la hejmo.

Mi sentis ke tio estas mia lasta interparolado pri la episkopo kun ŝi kaj mi volis aŭdi ankoraŭ ion, sed mi ne kuraĝis demandi ĉu la panjo iam vidis la episkopon? Pri la episkopo ŝi menciis neniam plu.

- Venu vidi ion.

Zlata haltis en la koridoro antaŭ la metala pendigilo por ŝlosiloj sur kiu pendis impona ŝlosilbukedo. Ŝi longe selektadis kaj elektis iun kurban.

Ili grimpis al la supra etaĝo, kie Tilla ankoraŭ ne vizitis ĉiujn ejojn. Zlata malŝlosis la pordon.

-Tio estas nia hejma salono Strossmayer. Tion ni heredis post lia

forpaso en Djakovo, en 1905.

La muroj plenis de portretoj.

La viena portretisto Franz Schrotzberg pentris la junan episkopon en la jaro 1850. La grandaj okuloj rigardis al Tilla super la blanka kolumo de la ornato. La lipoj kunpremitaj.

-Li junis ĉi tie!

-Tiu jaro estis grava por li! Li estis nomumita por episkopo en la regiono Bosnio-Sirmio. La nomumon prezentis la kroata banuso Josip Jelaĉi', tiu ĉe kies bronza ĉevalo renkontiĝas ĉiuj generacioj de zagrebanoj. Apogis la nomumon la grafo Leo Thun tiutempa ministro pri dioestimo kaj edukado.

-Mi ŝatas viajn esprimojn! Banuso, dioestimo...

-Banuso estas kroata vicreĝo.- faciligis la komprenadon Zlata.

Ŝi havis tre belajn dentojn kiam ŝi rakontis la vivon de la episkopo, kiun

ŝi dum la tuta vivo nomis Grossonkel.

-La pentraĵojn alportis iu monaĥo iun tagon. Li havis la korespondaĵon de Strossmayer en du pezaj valizoj. Fiakro alveturigis tion.

-Vidu, tiun oleaĵon pentris Franjo Dresy, kiam la 26an de septembro 1850

la estonta episkopo venis en sian hejmurbon Osijek, kelkajn tagojn antaŭ la nomumo por episkopo.

-Sed lian plej belan portreton faris Vlaho Bukovac en 1892. La granda

pentristo de Dubrovnik foje dum plena semajno gastis kun sia edzino ĉe la episkopo en Djakovo. Tiam la episkopo pozis.

-Ĉu vi memoras lin?

-Jes, li venadis al ni. Mi memoras la manplaton sur mia hararo.

Li bene

karegis nin etulojn. Li ŝatis manĝi, li ĝuis vinon, la servistinoj rapide kuris kiam oni anoncis ke la Grossoĉjo venos. Ili rapidis briligis la arĝentaĵojn de la domo kaj por trovi asparagojn por la supo kaj batis pintojn de blanka ŝaumkremo. Vidu, eĉ lia sparagosupo estis blankkolora, do ĝustas la rakonto, pri la blankkolora gusto.

-Mia avino mortsigelis ĉiun respondon. Ŝi ne permesus paroli pri io misa rilate lin.

-Se ŝi povus vidi lin nun, post tiom da jardekoj, sidanta en sia episkopa talaro en la parko: Flankaj haroj de la skulptaĵo hirtitaj, la kapmezo jam iom kalviĝinta.

-Eble li ŝatus povi karesi nin iom pli ofte dum ni etis.

-Kaj tiuj severmoraj avinjoj neniom flustris pri li, en neniuj febro, ĉe neniuj mortolito.

-Amoroj kaj naskoj estis ĉiam malpermesataj en mia familio. Mi memoras, foje en Berlino iu ofendita spektanto alportis al la teatraĵo de Hauptmann la naskotenajlon, tiun iaman helpilon de la kuracistoj dum malfacilaj naskoj. Nu, la ulo svingis per la tenaĵo, ĉar ĝenis lin, ke iu el la rolulinoj, laŭ la postulo de la teksto, naskis malantaŭ la scenejo.

-Kompreneble, ankaŭ min ĉi monden alportis cikonio.

-Mi iomete miris, kiel mi naskiĝis vintre, ĉu cikonioj ne formigris al Egiptio, sed ŝajne iu restis deĵori por disporti la vintrajn infanojn.

-Estis tiom da demandoj pri kiuj oni ne rajtis vortumi la penson.

-Vidu, ĉi tiun portreton de lia panjo, tion ŝatis Strossmayer.

Pentris ŝin

Georg Waldmueller en Vieno. Ŝi nomiĝis Ana. Kun unu @n@ ĉe ni. Ŝia familia nomo estis Erdeljac.

-Ni ĉiuj sciis, ke la episkopo multe ŝatas tiun Biedermeier**-portreton de sia panjo.

Tilla iom forpromenis por vidi la portreton el la alia angulo, en la ĝusta sunlumo.

-Vi aŭ mi povus iom simili al ŝi.

La kato de Zlata intertempe grimpis en la sinon de Tilla kaj kunobservis la portreton. Tilla karesis ĝin ĉe la nuko. Ŝi konis trukojn por ronronigi la katon.

-Mi havis tiom da bestoj en Berlino. Mi ŝategis ilin, hundojn, katojn,

papagojn, ho, tiun kiu parolis kaj tiu kiu parolis nur por embarasigi min. Paul estis tre bona amiko de la pentristo Gaul, li ŝatis fari bestojn, mi havis tutan serion da liaj bestoj, teraj kaj maraj, moviĝantaj, mi ŝatas observi ilin dum la moviĝo. Gaul estis vera majstro de bestarto. Tiu deko en via ĉambro estas nur restaĵo de mia bestkolekto.

Tilla karesis la katon kaj ŝiaj pensoj forvadis. La pensoj de Zlata ne foriris de Strossmayer.

-Ni havis nur unu katon en la tuta kolekto Strossmayer. Ĝi estas la egipta kato el la 18a dinastio, mi poste eksciis, sed fakte mi konas ĝin de miaj unuaj eniroj en tiun ĉambron, ŝajne la grandocĵo alportis ĝin al ni dum ni estis etaj. Oni frue klarigis al ni ke egiptoj ŝategis katojn. Mi junaĝe komprenis, ke egiptoj balsamis la katojn, kaj kredis ke ili estas diaĵoj.

La bronza kato je tiu punkto iom pli forte pintigis la orelojn. Ĝiaj okuloj fiksiĝis al tiu vivanta kato kiu ronronis en la sino de la gastino. Ĝi volus koni pli pri sia hejmlando, kie ĝi estis diaĵo. Sed nun dum jardekoj ĝi jam vivas en tiu mizera provinco en la ĉambro kun tri portretoj de la episkopo.

- Kiel venis tiu egipta kato? - volis ekscii Tilla.

- Mi havas neniun ideon, mi trovis ĝin denaske en la hejmo. Mi persone akceptis por la kolekto nur tiun lastan objekton de la episkopo, lian ornaton. Kaj la korespondaĵon. Ĉio alia jam troviĝis en la hejmo kiam mi naskiĝis.

-Vidu, kiom mia panjo ŝategis lin.

Zlata eltiris el la ŝranko grizan albumon. Kaligrafe sur la titolpaĝo desegnita lia nomo sur la unua paĝo. *La episkopo de la episkopoj.*

-La panjo eltranĉis ĉiun tekston kiun ŝi trovis pri li. La aranĝo de la albumo estis tohuvaboheska.

Tilla eklegis.

Meritoplana kroato kaj la monda personeco, kiu fascinis siajn

samtempulojn per forto de la historia vizio, la homo kiu tra la 19a jarcento marŝis per grandaj paŝoj, starigante rigardejon al la dudeka jarcento. Li estis la fondinto, konstruinto kaj la malavara aŭspicianto de la plej grandaj naciaj kaj klerigaj insitucioj.

La rigardo de Tilla rapide glitis:

La 4an de ferbuaro 1815, edzino de la analfabeta ĉevalkomercisto Ivan Strossmayer. Tie mankis la fino de la frazo.

Ivan devenis de Paul Strossmayer, kiu kiel soldato venis el Linz kaj edziĝis en Osijek. Lia familio postlasis multajn familiajn branĉojn kaj baldaŭ kroatiĝis.

La panjo Albertina per sia pinta skribo citis la politikiston Marco Mighetti sur iu paĝo: *Ekzistas nur du homoj antaŭ kiuj mi havis la impreson ke ili apartenas al la alia speco ol ni aliaj. Tiuj du estis Bismarck kaj Strossmayer.*

Meze de la albumo ŝi decidis fari ordon en lian vivon kaj grupigis la artikolojn al - politiko, kulturo, preĝeja vivo, sociaj rilatoj.

Fondinto de la Akademio kaj universitato, konstruisto de la katedralo en Djakovo, literatura meceno - gvidanto de la tuta kleriga laboro en Kroatio. Du popolkantoj kiujn li ŝatis kaj tri fabloj de Ezopo gluitaj.

Li estis ofte sur la titolpaĝoj de eŭropaj kaj usonaj gazetoj. La frazo pendis gluita tra la tuta paĝo. De kie ŝi eltranĉis ĝin?

La unua doktoriĝo en Budapeŝto, la dua en Vieno. Ĉiujn ekzamenojn li sukcesis per la plej bona noto. Li devis transpreni la katedron pri dogmatiko en la Universitato de Budapeŝto kaj poste lia profesoro el Vieno Feigerle, invitis, li fariĝis la korta kapelano.

Artikolo sen kapo kaj vosto.

Kaptis lin iluzio pri aŭstro-slavismo de Monarĥio. Slavoj de

Okcidento premitaj de la Germanoj, Slavoj de oriento premitaj de la Cara Rusio devus transformi Aŭstrion en konfederacion de egalrajtaj popoloj en kiuj slavoj havos la decidan vorton.

-Vidu tiun eraron!

Strossmayer estis patro, skribis la mano de Albertina kaj rapide korektis patron al pastro. Strossmayer estis pastro kiu ne apartenis al la kroataj maldekstruloj sed la rajton je la propraj konvinkoj li defendis la tutan vivon.

Tilla ridetis pri la eraro kiu ŝtoniĝis tra jardekoj sur la papero.

La plej granda tasko de Sudslavoj estas asociiĝi, harmoniĝi, uniĝi.

Cent jarojn antaŭ la Dua Vatikana Koncilo Strossmayer estis batalanto por toleremo.

Charmulo de rara socia altiro, kun manieroj de grandsinjoro, kiu disdonis milojn da stipendioj. Vortriĉa kaj parolrapida en la latina, germana kaj franca.

Franciskana gimnazio en Osijek, seminario en Djakovo, kun 18 jaroj al Budapeŝto por studi teologion. Nacia vekiĝo en Eŭropo. Post kvar jaroj li revenis el Peŝto, kiel doktoro pri filozofio. Kapelano en Petrovaradin. Lia peto daŭrigi la studojn en Vieno aprobita. Augustineum. Doktoriĝis pri teologio. El Vieno li revenis al Djakovo. Vizitadis festojn kaj foirojn. Reĝkorta kapelano en Vieno.

Vieno tiutempe estis renkontiĝejo de gvidaj reprezentantoj de Ĉeĥoj, Slovakoj, Serboj, Slovenoj, Kroatoj. Li kontaktis kun Palacky, Rieger, Ŝafarik, Karadži'. Ŝatis vojaĝi. Vieno, Budapeŝto, Romo, Karlovy Vary.

Mi petas luan por mi du ĉambrojn en la unua etaĝo kaj unu por mia servisto.

Por la vorto etaĝo li uzis la vorton planko, legeblis en iu tekstero.

La franca katolika ĵurnalo L' Univers akuzis lin ke li la monon de la preĝejo uzas por nepreĝejaj celoj sed li refutis ke li nur redonas al la popolo la popolan.

Amiko de ortodoksa pastraro en Serbio.

Centra figuro de proksimiĝo de Sudslavoj.

Suspektata pro klopodo de aproksimigo de Oriento kaj Okcidento.

Konserviĝema socie, malnovstila en la arto, kiam impresionistoj jam

konkeris la mondon...

Tilla ridetis al la lasta frazo kaj redonis la albumon al Zlata.

Sekigita kvarfolio restis al ŝi en la sino. Ĉe kiu paĝo ĝi kuŝis?

- Ĉu vi neniam vizitis lin?

-Ho, ni faris. Tiom da bestoj en la korto! Kaj blankaj Lipica-ĉevaloj en

la staloj. Min impresis la rakonto de la servisto ke musteloj loĝas en la lignejo kaj ke ili fekas en la formo de lia monogramo S. Estis skandalo kiam mia panjo aŭdis ke mi ripetis la vortumon kiun mi aŭdis de iu fripona servisto en la korto kaj alportis la lingvan akiraĵon al Zagrebo.

Li ŝategis nin, li ludis kun ni, li rakontis kiel li veturis al Venecio por

aĉeti pentraĵojn kaj estis terura pluvego kaj fulmotondro kaj la servisto portis lin sur la ŝultroj trans la akvokovritaj stratoj ĝis la hotelo.

-Ĉu vi povas imagi? La nigra robo de la episkopo ĉirkaŭ la ŝultroj de la

servisto kaj la du kruroj pendas de la brusto. Kaj fulmotondroj super li.

-Ni ŝatis tiun scenon. Sed ankaŭ liajn donacojn Kristnaske.

Albert

ricevis binoklon, Mary dominon kun punktetoj el sedefo sed ŝi preferis mian porcelanan pupon kun longaj okulharoj. Ŝin malgajigis la observo de la panjo ke ŝi ne plu devus pupumi.

-Kiam ni lastfoje estis ĉe li, la panjo ricevis de li la kuleretojn per kiuj vi hieraŭ manĝis framban kremon.

-Tiu en la formo de la konko?- Tilla memoris kiel la lango palpas la

konkan reliefon.

-Kiam ni ludis dominon kun li, li lasis sin malvenki. Ni ĝuis. Oni

diris

al ni ke kiam li naskiĝis li havis ĝemelan fraton kiu baldaŭ mortis. La gepatroj ne bone sciis ĉu mortis la knabo Juraj aŭ la knabo Josip ĉar ili tre similis. Tiel li ricevis ambaŭ nomojn.

-Vidu!

Zlata malfermis ŝrankon kaj montris monton da leteroj binditaj.

-Miloj da leteroj. Pli ol mil sendis al li mia patrino. Ŝi ŝategis lin

kaj

konsultiĝis kun li pri ĉio. Kion kreskigi en kiu kampo de la bieno, kiel kuracadi porkojn, kiun spicon aldoni al farĉaĵo de la kolbasoj ĉi vintre. Li ricevadis informojn kio kreskas sur kiubedo en la ĝardeno kaj kian spritaĵon la infanoj diris lastsemajne.

Zlata repuŝis la albumon en la ŝrankon kaj iris ĝis la ornato. Ĝi staris fiksita sur iu ligna modelo nomata pupo, kvazaŭ la posedanto zorge demetus ĝin por revesti ĝin morgaŭ. Li volis eviti tro oftan gladadon kaj tial la ĉambristo havis la taskon zorgeme ordigi la talaron sur la ilon.

Zlata aliris la talaron kaj palpis en la falto de la digna vesto. Ŝi eltiris kelkajn

sekajn foliojn.

-Mi klopodas tiun veston konservi de la tineoj. Mi ne scias, ĉu miaj nuksofolioj helpas ke la tineoj evitu ĝin, sed mi foje remetas freŝajn foliojn de juglanda arbo sub lian veston.

Tilla senvorte rigardis kiel Zlata fosas en la faltoj. La pasio reduktiĝas

al defendo kontraŭ tineoj.

Ankaŭ Tilla prenis juglandan folion kaj flaris ĝin. Ŝi flaris ĝin refoje.

Je kio ĝi memorigas? Ŝi frotis la manpaltojn, la folio lasis flavverdajn makulojn.

Ŝi enspiris profunde la odoron por revoki la memorojn. De kie ĝi konas la odoron? La memoro rifuzis prezentiĝi.

Tilla staris kaj atendis, frotante la ĉifitan folion inter siaj fingroj.

Nenio okazis. La malapero de la memoro estis pli obstina ol la volo revoki ĝin.

.....
Lipica* loko en Slovenio kie oni bredas la noblajn Lipica-
ĉevalojn, origine bredita por la kortego en Vieno

** Biedermeier – arta stilo en Mezŭropo meze de la 19a jarcento

LA ALBUMO PRI LA EPISKOPO

Loze ekster la albumo, evidente enmetita, post kiam la mano de la panjo Albertina ne plu tuŝis la albumon, estis la kopio de la statuo pri Strossmeyer de Vatroslav Donegani. *Marmoro el Carrara, Romo, 1865.* Nenio pli estis notita sur la foto de la impresdona skulptaĵo. Marmora kruco ĉe lia brusto.

La alia foto prezentas la preĝseĝon de J.J. Strossmyer, en ĉizita ligno, kun du ovalaj pentraĵoj kaj la blazono kun lia vivdevizo *Ĉion por la kredo kaj la patrujo.*

Sur la tria folio staris la olea portreto de J.J. Strossmayer de F. Muecke.

Ankaŭ pala foto videblis.

Nekonata fotisto eniris la ĉambron en Djakovo, kie kuŝis la episkopo sur la mortolito. Pro iu kialo oni etendigis la mortan korpon de la episkopo sur

la longan seĝon-divanon. Neniaj floroj, neniaj kandeloj. Li kuŝis pupece, en pantofleske broditaj ŝuoj, kun unu mano levita. En ĝin oni sukcesis ĝustatempe enmeti la krucon kaj la morta mano tenas ĝin tiel kiel ĝin tenas pupo en la montrofrenestro.

Li kuŝis apud la fenestro, la blankeca lumo alvenas de la ekstero kaj prilumas lin. Liaj blankaj punktoj preskaŭ tuŝas la ŝuojn. La punktoj aspektas plej vivece. Tri seĝoj videblas ĉe la muro. Ili apogiloj memorigas vilaĝajn seĝojn kun koroforma dorso. Ili elvokas la vivon. La kavaj vangoj de la mortinto montris ke mortis maljuna homo al kiu ne plu multaj jaroj ĝis la centa mankis.

Tilla neniam vidis kelkajn paĝojn kiujn verŝajne Zlata enmetis ĉe la fino de la albumo. La paĝoj estis en la angla, tajpitaj sur travebla papero. Zlata trovis ilin kelkajn jarojn antaŭ sia morto en aprilo 1969. Skribis ilin Rebecca West en *Nigra ŝafido, griza falko*, la plej bela vojaĝlibro en la angla lingvo, publikigita en 1941.

La paperfasko portas la nomon Zagreb VII.

Sur la paĝo 107 mankas komencaj linioj.

-Ni neniam vidis la statuon de Meštrović pri la granda kroata patrioto episkopo Strossmayer, ĝi estas en la publika parko, ĝuste transe de nia hotelo. Ni iru vidi ĝin nun. - diris mia edzo. Ni vestis nin, pardonpetis al la purigistino kiu purigis la koridoron kaj trovis la episkopon inter malhelaj arbustoj de la nelumita mateno. Lia beleco estis la nura lumo.

- Sufiĉe da historio! Zlata forprenis la albumon el la mano de Tilla. Sube en la salono Zlata enverŝis griotan likvoron en du kristalajn glasojn.

La likvoro bonvenis. La morgaŭan tagon venos du leteroj el Germanio. Unu kiu sciigas ke Tilla ŝuldas imposton kaj ke ŝi devas pagi ĝin tuj en la germana konsulejo en Zagrebo. La persono kiun ŝi pro sia impostproblemo devus kontakti nomiĝis Goering. Tiu nomo ne plibeligis la aferon.

Nokte ŝi ne povis dormi pro nervoziĝo. Ŝi decidis deklari ke ŝi ne havas enspezojn kaj petos nuligon de la pago. Kun ĉiu turno en la lito ŝi aliel vortumis la peton pri nepago. Fine venis la mateno. Kun ŝtono en la stomako

ŝi direktiĝis al la sinjoro Goering. Peze ŝi tiris siajn piedojn tra la ŝtuparo. Montriĝis ke tiu Goering estis simpatia oficisto, kiu kredis al ŝiaj rakontoj ke la geedzoj nun ne havas sufiĉan enspezon. Tilla flugis hejmen por ĉirkaŭbraki Lutz. Feliĉo estis – ne devi rilati al Goering.

Ŝi ŝatis tiun senton de saviĝo. Saviĝo... ĝis la venonta imposttago.

Alia letero de amikino enhavis la sciigon ke la foto de Tilla aperis en la gazeto, sur la paĝo de nedezirataj personoj. Tilla preferus kredi ke Germanio estas sep oceanojn malantaŭ ŝi. Sed ne estis tiel.

Ŝi volis kredi al la zagreba rifuĝejo. Zlata rakontis al ŝi ke el Zagrebo fuĝis aro da homoj al la Okcidento, en ĉiuj epokoj. Pro politikaj kaj ekonomaj kialoj, pro arto, pro amserĉo. Tilla nun konsideris ĝin sia hejmo.

Zlata ne forgesis diri ke kelkaj personoj tamen antaŭ Tilla ekloĝis ĉi tie. Ne ĉiuj fuĝis el ĝi.

- Ĉu vi scias, ke vi ne estas la sola berlina artistino kiu loĝas en Zagrebo.
- Kiu? scivolis Tilla. – De kio ŝi devis fuĝi?
- Tiu tute ne fuĝis. Ŝi venis, renkontis iun kaj restis.
- Amafero. Ne mirinde. Ne mirinde se oni fuĝus el Berlino pro ĝi.

Zlata portis sian kafotason al la buŝo, englutis kelkajn gutojn kaj rakontis:

- Estis la jaro 1834, berlina kortkantistino Ennes gastis en Zagrebo.

La grafa

familio Erdödy invitis ŝin hejmen por prezenti al ŝi sian fillinon Sidonija. Sidonija kun grandaj promesoj lernis kantadon. Ennes tiom entuziasmiĝis pri la kantarto de Sidonija, ke ŝi restis kelkajn monatojn por instrui al ŝi kantadon. Sidonija Rubido Erdödy - Bakacs estis la plena nomo de la kantistino. Ŝi estis la unua persono kiu publike koncertis per kroatingva kantado. Antaŭ ŝi oni ĉiam kantis germane. Kanti kroate estis io neimagebla, provinceska.

Tilla ĉarme ridis je tiu sciigo, ke la kortkantistino helpis forpeli la germanan el la kultura vivo de Kroatio.

- Nu, jes, komponisto Livadić komponis por ŝi la unuan kanton.
Aplaŭdoj

de la entuziasma publiko ne volis ĉesi. Tiam Sidonija decidis aldoni la duan kanton. Tio estis la premiero de la fama kanto *Ankoraŭ Kroatio ne pereis*, vi aŭdis ĝin.

Zlata per la kafkulereto en la mano diktis ritmon kaj kantis al Tilla la faman kroatan rekantaĵon.

Por Sidonija estis verkita la unua kroata opero, tiu de Vatroslav Lisinski *Amo kaj malico*.

Ennes revene al Berlino kunportis la notojn de Sidonija.

Sidonija staris ĉe la komenco de la kroata nacia liberiĝo, politikistoj uzis ŝin por entuziasmigi la popolon por politikaj celoj.

Tilla ŝatis la rakontojn de Zlata, ili sukcesis forpeli la zorgojn de Tilla dum kelkaj minutoj. Sed la zorgoj revenis, hantante.

HOTELESTRINO

Kvankam Tilla de siaj posttagmezoj kun Zlata regule revenadis al Lutz en la hejmo de la familio Kunari, baldaŭ ili devis denove paki.

La studento de la familio Kunari revenis el Vieno al Zagrebo kaj volis rehavi sian loĝejon. Kun bedaŭro sinjorino Kunari anoncis al siaj gastoj-luantoj ke ne plu eblos plilongigi la loĝkontrakton. Tilla devos serĉi novan adreson por si kaj Lutz.

Tilla jam konis la fonon de la rakonto. La juna filo revenis ne ĉar ne plu plaĉis al li studado en Vieno sed pro timo. Persekutis lin la frato de iu viena fraŭlino al kiu la juna zagrebano inklinitis. Tilla vidis la junan studenton kiam li alvojaĝis kun la bandaĝita ŝultro. Temis pri revolverpafo, kiu, bonŝance, ne estis sufiĉe preciza. Tia onidiro cirkulis en la urbo.

Oficiale li elradikigis la ŝultron ĉe skiado. Informoj de tiaspeco povis en Zagrebo malfacile kaŝiĝi.

Zlata rapidis proponi al Tilla veni kun Lutz loĝi en ŝia domo. Tilla ja ĉiukaze ofte pasigis siajn posttagmezojn en la domo de Zlata. Lutz ne grumblis. Tiutempe li jam denove bankrotiĝis ĉar la aŭtobusa entrepreno kies akciojn li havigis en Svislando, montriĝis ne tro ruza investo: li denove perdis. La pakado okazis rapide. Baldaŭ ili jam muntis sian bibliotekon sub la tegmento de Zlata.

Lutz malkovris pri kio li lastatempe cerbumis. Kun sia partnero, la sama kun kiu li jam foje bankrotiĝis pri la aŭtobusa kompanio, li decidis transpreni la gvidadon de iu hotelo en Abbazia, la Adriatika urbo, tiuepoke sub la itala regado. Opatija, tiel kroate nomis la urbon Zlata. Al Tilla ne necesis multe rakonti pri Opatija. Al ŝi la ideo denove kunlabori kun Kertner ne plaĉis, sed al Opatija ŝi ne povis rezisti. Kun Zlata ŝi jam foje ekskursis tien, al Italio, kaj ravis ŝin la odoro de la salo dum la promenado apudmara ĉe la malnovaj vilaoj. En ŝi tie vekiĝis viananino. Opatija sub la nomo Abbazia ekde ŝia infanaĝo estis la ĉefripozejo de la viena elitularo.

Kiam ŝi venis kun Lutz, kun la vizoj en siaj hondurasaj pasportoj, por inspekti la hotelon pri kiu ili traktis, ŝi devis tuj forgesi pri la imago pri habsburga feriloko, kiu treniĝis en ŝia memoro. La hotelo kiu portis la nomon

Kristalo nun estis cimejo. La kristalaj lampoj kiuj donis al ĝi la nomon, estis kovritaj per muŝfekaĵoj, la maraj ventoj forlekis la koloron de la fenestraj kadroj. La tapiŝoj griziĝis truigitaj per la ŝuoj el iuj epokoj pli feliĉaj.

Sed Tilla ne hezitis. Fatala virino, heroino, kokoto kaj martirino suprenruligis la manikojn kaj transformiĝis al hotelestrino. Ek!

Tilla dungis purigistinojn sed ĉio marŝis pli bone kiam ŝi mem surmetis laborkitelon. Ŝi sciis kion ŝi volis. El tiu velka trablovejo post kelkaj semajnoj da murkolorigado elkreskis Cristallo, la plej alloga hotelo de Opatija.

Ĉiuj 103 ĉambroj baldaŭ pleniĝis. Opatija estis fama. Sed ne plenis la hotelon simplaj feriantoj. Venadis ĉefe judaj travojaĝantoj klopodantaj forlasi Eŭropon per la itala vojo.

Kiam diskoniĝis, ke la germana aktorino Tilla Durieux estras la hotelon, tio eĉ pli plenis ĝin.

La venontan vintron Tilla kaj Lutz pasigis en Budapeŝto, kie li en sulfuraj turkaj banejoj kuracis sian reumatismon. De tie ŝi ĝoje akceptis inviton de iu jam forgesita parenco gastprelegi en Teatra Akademio en Aŭstrio. Senfine mankis al ŝi teatro. La suferon ŝi ne povis vortumi. Ŝi suferis ĉar la germana fariĝis nur la germana de Hitler.

Revene hejmen, en Opatija, Lutz informis, tre pretere, kiel negravaĵo, ke la polico forprenis lian hondurasan pasporton dum ŝi estis for en Aŭstrio. Ili volis nur kontroli ion kaj redonis ĝin. Temis nur pri iu kontrolo, li ripetadis naive, dum Tilla klopodis kaŝi konsternon el siaj okuloj.

Zlata, kiu venis gaste al Opatija, informis ke en Zagrebo oni en la Nacia Teatro starigis la buston de tro frue mortinta aktoro, Josip Papić. Tilla kun plezuro aŭdis ke pri la granda aktoro parolis alia fama aktoro Dubravko Dujšin. Josip Papić estis judo. Se oni starigis buston al li en la ĉefa teatro, la zagrebaj judoj fartas bone. Tilla konkludis tro rapide pri la avantaĝoj de Zagrebo. Venontfrazo Zlata, rakontante pri la eventoj en Zagrebo, diris ke en la strato Zvonimirova sur la judaj vendejoj aperis anonco @Atentu: judo! - Ne aĉetu!@

Zlata havis ankoraŭ da bonaj novaĵoj: aperis ordono, subskribita de Danijel Crljen, @la eta kroata Goebbels@ ke je certa horo ĉiuj mezlernejoj aperu en lastadiono Maksimir. Tie oni vortumis la ordonon:

-Judoj elpaŝu!

La unuaj junuloj komencis transiri.

- Ni ĉiuj iru! La tuta junularo transiris al la flanko de judoj. Tiutage neniu

estis arestita. La polica ne estis preta por tia subteno.

Tilla memoris pri @judinoj for@ , la slogano kiu forpelis ŝin. La fakto ke oni, se nur provizore, forprenis la pasporton de Lutz signifas ke li ne plu estas sekura ĉi tie, en la itala Abbazia.

Tilla ordonis tujan pakadon. En Opatija ne plu eblas vivi. Tie ili estas tro okulfrapaj.

Kien fuĝi? Provi al Svisio denove?

Ili pendolis ankoraŭ kelkajn semajnojn inter Zagrebo kaj Italio. Tiam Lutz informis ŝin, ke li konsentas ke ili foriru al Usono. Tiel estis akirita ŝia granda venko. Li rifuzadis tion ekde lia tempo kiam ŝi proponis tion la unuan fojon en Berlino, multan tempon antaŭ ol ekiris la trajno al Prago.

- Mi pensas ke mi devas decidi akcepti vian konsilon, ni devos foriri al Usono.

Por li tio estis granda kapitulacio. Tilla glutis grumblojn. Estis jam januaro 1941, ne plu estis facile elmigri el Eŭropo. Se li almenaŭ dirus tion pli frue!

Necesis esplori.

La eksedzino de Lutz Estella en Svislando engaĝiĝis por zorgi pri iliaj vojaĝbiletoj kaj por havigo de garantimono. Sed ĉiuj kiuj intencis jam foriris. Nuntempe oni ne plu permesis elmigradon tra Italio. Eblis nur tra Turkio. Por atingi Turkion necesis turka kaj greka vizoj, unu dependanta de la alia.

Zlata helpas per siaj kontaktpersonoj en Beograd pri havigo de vizoj. Komenciĝis la pakado el la strato Jurjevska. Lasi ĉi tie la artaĵojn, preni nur la ĉefaĵojn. Malgraŭ ke ili reciproke ripetadis al si tiun frazon, iel tamen amasiĝis

11 valizoj, pretaj por forlasi Zagrebon. De du eŭropaj vivoj kaj de kvar diversaj geedzeco, du ŝiaj, unu lia, unu komuna, la valizoj pufiĝis.

FUĜO AL USONO

La du hondurasanoj, kiuj portempe loĝis en Jugoslavio kaj en marto 1941 decidis elmigri al Usono, rapide pakis. La vesperoj kun Vlasta kaj Boris, la infanoj de Zlata, fariĝis pasintecaj.

Lutz vidis ke Tilla sen teatro suferas kaj la domo de Zlata almenaŭ iel rilatis al la arto. Sed tien kien ili nun iras, kio atendas ilin?

-Kion fari Lutz? Mi estas la aktoro kiu perdis sian lingvon. Kiel ludi nun en la germana? La ambicio de Hitler senigis min je teatro. Mi estas superflua. Ne pro mia juda edzo mi devis fuĝi. Mi devis fuĝi ĉar mia lingvo ne plu havas publikon.

Iu frapis la ĉefpordon. Tie sonorilo tre malbone funkciis. Ĉe la pordo la eksedzo de Zlata, tiu sinjoro kiun ĉiuj servistoj nomis Grafo Lubienski. Post la eksedziĝo li ekloĝis en Slovenio kaj bienumis tie. Ili eksedziĝis ankoraŭ kiam la infanoj estis malgrandaj. Zlata ekstaris kaj kore ĉirkaŭbrakis lin. Ŝi kuris voki infanojn. Ĉiuj kolektiĝis. La du plenkreskaj infanoj kun respekto rilatis al la patro, kiu reaparitis en la domo post tiom da jaroj.

Adam Lubienski venis el malliberejo en Slovenio. Li elirinte el la karcerio direktiĝis al Zlata, ŝi estis simbolo por ĉiuj rifuĝoj.

Zlata ne hezitis kaj tuj vokis Kata por organizi etan ĉambron por la sinjoro.

Baldaŭ montriĝis, ke li venis nur morti ĉe Zlata. La kancero en la ventro forvoris lin dum tri semajnoj. Li degelis kiel neĝfloko antaŭ la okuloj de la familianoj. En la lasta semajno kun la ruĝaj polmoj de diskrevitaj kapilaroj, li halucinis ke li estas en Pollando kaj li flustris nur pole. La morton li timis, persekutis lin iuj ciganoj en ĉiu lia vizio. Zlata tenis lian manon kun fingroj jam dikaj de la korpaj akvoj kaj reflustris al li kuraĝigojn en la pola.

La valizoj pretis por Tilla kaj Lutz, nur la vizoj ne. Tilla iris serĉi kuraciston por konstati la morton de Adam Lubienski.

Stranga bruo aŭdiĝis de ekstere:

- Kio estas tio?
- Nur segilo. - klarigis Zlata ke revenis la segisto. Kiu ne segis sufiĉe da

lignaĵo por la vintro, devas nun redungi la segiston. Vintro ankoraŭ havos dentojn.

Zlata ploris pro Adam, pro Tilla kaj pro la segisto.

Lutz ne komprenis tion pri la vintraj dentoj. Tilla rigardis tra le fenestro por vidi kiel la segisto distranĉas dikajn pecojn de lignaĵo. Ŝi revenis al la kahelkameno por varmigi sian spinon.

La enterigo okazos post tri tagoj en la familia tombo de la panjo de Zlata.

Tra la seĝeroj alvenis helpantino por vesti la mortinton. Koĉeristo alportis la ĉerkon kaj enportis ĝin en domon leĝere kiel lulilon.

Pezmane li finmartelis la ĉerkon. En la granda domo resonis la sonoj de la martelo. Tilla glutis la salivon kaj bruligis novan kandelon en la kandelingo.

Ĉiuj direktiĝis al la proksima tombejo. Iu malĝoja sonorilo anoncis ke la ĉerko ekiras al la tombo.

Zlata petis iun ĉasistan amikon de Adam muziki adiaŭe. Li alvenigis tutan aron da trumpetistoj. Neniam Tilla aŭdis ion tiel malgajan. Ĉiu kliniĝis por postĵeti peceton da tero post li. Ankaŭ ŝi faris. Ŝajnis ke Tilla ĵetis terpecon en la propran tombon.

Hejme post kiam la lastaj gastoj fortrinkis glason por la forpasinto, Zlata elprenis la lastajn monerojn de la ŝparaĵo elsub la litotukoj en la ŝranko kaj diris kuraĝige:

-Ricevi vizojn por Grekio kaj Turkio ne eblos per normala vojo. Mi iros kun vi al Beograd por helpi.

Grekioj volis unue vidi ilian vizon por Turkio. La bileto ne aĉeteblis antaŭ ol en la pasporto montriĝu ambaŭ vizoj de la landoj trapasontaj. La afero iom daŭris. Intertempe, dum Zlata ankoraŭ estis kun Tilla en Zagrebo

okazis la 27a de marto kaj Tilla kaj la funebre vestita Zlata, rapidis tra entuziasmaj masoj en Beograd sur la stratoj kiantaj *Bolje rat nego pakt* *:

La serba armeo faligis la jugoslavian registaron. Zlata unue devis trovi novan kontaktpersonon ĉar ŝia parencino, absolute ne plu utilis por la kazo de Tilla. La ŝmirmono kiun donis Zlata por iu juna oficisto montriĝis pli efika: la vizo por Turkio estis havigita.

Al Tilla plaĉis la etoso en Beograd. Jen unu loko en la mondo kiu kontraŭstaris Hitler kaj kiu tion laŭte prononcas. Tilla ne havis tempon pensi ke la reĝkorta damo kiu devis helpi al ŝi fariĝos rifuĝinto, samkiel la reĝo mem. Ŝin trafis la sciigo ke la vizon por Grekio ili ricevos en Skopje.

Estas vero ke Skopje en ŝia geografisento proksimis al la landlimo kun Grekio kaj Grekio ja estas sur ilia vojo al Usono. Tien veturis plenŝtopita trajno kiun en la beograda stacidomo ne eblis eniri. Ili havis krome 11 valizojn ĉar ili celis tre for, al Novjorko.

Tilla kaj Zlata adiaŭis en Beograd per forta ĉirkaŭbrako. Zlata ne volis plori sed la alrmoj estis tre rapidaj.

- Tian amikino mi neniam havos.

Tilla perdis Lutz kaj la valizojn jam ĉe la tumulto kiam aperis la lokomotivo sur la kajo en Beograd. Ŝi kun iuj infanoj sukcesis svingiĝi tra la fenestro kaj ne plu moviĝi ĝis ŝia finstacio, multajn horojn poste. Kun miro ŝi malkovris Lutz kun la valizoj en la homamasoj de la stacidomo en Skopje. Li rakontis ke li sukcesis eniri kuŝvagonon ĉar helpis al li Kerntner, lia partnero el Opatija, kiu, kiel montriĝis, fuĝis per la sama vojo kaj pro la sama kaŭzo. Kun unu avantaĝo pli. Li jam havis en sia poŝo ankaŭ la grekan vizon por transiri al Turkio. Li jam havis vizon por atingi Palestinon.

Jen Tilla kaj Lutz en turka *kasabo***, super malgajaj teleroj, diskutantaj kion fari nun. Montriĝis ke estis falsa la informo ke la vizon oni ricevos en Skopje. Por la vizo necesas reiri al Beograd.

Tilla reiru, ŝi estas gimnastikisto. Lutz kun sia reŭmatismo, atendu en Skopje kun la valizoj ke ŝi revenu. Ŝi prenu ankaŭ lian pasporton por povi ricevi la vizon por eniri Grekion por ambaŭ geedzoj.

Ŝi ŝovis la pasportojn en la saketon kaj ĉirkaŭbrakis lin.

- Nur ne malesperi!

La trajno je la ekiro malfruis tri horojn. Ŝi jam volis eliri. Sed sen vizoj ili ne povas daŭrigi. Do, ŝi devas atingi Beograd. Ŝi kunpremis la lipojn kaj restis en la vagono.

La trajno rampis, rampis kaj fuŝis ĉiujn ŝiajn planojn. Ŝi volis de la stacidomo iri al la ambasadejo.

Sed kiam ŝi fine atingis Beograd estis profunda nokto. Ŝi trovis ĉambron en la hotelo *Ĉe la Rusa Caro* kaj la kontakpersonon al kiu ŝi enmanigis la pasportojn. Ŝi esperis morgaŭ matene rehavi siajn pasportojn, kun la vizoj. Ŝi vekigis je la sesa entrepreni la enviciĝon ĉe la ambasadejo, planis ŝi enlitiĝante vespere. Tuj poste ŝi reiros per la unua trajno al Lutz en Skopje.

Tio kio vekis ŝin ne estis tertremo sed bombardado. Estis la 6a de aprilo 1941,

Germanio atakis Jugoslavion. Brulis la tegmento de la hotelo *Ĉe la Rusa Caro*. Ŝi sukcesis tra polvo trovi la konstruaĵon de la ambasadejo sed ĝi estis bombtrafita, paperoj cindre flugis tra la diskrevita enirpordo. La beograda vento disportis fajnajn sablerojn de la vitro tra la stratoj en flamoj tra kiuj ŝi kuris.

Ŝi estis germanino en al urbo kiun trafadis la germanaj aviadiloj. La serban ŝi ne parolis. Ŝia hondurasa pasporto kaj la pasporto de Lutz estis perditaj. En ŝia sako el ĉiuj ŝiaj dokumentoj nur eta foto de ŝi konserviĝis. Ĉe la venonta atako, ŝi traserĉis detale sian sakon por trovi iun dokumenton pri ŝia identeco: sidante en la sufoka kelo, kolketiva ŝirmejo de iu banko kun amaso da homoj ĉirkaŭ si. Neniu dokumento kiu povus pruvi kiu ŝi estas. Nur unu nomkarto, tre ĉifita kun ŝia berlina adreso, kaj la vorto aktorino skribita per elegantaj literoj. Tiam ŝi memoris la paperan vizon pri Turkio. Jen ŝia ĉefa identigilo.

Ŝi decidis per ĉiu forto reiri al Lutz.

Ne estis facile trovi la stacidomon en la urbo sub bomboj. Kiam oni ĵetas bombojn la trajnoj kutime haltas. Tion praktikis ankaŭ Beograd en aprilo 1941.

Inter ŝi kaj Lutz kuŝis 600 kilometroj da mallumo.

Kiam post pluraj horoj da atendado en malplena vagono, ekmoviĝis la lokomotivo, Tilla gapis al la stacidomoj por informiĝi, kie ŝi estas. Eĉ se ŝi povus vidi iun nomtabulon, tiu perpleksigis ŝin per sia cirila skribo kaj tial ŝi pintigis la orelojn por kompreni kiun vorton elkrias la trajnkonduktoro. Ŝi sciis ke ĝis Skopje necesas multaj horoj. La nomoj ne helpis informiĝi kie ŝi estas, helpis la sento ke ŝi iras pli proksimen al Lutz. La kondukto eliris al la nokto kaj kriis ĉe unu stacidomo post la alia: Resnik, Pinosava, Ripanj, Klenje.

Tilla komprenis ke ŝi ne estas la sola *ŝvabino*^{***} en la trajno. Du sinjorinoj el Aŭstrio kunfuĝis al la sudo. Ŝi decidis alparoli ilin france, ne estas facile paroli la germanan en la lando kiun atakas germanoj. Sed prefere ŝi silentu kaj subaŭskultu.

Mladenovac, Kovačevac, Rabrovac, Kusadak, Ratara, Glibovac. Palanka. Tiun vorton ŝi aŭdis de Zlata. Ĝi rilatis al io provinca. Glibovac ŝi ne komprenis. Ĝi signifas ŝlimejon. Tra Glibovac al Usono. Sonas iom tro paradokse. Mala Plana. Velika Plana. La trajno haltis meze de la nokto kaj ne plu moviĝis.

Krioj elpelis ĉiujn pasaĝerojn el la trajno. Eliri en la nokton.

Ŝi pene komprenis kio okazas. La trajno ne plu iros. La vagonoj restas ĉi tie.

Sed ŝi volis al Skopje.

- Skopje? Bulgaroj okupis tiun parton de la lando. Oni nun ne vojaĝas, estas milito.

Ŝi aliris al la aliaj du eksterlandaninoj. Montriĝis ke unu el ili ŝi konas el siaj berlinaj tagoj.

Ĉu oni mortpafos ilin matene kiel spioninojn? Ŝi fartis mizere. Post tiom da lumo, pereis en tiu anonima ŝlimejo, freneza pro senhelpo.

Antaŭ ol mortpafi ilin, iu oficiro france parolis kun ili kaj konsilis foriri en la proksiman vilaĝon kaj atendi tie, ke la situacio trankviliĝu.

Tilla rigardis al siaj truigitaj ŝuoj, kiuj taŭgus por prezentiĝi ĉe usona ambasadejo kaj peti vizon por Novjorko sed ne por fuĝado tra la kampoj. Ekneĝis en Velika Plana tiun matenon kiam ŝi ne estis mortpafita kiel germana spiono.

Ŝiaj du kunulinoj montriĝis lertaj prizorgantoj de ŝtrumpoj kaj botoj. Ili per sia mankohava sed laŭta kono de la serba jam aĉetumis en la flankstrato ankaŭ por Tilla.

La triopo ekpiedis al la montaro. Tie iu vilaĝano volonte akceptis ilin sur sian ĉevalĉaron kaj poste en sian vilaĝan ĉambron. Lia edzino hejtis gisferan fornon kaj neniam al Tilla estis tiom varme kiel en tiu domo meze de la neĝo kaj tiom malvarme nokte, kiam oni ĉesis hejti.

De malproksime audiĝis kanonoj.

Tilla havis truon en la stomako. En la saketo, kie antaŭ kelkaj tagoj kuŝis ŝia hondurasa pasporto kaj la pasporto de Lutz ankaŭ fariĝis truo: ŝi pagadis la loĝservon al la vilaĝano kaj fajraj supoj kun multe da cepo savis ŝin de deprimiĝo, rigardante kiel degelas ŝia mono.

Kion fari? Tie ne eblas resti. Al Skopje absolute ne eblas iri. Lutz devos kontakti Zlata por iel ekscii ĉu Tilla donis vivsignon. Tiel ŝi konsolis sin.

Zagrebo ŝajnis al ŝi la paradizo atingenda. Unue de la montaro sur la ĉevalĉaro al la stacidomo kun la du aŭstraj sinjorinoj kiuj decidis reiri kun ŝi al Beograd.

Se ŝi atingus Glibovac, ŝi jam estus pli proksima al Beograd kaj poste pliaj 400 kilometroj kaj ŝi estus en Zagrebo.

Trajnoj ne veturis por civilaj pasaĝeroj.

Glibovac kaj la tuta listo de vilaĝoj tra kiuj ŝi jam veturis troviĝis en la nordo. Ŝi elektis la unuan soldatplenan trajnon kaj petis kunveturon. Iu germana oficiro ĉi foje ne rifuzis la peton. Ŝi sidis meze de estontaj

germanaj herooj, kaj memoris ke la saman frazaron kaj la samajn kantojn ŝi jam konis, el 1914.

Jeder Schritt ein Britt'

Jeder Schuss ein Russ,

Jeder Stoss ein Franzos'

Ŝi sentis ke ŝi estas jam tre maljuna, ĉar ĉion ĉi ŝi jam vidis. Kaj ŝi konis la sperton per kiaj mizeraj nudaj piedoj finiĝas tiuj botkantoj post kvar jaroj da militado. Kiu trikos ŝalojn por liaj nudaj koloj, kiam lano neniu plu troveblas?

Nun ŝi ridetis ĝentile al la germanoj ĉirkaŭ si kaj dankis al siaj savintoj por la transporto ĝis la detruita Beograd.

Tie ŝajnis ke la tutaj amasoj volis foriri pertrajne al la okcidento.

Dum du tagoj ŝi atendis en la stacidomo sian bileton kaj sian vagonon. En la amaso ŝi ekvidis iun konatan judon el Zagrebo, prestiĝan turkan konsulon Marić.

Li alproksimiĝis al ŝi kaj demandis kien ŝi volas. Ŝi diris ke ŝi perdis edzon en Skopje. Li malfermis sian monujon kaj petis ŝin preni kelkajn monbiletojn. Per ili ŝi aĉetis la trajnbileton, kelkajn horojn poste, kiam ŝi fine alproksimiĝis al la malgranda giĉeto. Maldensiĝis la matena nebulo kiam la trajno haltis en la Zagreba ĉef-stacidomo. Ŝi rapidis en siaj serbaj vilaĝaj botoj al Jurjevka.

Du Germanaj armeaj aŭtoj estis parkitaj en la korto. Tiel, do, Zagrebo jam okupita.

-Kiu trovivis el la hejmanoj? Kio okazis? Kiun ŝi trovos hejme?

Supre sur la fenestro ŝi vidis la vizaĝon de Ivkica kiu tuj malaperis kun la krio

@Sinjorino Tilla@ surbuŝe.

Zlata ne volis kredi al siaj okuloj.

Kun brandoglaso antaŭ si, kun la piedoj trempitaj en lavujo da varmo akvo, al kiu Zlata aldonadis novan kruĉon da varma akvo kaj mildigaj tiliflorojn, ŝi rakontis pri ĉio kio okazis.

Ŝi ploris en la lastaj tagoj nur en la vilaĝa preĝejo apud velika Plana, kien la vilaĝano alkondukis ŝin por la Paska festo. Oni instruis ŝin kiel bati unu kolorigitan ovon al la alia, laŭ la loka kutimo. Nun hejme, protektita, la larmoj inundis.

- Ni trovos Lutz! Ni faros ĉion, ĉefe ke vi estas ĉi tie.

Ili vere trovos la informon pri Lutz. Tri jarojn poste, en iu letero de lia unua edzino Estella, kiu mesaĝis ke li mortis en Germanio, deportita tien el Skopje.

- Kie kaptita? Ĉu ĉe la stacidomo en Skopje atendante ke alvenu la unua pasaĝera trajno el Beograd? Tiun flankon de la vivnodo kapablis neniu malnodi por Tilla.

Estella, multajn jarojn poste, informis al Tilla ankoraŭ unu detalon: ŝi eksciis nur ke Lutz al Germanio estis deportita el Thessaloniki. La nodo ne volis malloziĝi.

**Bolje rat nego pakt (serbe) Prefere milito ol la pakto*Ĉ slogano de la surstratj ribelantoj de la 27a de marto 1941 kontraŭ Germanio

** kasabo (turke) urbeto

*** ŝvaboj - tiel sudaj slavo nomis ĉiujn germanlingvajn eksterlandanojn, lige al la germana regiono el kiu la plej multaj germanoj elmigris

GERMANO EN LA DOMO

Tilla meze de siaj larmoj, super suptelero komprenis kion faras la du germanaj aŭtoj en la korto de Jurjevka. La 10an de aprilo 1941 estis proklamita Sendependa Ŝtato Kroatio. Ustaŝoj ekregis. Ante Pavelić, ties estro, revenis el Italio. La Germanoj jam transprenis la povon en la urbo. Germanaj oficiroj ricevas loĝejojn en bonaj Zagrebaj domoj.

- Nia germano venos venontsemajne. - anoncis Zlata.

Tilla streĉe aŭskultis. Pri la Ustaŝa-Movado ŝi aŭdis sufiĉe kiam en Marsejlo estis murdita la jugoslavia reĝo Aleksandro en 1934. La kroata vorto *ustaŝa* signifas ekribelinto, ekstarinto. Post kiam per la suspendio de Konsitucio en 1929 estis severigitaj la politikaj kondiĉoj sub la jugoslavia reĝo Aleksandro, kaj ekregis diktaturo, grupo de ustaŝoj elmigris al Italio. De Italio ili estis bonvene akceptitaj ĉar proksimaj al faŝismaj ideoj de Mussolini. Ankaŭ en Hungario ustaŝoj havis siajn ekzercejojn. Ŝi jam konis la nomon de la ekzercejo en Janka Puszta. La atentato al la jugoslavia reĝo Aleksandro estis la verko de ustaŝoj, tiel oni klarigis al ŝi. Zlata interpretis por Tilla la kulton de tranĉilo ĉe ustaŝoj, ilian obsedon pri sango kaj perforto. Establiĝinte en Zagrebo post Italio, la ustaŝoj komencis regaladi sin - unue per la domoj de judoj, tuj poste per la domoj de serboj. Ja ustaŝa gravulo Dido Kvaternik, estro de la novfondita Fako pri la publika ordo de la urbo Zagrebo, inter siaj politikaj taskoj kiel ŝtata sekretario pri aferoj de publika ordo havis la viziton al Himmler por pristudi la metodojn kiel trakti judojn. Li estis tre bona lernanto.

- Ĉu ne eblus elekti germanon por nia domo? Ĉu oni donas iun ajn?
- Mi preĝas ke la ricevota germano estu nur unu, ĉar tia granda domo kiel

la nia kapablu enloĝigi plurajn oficirojn.

Tilla jam la unuan vesperon en la hejmo de Zlata komprenis, ke Zlata dum la tagoj kiam Tilla estis en Skopje transprenis la ĉefan kason de la Ruĝa Helpejo kaj lokis ĝin en sian ĉambron. El Jurjevka estis financata la zagreba rezistmovado. Ĝis la milito oni nomis ĝin Ruĝa, poste Popola Helpejo. La kaso

estis enmuntita en la barokan ŝrankon. La Ruĝan Helpon protektis la ŝrankajn bretojn kun burĝaj ornamaĵoj en la ligno.

Se venos germano en la domon, necesas tuj ien forigi la kason. Kien? Ĝi ja estis metita en la domon de Zlata ĉar ŝia hejmo ne estis suspektata.

Tilla, kiu jam dum la lastaj monatoj kun Lutz en Zagrebo apenaŭ vizitadis iun, nun montris sufiĉan interesiĝon, kiam venis invito partopreni la proksiman sabaton feston ĉe la najbaroj. Zlata diris al ŝi ke tiuj najbaroj staris sur la ĉefa placo kun floroj kaj oranĝoj, kiam alvenis la germanaj tankoj en Zagrebon por bonvenigi ilin.

En normalaj cirkonstancoj Tilla serĉus ĉiujn pretekstojn por fuĝi de la devo vespermanĝi honore al nomumo de germana ambasadoro en Zagrebo Sigfried Kasche. Sed nun, prezentiĝas la okazo informiĝi pri la nova situacio. Ŝi kuraĝe tenis sian glason kiam venis momento de tostoj.

Sed la humiliĝo indis: ŝi konatiĝis kun la novvenintoj, kaj al la plej klera kaj al la plej milda inter ili ŝi menciis loĝlokon en la hejmo de Zlata. Ĉu li jam trovis loĝejon en tiu lando? Ŝi povus ion rekomendi.

La Sendependa Ŝtato Kroatio, aliancano de Germanio, aĝis jam du semajnojn kiam Tilla ĉe Zlata ricevis sian novan ĉambron, plenigitan per la artaĵoj kiuj ne estis enpakitaj en la valizojn por Usono kaj malaperintaj en Skopje. Tilla mem helpis porti litaĵon por ekipi la ĉambron de la germano.

- Apud tia gasto en la domo, ni devus duobligi la atenton, flustris Zlata.

La proksimo de la danĝero kramfigis ŝian stomakon. La kurieroj de la arbaro

venadis nokte tra la teraso kaj rapidmove enŝteliĝis. Ne eblis nur elpreni la saketon kun la preparita materialo kaj reiri. Veninto kun angoro en la stomako, humida de la arbaro, kiam ajn eblis ricevis varman manĝon, varman akvon por baniĝo, purajn vestojn. Se la danĝero ne estis granda, la virinoj ne lasis la kuirieron tuj reiri en la arbaron. Kelkaj akceptis tranokti. Tiam la tuta domo dormis per leĝera dormo de leporo. En la kelo oni kuiris *ajnpren*-supon por la arbarano kaj rapide aerumis por forigi la odoron de la faruno el ĝi. La

ĉambro de Tilla estis la ĉefa kunsidejo. Sur ŝia tablo oni aranĝis dokumentojn de tiuj kiuj foriris al la arbaro. Ŝi enfermadis ilin en la botelojn. Tilla ricevis kaŝnomon Puma. Puma enfosadis la botelojn.

Ŝi sciis ke pri ŝi kaj Zlata rumoras la klaĉoj ke ili estas en lesba rilato. Temo por skandalemaj klaĉoj. Plej gravis konservi la sekretojn de la ĝardenaj bedoj.

Tilla jam sciis ke la aktorino Ivka Rutić, la aktorino kiun Tilla vidis la unuan fojon sur la scenejo en Zagrebo, kun sia edzo Josip foriris al arbaro. Aktorinoj Etta Bortolazzi, Mira Ŗupan same. Aktoroj Mladen Ŗerment kaj Srđan Flego ankaŭ. Poste ili fariĝos la kerno de Teatar narodnog oslobodjenja - Teatro de Popola Liberigo.

Ĝis Jurjevskaja venis la anekdoto, kian mokon de simplaj partizanoj provokis la piĝamo de Mira. Kunporti piĝamon por la arbara vivo dum oni dormis en botoj sub rosokovritaj arbustoj!

Kiam kelkajn jarojn post la milito, Srđan Flego kolektis siajn kolegojn por Internacia Esperanta Teatro, la patrino de Mira sincere ekribelis:

- Tiu Srđan denove vin tiras al arbaro!

Tiu postmilita *arbaro de Srđan* havis sian sidejon en Parizo kaj preparis la

teatraĵojn por Falkonerteatret en Kopenhago en la jaro 1962.

Kiam Tilla matene iris falĉi herbon por siaj kunikloj, ŝi ĝentilumis kun sinjoro Schmidt, tenante la malseketan papereton kun instrukcioj en la poŝo de sia kitelo. La mesaĝoj alvenis ankoraŭ humidaj de la nokta arbaro.

- Kiom da kunikloj ŝi nun havas?

- Se ŝi ne erararas, sepdek kvin.

La germano sincere miris kion faras la granda aktorino ĉe siaj parencoj en

provinco, inter tiuj barbaroj, okupiĝanta pri bredado de kunikloj. Ŝi vere devis laboregi por la konikloj. Nu, jes.

De ŝia ŝovelilo kreskis tomatoj sed kreskis ankaŭ la arkivejo de la savitaj

dokumentoj.

Kiam Zlata eksciis ke ĉe la stacidomo alvenis la vagonoj kun la serbaj infanoj de Kozara*, antaŭviditaj por katolikigo, en la bedo de Tilla baldaŭ estis enfosita la originala listo kun la veraj nomoj de la infanoj. Ŝtelis la liston iu kunlaboranto el la oficejo antaŭ ol ĝi estis neniigita. Ŝvite Tilla portis akvon al la kunikloj, kiuj promenis apud la plej riĉa kaŝarkivejo de Zagrebo.

Zlata antaŭ Tilla ne havis sekretojn. La grafa domo Lubienski ne estis suspektata de germanaj instancoj. La ustaŝa reĝimo bone konsciis kiom malproksimas la grafaj konceptoj de la ruĝuloj.

Aldone al la propra politikaj konvinkoj, Zlata ja estis dum multaj jaroj pola bofilino, kaj ĉion kion Hitler faris al ŝia bolando kaj la propra nur pli profunde konvinkis ŝin kiel agi.

Tilla havis kiel ĉefan taskon ĝentilumi al la germanoj por teni for la suspekton.

La dokumenton kiun ŝi devis transdoni al la alia nekonata helpanto ŝi plej ofte enpakis kiel tigtenilon de sia florbukedo kaj marŝis per dimanĉaj paŝoj ĝis la loko indikita. Ĉu la persono promenos ĉirkaŭ la fontano? Ĉu li surhavas ĉapon? Ĉu li alvenos sola, ĉu duope? Ĉu li kline kapsalutos ŝin? La homo kun rideto delikate transprenis la florojn kaj adiaŭis de ŝi, firme tenante la mesaĝon en la mano.

Abundis floroj en la ĝardeno de Jurjevska 27 en la jaroj 1943, 1944.

Ne ĉiuj bukedoj povis esti transdonitaj. Plurfoje kun la floroj Tilla repromenis hejmen, la gorĝon kunŝnuritan pro la proksimo de la danĝero.

Plej multe Tilla timis de io kion oni nomas *cerniranje*: la policistoj enfermis iun kvartalon kaj kontrolis legitimilojn de ĉiuj preterpasantoj kaj de ĉiuj loĝantoj ene de la kvartalo. Se iu kaŝita estis trovita, la pereado de la tuta familio estis certa. Se iu estis sen legitimilo, atendis lin la sama sorto.

Dimanĉe matene alvenadis studentoj al ilia artsalono. La lecionoj pri pentraĵoj apudis al la lecionoj pri muziko kaj poezio. Tilla pianludis kaj la piano de la patrino de Zlata mirinde vivigis la domon.

Dimanĉe, kiam la germana oficiro deĵoris, Tilla al la studentoj recitis Heine.** La domo en Jurjevskaja 27 estis la sola domo en Eŭropo, kie oni konservis kontraŭgermanajn dokumentojn kaj samtempe okazigis recitalprogramon el la germana poezio per la plej konvinka germana voĉo.

La oficiro kiu loĝis en la teretaĝo aŭdis foje la versojn de Rilke*** malantaŭ la biblioteka pordo. Heinrich Heine sonis el sub la sojlo.

La granda aktorino havis preferojn por la aŭtoroj kies libroj forbrulis kiam ŝi forlasis Berlinon. En ŝia kapo konserviĝis perfekte ĉizitaj versoj antaŭ ol tuŝis ilin la fumo de la fajro.

Post la hejma programo, kiam Tilla jam forakompanis siajn junajn gastojn el la domo, la germano kun pardonpeto haltigis ŝin ĉe la pordo. Ŝia koro nervoze batis. Ne estis tio la repertuaro kiun devus aŭdi la germana oficiro en la konkerita urbo. Sed li dankis. Li dankis pro la rajto tion aŭdi.

-Estimata sinjorino, neniam la germana estis tiel bela kiel ĉi tie, meze de nenio, el via buŝo. Mi matene forveturos. Anstataŭe loĝos en mia ĉambro kapitano Siegfried von Werner. Kaj se mi rajtas doni konsilon - vi devos esti pli atenta. Ne ĉiu germana oficiro havos tiom da sento por via artisma gusto.

Salute kunfrapiĝis liaj kalkanoj.

-Ĉu li ĉion sciis? Ankaŭ pri la kurieroj de la teraso? Pri la kaso de la Ruĝa

Helpejo en la dormejo?

Al la novalveninta kapitano von Werner Tilla tuj proponis sian servon. La endoma servistino volonte lavos liajn vestojn, li fartu komforte ĉe ili. Kaj pri gladado de liaj ĉemizoj kaj la flikado de ŝtrumpoj okupiĝos ŝi persone. La servoj devis kaŝi, ke nokte susuras la paŝoj de la kuriero el la arbaro, svingiĝanta super la teresa barilo.

La nova germano en la domo konfidencis al ŝi. Li venis ĉi tien kun specifa

tasko organizi Hitlerjugend.***

-Kaj kio okazis? Ĉu vi povas kredi tion? En la ejo kie mi devis kunsidi kun ili troveblis neniu. Neniu! Ĉu vi povas kompreni tion?

- Nekredeble.- miris malice Tilla, transdonante al li perfekte gladitajn ĉemizojn.

- Morgaŭ vi trovos neniun en la ĉefstabejo.- pensis ŝi al lia vizaĝo, kun rideto.

Baldaŭ venis la mateno kiam li haste revenis, aŭton plenan je armiloj.

- Estas neniu plu en la ĉefstabejo.- li informis konfidence al Tilla, ripetante ŝian penson. Li sincere ne komprenis kial neniu estas tie.

Tilla senvorte etendis al li ĉemizojn el la ŝranko.

Kvin jarojn ŝi kaj Zlata atendis ke la germanoj paku. Nun venis la momento.

*Kozara – monto en nordorienta parto de Bosnio kaj Hercegovino, kie dum la Dua mondmilito okazis grandaj bataloj. La sengepatraj infanoj, post la ofenzivo nomataj *La infanoj de Kozara* estis adoptitaj de diversaj familioj. Ofte ili perdis identecon, nomon, religion. Serbaj infanoj de origine ortodoksa religio estis edukitaj en katolikaj familioj.

**Heinrich Heine (1797- 1856) germana poeto

*** Reiner Maria Rilke (1875-1926) aŭstra poeto

*** Hitlerjugend – la junularo de Hitler, nomo de la junulara organizo

STUDENTOJ

Dimanĉon Boris invitis kelkajn samjarulojn al sia hejmo. Venis Radovan, maldika kaj fajnaspekta, en tro larĝaj pantalonoj. Vlado en la heredita jakto de sia patro, iam bone tajlorita. Li jam kutimis bindi ĉirkaŭ la kolo grizan silkan tukon. Mladen kun sia raŭka voĉo. Fakte ili venis por festi naskiĝtagon de Boris. Sed ili sciis ĉarmi Zlatan kaj Tillan. Post la ĉokolada torto, kie kvantoj da tranĉoj ne estis difinitaj, kaj estis nature ke oni rajtas peti la kvaran pecon Mladen, ĝentile kaj raŭke, per la tono de oldulo, dankparolis kaj diris, ke ĉiuj fartis tre bone en tiu domo de la arto. Estis gaje kaj junece. Neniu komprenis detalojn kiel Zlata sukcesis havigi kuirĉokoladon en la milita urbo, sed tio ne gravis por la bonfarto.

-Sed en la manĝosalono vi vidis ne multon el niaj arttrezoroj. Se vi volas, ni povas translokiĝi al mia ĉambro, proponis Tilla, komprenite ke en tiuj knaboj ĝermas artinstinkto.

-Ho, ne fortiru tedi ilin. Prefere ni kartludu! - proponis Boris. Li jam estis lerneja boksĉampiono ekde la lasta sezono. Bokso estis la sporto de la malriĉa urbo. Ĉiuj boksis ĉi tie.

-La gastoj decidu.

La gastoj ne sekvis la grumbladon de Boris kaj preferis unue vidi la artaĵon kaj poste kartludi.

Ilia germana lamis, sed Tilla ĝuis. Ili kolektiĝis en ŝia ĉambro kaj trarigardis mapojn kiujn ŝi eltiris el la ŝranko. Scivole ili ĉirkaŭrigardis tra la ĉambro. Neniam tiuj knaboj vidis ion tian. Radovan timis preni en la manon la porcelanan monaĥinon de Ernst Barlach. Ŝi faris grandan paŝon kiu pufigis ŝian porcelanan sutanon. Li admiris ŝin de malproksime kiel en artgalerio. Neniam la knaboj vidis iun figuron el Paskinsuloj.

Per tiu naskiĝtaga festo komenciĝis la laboro de privata artlernejo en Jurjevskaja 27 por kiu neniu pagadis kotizojn. La junaj studentoj rigardadis pentristajn mapojn de Tilla kaj aŭskultis ŝiajn komentojn. Tilla legis al ili. Dum en la tuta Eŭropo la lingvo de Germanio estis malestimata, ĉar la lingvo de Hitler, ĉi tie la germana fascinis kiel lingvo de la arto. Sub la fenestro dimanĉe promenis la generalo Glaise von Horstenau* kaj ne for de la domo li sidiĝis apud la beleta fraŭlino Ankica por rigardi la arbarkovritajn deklivojn de la monto Sljeme, Tilla recitis el Rilke kaj instruis al la studentoj ke en tiu nomo liriko nestas. La germana lingvo en la sieĝata Eŭropo malofte estis bela kiel en poezivesperoj de Tilla. Studentoj lernis apartigi la marŝojn de Hitler de la germanaj versoj. Tilla recitis el Dehmel** kiam la nebulo grimpis de la vinberejoj, el Goethe, kiam lampiroj flugis el la ĝardenaj bedoj, ŝi ĵetis la ganton de Schiller antaŭ ilin***. Tilla ripetis la versojn kiujn ŝi recitis en la berlinaj antaŭurboj por la proksimuloj de Rosa Luxemburg****. La knaboj portis la versojn en la orelojn en septembro 1941 kiam Zagreb estis ornamita per afiŝoj de Ministerio de internaj aferoj ordonantaj denunci la poŝtistoficistojn instalintaj eksplodmaŝinon en telefona kaj telegrafa centraloj. *La persono kiu donos informon ricevos premion de 100.000 kunaĵoj, litere cent mil kunaĵoj.* La premion prenis neniu. Vilim Galjer, esperantisto, numero 3 de la serĉafiŝo, pereis duonjaron poste en Kordun. Tilla recitis. La versoj falis

kiel prujno. Ili beligis la vivon de la mornaj posttagmezoj. Tilla klarigadis al la scivolaj oreloj de studentoj. Arton ŝi verŝis per granda kulero, kiel medikamenton, dum sur kandelabroj laŭ la promenejo ekzemplodone pendis kadavroj de komunistoj.

Ŝi vidis de tago al tago iliajn nomojn sur la afiŝoj pendigitaj en la urbo. Zlata pedanteme nombris ilin: 359 pendigitoj inter la 5a de aŭgusto 1944 kaj la 24a de aprilo 1945.

Tilla ne instruis en ŝia privata artlernejo la 13an de februaro 1945, la tagon kiam bomboj falis al Dresden. Ŝi kuŝis senhelpe sur divano kaj Zlata portis kamomilan teon al ŝi. Zlata ja ĝojis aŭskultinte la informon de Londona radio pri aviadiloj super Germanio. Sed en Galerio de Dresden pendis la portreto de Tilla desegnita de Slevogt, inspirita per ŝia rolo de Kleopatro. Tilla kramfiĝis sur la divanon, sentinte kiel la plafono de la galerio sub la bomboj malsuprenŝutiĝas al ŝi.

Tilla postmilite vizitis Dresden unu fojon kaj admiris la renovigitajn skulptaĵojn kiam tiuj venis el la pedantemaj moskvaj artriparejoj.

Ŝi ne vidis la Berlinan muron malkonstruiĝi, Germanion unuiĝi. Neniam ŝi aŭdis la dresdenan komenton post la unuiĝo en unu ŝtaton.

Niaj amikoj angloj detruis ĉion, niaj malamikoj rusoj renovigis ĉion.

Ŝi nur instinkte kramfiĝis en Jurjevska , ĉar plafono falis en Dresden sur ŝian portreton.

Ekstere sur la Zagrebaj stratoj ankoraŭ daŭris fascino pri ŝia kolekto:

- *Forpasinta virina praŭlo el Kamerunio*- mire ripetis Mladen. *Praŭlo el Nov-Gvineo*. Ses skulptaĵoj de Paskinsuloj.

La abituriento, kiu jam razis sin per la mela broso de la patro, ĉar sian propran li ricevos nur Kristnaske, gaje gapis. La vortoj Paskinsulo, Kamerunio kaj Nov-Gvineo estis por ili ĉiuj tute fantastaj. Kompeneble ke ili lernis la nomojn en la lernejo, sed tiuj objektoj sur la bretoj de Tilla, nun subite, donis al la geografiaj nomoj, strangan dimension.

-Ĉu vi estis tie, ĉie?

-Ne, Tilla ridetis.- Mia edzo Paul trovis ilin en iu antikvaĵejo en Frankfurto je la fino de 1920. Li ŝatis malkovradi la nekonatajn valorojn.

La knaboj silentis respektplene. Nur hejmenirante, Vlado demandis.

-Ĉu vi kaptis? Tiujn artaĵojn malkovris ŝia edzo Paul. Tio ne estas la gusto de la edzo Lutz, ŝia lasta edzo kun kiu ŝi antaŭe loĝis ĉi tie. Tiu edzo ne havis Paskinsulan guston.

-Tion kion ŝi montris hodiaŭ ne estas ĉio. Ŝi nenion diris pri la objektoj kiuj staris ĉe ŝia litkuseno. Ĉu vi vidis tiujn sur la noktoŝranketo? Rigardu bone venontfoje. Ŝi havas tie krucifikson en leda ujo. Kristo estas arĝenta, ornamita per buntaj duongemoj, la lumo de la lampo trafadis la tutan maldekstran flankon kaj ĝi brilis. Ĉu vi ne vidis? - miris Radovan

-Mladen estis ravita de la sinjorino kaj neniu alia brilaĵo lin ravis.

-Dum vi gapis al la Paskinsulaj figuroj mi prenis en la manon tiun portreton por kiu ŝi diris ke estas ŝia avo Hrdlicka. Dorsflanke estis la vorto akvarelo, jaroj 1790 -1810 kaj la nomo de la avo. Ŝi ĉiam nomas lin la avo Hrdlicka, li nomiĝis Edmund.

-Kie vi sukcesis vidi ion ekster ŝiaj movoj?

-Min impresis bestoj, ĉu vi vidis tiun fokon?

-Ŝi diris ke August Gaul skulptis por ŝi serion da bestetoj en la jaroj 1905-1910. Tiam la edzino de August kuiris por ĉiuj kaj ili manĝis en la ĝardeno, sub pomarbo la kukumojn kiujn ŝi mem kreskigis. Ĉu vi povas imagi iu skulptistan edzinon kiu kreskigas kukumojn kaj propramane kuiras legomojn por siaj gastoj?

-Ĉu vi povas kredi ke ŝia edzo pagadis al tiu Gaul monatan renton por ke li ne devu labori por kreskigi siajn idojn sed nur desegni?

-Knaboj, tiu Boris kiu vivas en tiom artisma domo kaj estas indiferenta al arto kiel ŝtipo, kiel li nur povas esti tia! Mi ne komprenas, ke nur bokso interesas lin!

-Sinjorino Tilla diris, ke venontfoje ŝi montros al ni la ujon por la sekigitaj fruktoj el la dinastio Quin kaj rakontos pri Budhao, ornamita per la floroj. Mi jam ĵetis rigardon al li. La Budhao sidas sur lotuso. Mi jam foje legis ke ĉinoj kredis al persikoj kiel al senmortigaj fruktoj, sed tiu ŝia Budhao ŝajne estas simbolo de kontento, li ankaŭ havas persikon apud si.

-Sinjorino Tilla diris ke venontsemajne ŝi prezentos al ni la servistinon trovitan en iu ĉina tombo. Tilla scias ke la statuo prezentas la ĉinan servistinon laŭ la harplektaĵoj de la skulptaĵo.

-Min ne impresis tiom ĉinaĵoj kiel la skulptita kapo sur la unua breto, el gipso. Ŝi diris ke tio estas la unua gipsa faraĵo post la argila modelo. Ernst Barlach skulptis ŝian kapon por la ekspozicio. Mi ne komprenis, ĉu tio estis ekspoziciita jam en 1907 aŭ 1912. Ĉu vi povas imagi kia virino ŝi estis en 1907? En 1910 ŝi edziniĝis al tiu artkolektanto Cassirer, do, ŝajne ŝia amiko skulptis Tilla antaŭ la geedziĝo.

-Sinjorino Zlata diris ke ankaŭ ŝia unua edzo estis pentristo.

-Kiel unua edzo, mi ne komprenis.

-Kion, knabeto, vi ne komprenis. Tiu ŝia edzo, kiu nun ne estas en la hejmo en Zagrebo, estas la tria, ŝi fascinis la duonon de Germanio siatempe kaj ankaŭ vin ensorĉis tiom ke vi jam bindas silkan tukon.

Vlado ruĝiĝis. Ĉu indas klarigi al tiuj ŝtipkapaj friponoj ke tio kio fascinas en tiu sinjorino estas arto? Li laŭte glutis salivon.

-Al mi plaĉis la fotografaĵo de la festo en ĝardeno en la koridoro, ĉu vi vidis?

-Ne. Kie?

- En la koridoro sur la muro. Iuj homoj ludas per kuglo kaj keglaj, sinjorinoj en longaj jupoj.

-Sed tio ne estas la foto de la sinjorino Tilla, tio estis la ĝardena etoso en la hejmo, kiam vivis la gepatroj de sinjorino Zlata. Mi rekonis ŝin en longa jupo. Ni demandis lastfoje el kiu jaro tio estis, mi forgesis, certe el la 19a jarcento. Sinjorino Zlata diris, ke tio estas ĝardenfesto ĉe ŝia patro, sinjorinoj kun vastaj ĉapeloj kegloludas.

-Diable, kiel vi povis rigardi al foto pri keglado dum vi havas sur la muro la portreton de Oskar Kokoscka? Knaboj, Oskar Kokoscka estis ŝia amiko, ĉu tio eniras en viajn ŝtipajn kapojn? Post kiam li faris sian aŭtoportreton kaj la portreton de Karl Kraus***** li faris - ŝian portreton. He, knaboj, kiu povis esti modelo de Kokoschka, mi demandas vin.

- Sed ankaŭ li estis aŭstra kiel ŝi, eble tio iom helpis.

- Ne temis pri devenlando, temis pri aparteno al arto. Li devis tion senti, el ŝi elradias nun la arto, kaj kiel estis antaŭ dudek jaroj, ni povas imagi.

- Sed Zlata diris ke la edzo de Tilla mendis la portreton ĉe Kokoschka.
- Ne ĉiu edzo mendas portreton de sia edzino.
- Min plej multe impresis la ĉokoladaĵo servita en tiuj ĉineskaj tasoĵ.

Mi

devis bridi min por gluti ĝin malrapide. Kaj ĉu vi vidis ke ŝia taso havas porcelanajn dentojn?- enĵetis Mladen senpripense, ke li denove estos elmetota al la primokoj. Neniu tion vidis krom li. Estis tiom da vidindaj aferoj en la domo de tiuj kleraj sinjorinoj.

-Fakte, en mia hejmo mi devas kaŝi ke mi fumas, sed ĉi tie, vidu, ili mem malfermas la cigeredskatolon por ni. Se mia panjo scius, mi ne plu rajtus iri kun vi tien.

-Neniu rajtus. Ni devas silenti. Ni diros ke ni promenis triope ĉe Cmrok. Estus skandalo se aŭdiĝos ke ni jam kvaran dimanĉon trarigardas iliajn desegnomapojn kaj admiras skulptaĵojn de la Paskinsuloj, fumas kaj konjakumas.

- Kies patrino permesus pasigi dimanĉojn ĉe tiuj du oldaj sinjorinoj sen suspektoj?

-Kia domo! Mi vidis supre ĉizitan la jaron de la konstruo 1881.

-Kiom da libroj! Tiuj virinoj ne plu rajtas ricevi unu libron donace, ĉio jam plenas. Ĉu ni vetu kiom da libroj 3000 aŭ 4000?

-Sed kian guston havis tiu edzo, se lin interesis afrika arto kaj samtempe Chagall***** kaj Klee*****. Ŝi diris ke tiu tekniko per kiu Chagall desegnis nomiĝis *gvaŝo*.

La neĝo jam degelis sur la trotuaroj je la tagmeza suno kiam ili marŝis de la supra urbparto suben. Iliaj altaj ŝuoj kun lignaj kejlatoj en ledaj plandumoj knaris dum la marŝado. La vangoj estis ruĝaj pro ekscito, la dentoj brilis.

Antaŭ kvar semajnoj Boris invitis hejmen la abiturientojn kun kiuj li futbalis al la naskiĝtaga kuko kaj ne povis suspekti ke tiuj tri trovos tiom da entuziasmo pri la kolekto de la sinjorino Tilla kaj ke ili fariĝos ŝiaj amikoj. Post tiu dimanĉo, kiam ili estis la gastoj de Boris, ili tri fariĝis regulaj gastoj de la panjo kaj de Tilla. Ili venas, salutas Boris supraĵe supre en lia ĉambro, kaj

enŝteliĝas en la ĉambron de Tilla por diskuti pri arto. Boris, la sportulo, indiferenta pri lignaj praŭloj el Kamerunio, sentis sin perfidita. Li havis en la kelo boksan sakon por trejni sin. Nun li boksas nerveze por forigi malkontenton pro la ŝtelo de la amikoj. Liaj amikoj preferas la societeton de la oldulino kiu eĉ ne parolas la kroatan sed necesas germanumi kun ŝi.

Sed la knaboj jam fariĝis ero de la dimanĉa programo en la domo Lubienski kaj nur bombardado povus retenigi ilin hejme. Sed la bombardado tiusezone ne okazis.

Hejme la patrino de Mladen jam grumblis.

-Kie vi estas tiom longe? La vermiĉeloj en la supo jam densiĝis. Rapidu. Alportu lignaĵon el la lignejo kaj al la tablo. Kie vi estis?

-Ni promenis ĝis Cmrok.

La urboparto ĝustis. Ĉion alian li prisilentis. Kiel bone estis sube en la kelo,

frapi per granda hakilo sur la lignoŝtipon kaj memori pri la viditaj aŭtentikaj Chagall kaj Klee. Poste ĉerpi supon per la granda ĉerpilo el la supujo, aŭskulti la ordonojn de la patrino, akcepti endormigi la etan fraton, ĉion fari sen ribeloj. Antaŭ li jam staris dimanĉoj kun la sekretoj de la domo Lubienski. Tio evidente estis la plej fajna artlernejo de Zagrebo. Ĝi funkciis nur dum dimanĉaj vizitoj. La plej rafinitaj kolektoj, la plej profunde informita profesoro. Tiu kiu sciis ke ĉio malgrandiĝas per dividiĝo, krom la scio. Ĝi, dividita, grandiĝas.

Glaise von Horstenau* - rajtigita germana generalo en Sendependa Ŝtato Kroatio

Richard Dehmel** (1863-1920) germana verkisto

** *Aludo al la balado *La ganto* de la germana poeto Friedrich Schiller (1750-1805)

Rosa Luxemburg**** (1871-1919) komunisto, ekonomisto, gvidanto de maldekstrula movado en Pollando kaj Germanio

Karl Kraus***** (1874- 1936) aŭstra verkisto

Marc Chagall***** (1886- 1985) franca pentristo

Paul Klee***** (1879-1940) svisa pentristo

PUPFARADO

La dimanĉaj artlecioj por studentoj ricevis novan ĉapitron Ĉup-teatron. Tilla pri pupoj sciis multon. Ili kapablas pli ol aktoroj, ŝi asertadis kaj kion ŝi montris tio montriĝis konvinka. Ŝia pupo kapablis danci la rusan kazaĉokon aŭ la dancon de la nigra cigno. Ĝi ridis kaj ridigis. La malĝojo de la pupo estas pli forta ol la malĝojo de la homo. Kiam la pupo metis fingron sur sian buŝon, silentiĝis la publiko. Kiam la pupo kuŝiĝis en sian liteton kaj diris *Bonan nokton* la infanoj komencis oscedi kaj klini kapon al la panja sino. Pupoj regis, pupoj diktis, donis la plezuron kaj esperon.

La kato Mici ĉefrolis kiel instruilo. Tilla prenis ĝin ĉe la nuko por montri kiom nature la pupo devas teniĝi. La aktoro kiu animigas la pupon donas al ĝi la vivon. Se li rapidas, rapidas la pupestaĵo.

La tri studentoj kiuj en siaj vivoj vidis nur iujn *krampus*-pupojn kun vunditaj vizaĝoj kriaĉi ĉe foiroj, nun fasciniĝis komprenite ke pupoj povas ne nur krei sed ankaŭ esprimi sopirojn kaj revojn. Kiom grandan rolon en tio havas la kapablo de la artisto, tion montris Tilla. Kiom gravas muziko, lumo, sonefekto kaj kiom la vesto de la pupo pri tio ŝi rakontis al la fascinitaj oreloj de la junuloj en la publiko. Boris daŭre obstinis. Antaŭ li la amikoj kaŝis, ke nun ili eklernis manipuladojn de pupoj. Por Boris tio signifis definitive knabiniĝi.

-Ĉu ni provu? - stimulus Tilla.

El akve trempita gazetpapero ili ricevis materialojn por krei kapojn kaj desegni al ili vizaĝojn. Tilla alportis unu valizon de siaj vesperaj roboj, kiuj restis neenpakitaj por Usono kaj ĉi tie, post la vivo kun kunikloj en laĝardeno

montriĝis tro aŭdacaj. Ŝi eltondis el ili bidojn, kiuj transformiĝis al la okuloj de la pupestaĵoj. La rezulto de la laboro fascinis la knabojn.

Ĝis la venonta dimanĉo, kiam la studentoj revenis, ĉiuj tri pupoj jam havis siajn vestojn.

En la pordego inter du ĉambroj de Jurjevskaja 27, oni etendis verdan litkovrilon por montri, ke venis printempo. Tilla sidiĝis ĉe la piano, la endoma publiko sidis antaŭ la verda kovrilo kaj la unua feino alflugis, akompanata de muziko. Delikate ŝi kliniĝis al la floro kaj ekflaris ties odoron antaŭ ol komencian rakonton. La scivola publiko atendis la rakonton. Zlata en la vualo de feino rekonis la orkoloran koltukon de Tilla. Knabaĉo aperis grandpaŝe. La muziko anoncis danĝeron. Li levis sian papilireton kaj kaptis la feinon. Ŝi singlutis, la orkolora tuko delikate sorbis la puplarmojn.

Post la premiero oni ripetis la teatraĵon por infanoj. Kiel ekscite! La etaj gefratoj de la najbaroj rajtis kunveni por vidi ion specialan. Grandaj fratoj malaperis post la tolo. Infanoj de la publiko ĉesis spiri kiam aperis la ora kaĝo por enfermi la feinon. Ĉiuj spire kaj voĉe kunlaboris por liberigi ŝin.

La feinon eblis liberigi per komuna klopodo en la pupteatro. Ekster la fenestro de Jurjevskaja jam rolis la unuaj rasaj leĝoj.

Monaton post la reveno de Tilla, estis arestitaj 165 zagrebaj judaj junuloj kaj senditaj al la koncentrejo en Koprivnica. Andrija Adler, Robert Abraham, Egon Adler, Drago Adjubel, Aleksa Altstedter, Jeŝua Atias. Tiel komenciĝis la listo, kiun tre baldaŭ neniu plu povis sekvi. Du monatojn post la reveno de Tilla el Beograd jam oni sendis la unuajn judojn al koncentrejoj el kiu reveno ne ekzistis. La urbeto Gospiĉ, la insulo Pag, la monto Velebit inter julio kaj aŭgusto 1941 akceptis 2500 judojn. Al ĉiu estis dirite kunporti etan dorsosakon ĉar ili estos sendotaj al laborkoncentrejo. Tiuj inter ili kiuj plej proksimis al la fenestro de la kolektejo *Zagrebački zbor*, kie ili estis enfermitaj, povis legi la skribaĵon de la libera mondo: videblis sur la konstruaĵo de la Franca Paviliono granda surskribo Liberté, Egalité, Fraternité.

En strato Draškovićevea 25 ekfunkciis oficejo de *Komitato por monkontribuoj de judoj por la bezonoj de la ŝtato*. Ĝis junio tie kolektiĝis cent milionoj da kunaĵoj. Pluraj judoj vere, kredis ke la fordono de la mono savos de persekutoj. Granda fera kaso kolektis ĉion eblan: kontantan monon, valorpaperojn, oraĵojn, ornamaĵojn.

Industriulo S. D. Aleksander disponigis antikvan manĝsalonon. Ne estis problemo kien loki ĝin, al marŝalejo de la nova ŝtato, al la oficejo de la altrangulo Kvaternik.

Tilla kaj Zlata tiam pri tio detalojn ne havis: 82 kolektiĝintaj skatoloj, la brilantaj ornamaĵoj troviĝis en 19 skatoloj, en 4 skatoloj per la kolĉenoj, en ses sakoj ormoneroj Napoleonaj. Kolektiĝis ankaŭ 680 orhorloĝoj.

La membroj de la Komitato kiu kolektis la posedaĵojn, pedanteme ĉion notis kaj enmanigis ĉiutagan raporton al la altranga oficejo, esperis ke tiel ili evitos ke ustaĵoj mem penetru en la loĝejoj kaj servu sin mem per la judaj posedaĵoj. Flustroj pri teruraĵoj rondiris tra la urbo.

Ekde oktobro 1941 la unuaj judaj entreprenoj de Zagrebo estis transdonitaj al ustaĵoj. Poste sekvis konstruaĵoj kaj aŭtomobiloj. Viciĝis la listoj de pianoj, peltmanteloj, kristalaj lustroj kaj mebloj. En Jurjevska 20, ne malproksime de Zlata, loĝis Oskar Sachs, judo, iama advokato el Zlata. La estro de ustaĵoj Pavelić persone garantiis al li ĉiujn arajn rajtojn ĉar li helpadis provizi monon dum ustaĵoj restadis en Italio. Tiu merito nun ne helpis. Li estis deportita, ĉar al iu funkciulo de ustaĵoj plaĉis lia loĝejo. Nur postmilite Tilla eksciis, ke la najbaro Sachs estis murdita en Stara Gradiška en 1943.

La 23an de majo 1941 sur la stratoj de Zagrebo aperis alvoko ke ĉiuj Judoj devas porti la judan signon. Sur la afiŝoj estis listigitaj tagoj kiam laŭ ABC oni distribuas la simbolojn. Vendredon je la 8a matene, la 23an de majo komenciĝis la distribuo por la personoj kun la familia nomo A ĝis D. La civitanoj povis transpreni sian signon ankaŭ por la suĉinfanoj. La unuaj beboĉaroj signitaj per la flava ĉifonpeco ekpromenis tra la urbo. La flavaj teksitaj rubandoj kiuj komence indikis judojn, ekde junio estis ŝanĝitaj per

flava tabuleto, per kiuj devis estis signitaj ĉiuj infanoj pli aĝaj ol 14. La flavajn tabuletojn la beboj ne devis porti... sed 9 087 plenkreskuloj transprenis ilin. Kontraŭ pago, kompreneble.

La arto estis en Jurjevska bela kaj efemera konsolo.

Kelkajn jarojn post la unuaj puplecionoj ĉe Tilla, Vlado kaj Radovan fondis la unuan ŝtatan pupteatron en Zagrebo. Por ili estis memkompreneble inviti Tilla al kunlaboro. Sen ŝi ilia laboro ne estis imagebla. Ili havis rajton elekti siajn kunlaborantojn kaj tiel ŝi ricevis sian unuan postenon en Zagrebo. Ŝi fariĝis kudristino de pupkostumoj. Teatra kudristino. Nek la teatro estis tipa nek la kudristino.



.....
*krampus – laŭ la aŭstrismo: diablo en infanrakonto

LA PAŜTISTO EL TRANSILVANIO

En la lasta aprila tago germanaj soldatoj haltigis la aŭton antaŭ la ĝardeno de Jurjevska. Tilla eliris en la ĝardenon por renkonti la majoron kaj ŝi preskaŭ svenis: li ĝentile anoncis ke morgaŭ matene instaliĝos mitraloj en la ĝardenon por defendi la urbon. Li venis inspekti la lokojn de la ĝardeno por decidi kie instali la mitralojn.

- Instaliĝi ĉi tie? - Tilla glutis la salivon, komprenite ke ŝiaj bedoj kun la partizana

arkivo servos kiel installoko por la laste muntotaj kvin germanaj mitraloj en Zagrebo.

La germano vidis ŝian paliĝon.

- Oni ne povas pensi pri viaj rozuoj tiutage, estimata sinjorino.

Ŝi jam eltrovis la manieron provi malhelpi tion.

- Estas mia devo atentigi vin, ke ĝuste tiu parto de la ĝardeno glitas. Vidu!

La breĉo en la muro je la flanko de la ĝardeno, kie kuŝis enterigitaj la vivdanĝeraj dokumentoj, servis kiel ĉefpruvo ke ĝuste tie ĉi la tereno glitas.

Tio estis ŝia plej granda rolo de specialisto pri statiko. La mitralo ne instaliĝis en la bedon de Jurjevska.

Necesis elteni ankoraŭ kelkajn tagojn.

La okan de majo 45, silento regis en la urbo. Stomakoj kunpremitaj. Hieraŭ forveturis el Zagrebo en la direkton de Aŭstrio la germana oficiro von Werner, la loĝanto de Jurjevska 27, kiu havis la taskon organizi Hitler-Jugend en Kroatio. Lia zagreba tasko fiaskis. Li ŝarĝis la aŭton per bomboj antaŭ la foriro. Tilla flikis lastfoje liajn ŝtrumpojn. Ŝi aŭdis per radio ke venis la fino al la nazioj, sed ĝis la lasta minuto ŝi kunlabore rilatis al li por ne malkovri sian ĝardenan agadon. Kiam li foriris ŝi elprenis el la subtegmentejo la malnovan kroatan flagon por kudri al ĝia mezo ruĝan stelon. Musoj iom ronĝis unu ĝian flankon, atendente ke pasu la jaroj de Hitler, la jaroj de ustaŝoj, de Sendependa Ŝtato Kroatio. La Singer-kudrilo de Zlata rapide riparigis la randon. La flago estu preta. Eble jam morgaŭ ĝi rajtos pendi. La Singer-kudromaŝino monotone zumis super la flago, kvazaŭ ĝi kudrus la veston de sorĉistino por teatraĵo. La ekscitojn la maŝino ne distingis.

La servistino, venis anhele por rakonti, ke pendas nova pentraĵo en la salono, tie, kie pendis Hitler. Ŝi vidis tion klare, oni vaste malfermis fenestron. Tilla aŭskultis kun amuzo: la najbaro kiu ne unu fojon gastigis ĉe la kartamikoj la rajtigitan germanan generalon en Sendependa Ŝtato Kroatio, Glaise von Horstenau, evidente tuj post la foriro de germanoj el la domo, unue mendis pentriston. La germana generalo kartludis *preferance* kun du siaj kolegoj, ĵetante la kartojn sur la tablo, sub la okuloj de Hitler. *Fuehrer* paradis sur la granda portreto surmure apud la tablo kun la karto. Nun kiam alproksimiĝis la malvenko, la lerta dommastro simple petis pentriston ŝanĝi la portreton.

La tasko ne estis simpla, ĉiuj rekonis la rigardon de Hitler, la lipharojn, la mienon. La pentristo estis lerta kaj senĝene el Hitler desegnis riĉaran paŝtiston el Transilvanio. En la mano Hitler ricevis kurban bastonon. Sur la uniformon venis longvila pelta jaketo. La montetoj en la fono ne devis esti ŝanĝitaj. La frizaĵon kaŝis pelta ĉapego. La rigardo de la paŝtisto restis severe direktita al la horizonto.

Tilla ŝatis preterpasi apud la najbara domo kaj subokule rigardis kiam la vento movis la kurtenon. Obskure videblis la transilvania paŝtisto, al imponaj, de tabako flaviĝintaj lipharegoj, evoluis la etaj tonditaj lipharoj de Hitler.

Tilla kapablis el malnovaj flagoj elkudri novajn, sed la najbaroj eĉ lertis pli ol ŝi: ili sukcesis el la oleoportreto de Hitler krei la senkulpan paŝtiston.

La paŝtisto ne estis hazarde elektita. Ĝi ne estis tute neŭtrala. Ĝi estis la simbolo de la malfajneco, kiu devis veni.

La persono kiu diskutis kun Renoir pri la mistero de ridetoj de gotikaj skulptaĵoj, dankis la Dion ĉar ŝi trovis la postenon de kudristino en pupteatro. Ŝia tirkesto en Jurjevka konservis iun malvalidiĝintan hondurasan pasporton. Ŝi devis elekti novan patrujon por povi ricevi dokumentojn. Por posteniĝi ŝi elektis la landon en kiu ŝi loĝis de post 1934: Jugoslavion. La lingvon de la lando ŝi daŭre ne regis. Eble estus pli simple pri Honduraso. La lingvo de ŝia nuna patrujo havis sep kazojn en singularo kaj sep en pluralo. Tiom da ŝanĝitaj formoj necesis lerni. Mankis al ŝi kuraĝo por eklerni aspekton de verboj. Aŭ mankis la obstino de Paul kiu kapablis lernigi ŝin. Zlata ne insistis. Ŝi ja faris ĉion eblan por mildigi la vivon de Tilla, ne por ŝarĝi ĝin.

Zlata provis nur unu fojon pri la vorto *djuvedj*, kiun Tilla ŝatis. *djuvedj*, *djuvedja*, *djuvedju*. Zlata diris, ke tio estas la turka vorto, sed ke ĝi devas uzi kroatan gramatikon. La kroatan deklinacion. Kiam Tilla senespere provis ripeti, Zlata rezignis.

Radovan kaj Vlado estis feliĉaj ke ili povis repagi al Tilla iom el tio kion ili ricevis el ŝia artsalono. Posteno de kudristino ne estis la plej prestiĝa pagmaniero. Ŝi almenaŭ restu en ia teatra etoso, ili esperis.

Kiam ŝi la unuan tagon en la nova laborloko metis sian pajlan sakon kun la kudrilaro sur la tablon, ŝi rigardis ĉirkaŭ si. De kie la bruego? La dekstra pordo ne estis fermebla. Tie estis la segejo, kie oni produktis pupteatrajn ilojn por la scenejo. La fera forno en la angulo varmiĝis ĝis ruĝo. De la dorso blovis la vento ĉiam kiam iu malfermis la pordon. Kaj oni malfermis ĝin ofte. Por diri iun banalaĵon de kies primitiveco frostiĝis sango en la vejnoj. Ĉar ĉe Zlata ŝi estis protektita de diversaj kruelaĵoj, kiu regis ekster la artisma domo. Nun ŝi sidis meze de ili. Kiel ŝi eltenos?

Nu, ek, al Petruška! Ŝi metis la fadenon en la buŝon por fake tranĉi ĝin per etaj mordetoj. La pupo naskiĝis en ŝia sino, kudrita el la ŝtofo el ŝia ŝranko. La dancistinoj ricevis vualojn el oraj fadenoj el ŝiaj iamaj ŝaloj. Ŝi

malligis siajn bidĉenojn por elkombini el ili papiliojn sur la vestoj de princino. Ŝi ŝatis starigi la veston malproksime de la okuloj por vidi *kiel ĝi funkcias*. La pupojn kiuj havis leĝerajn movojn de katoj ŝi preferis. Laste la pupo ricevis la kapon. Plej ofte el la maso el trempita gazetpapero en kiu oni laŭdis la unuan kvinjaran planon de la lando. Traktoroj de la titolpaĝoj ŝrumpis ĝis la nazoj de la pupknabinoj. Socialismo estis ankoraŭ freŝa, kruda, apenaŭ elirinta elsub la martelo. Ĝia serpo ankoraŭ ne malakriĝis.

Kiam ŝia amiko rezignis pri la direktora posteno en la teatro, kaj kiam venis iu bosniano por gvidi teatron, ŝi komprenis kion signifis, esti malestimata feĉo. Sur la bluzon ŝi daŭre metis iun restintan bidĉenon. Ĝi helpis al ŝi senti sin virine, dum ŝi en la kruda laborejo entiris fadenon en la kudrilotruon. Tion kion ŝi plej malfacile toleris en la nova ŝtato estis primitiveco. Ĝi abundis ĉie kien ŝi eliris. La hejmo ŝajnis des pli kulturplena.

La neĝo degelis per abundaj sonoj en truitaj ladaĵ defluiloj. Galantoj aperis en herbejo de la ĝardeno, eltirita per freŝa tuŝo de varmeta vento. Poste baldaŭ flave floris ribarbustoj en la ĝardeno. Tiam ekflavis kaŝtano. Oni alportis du cidoniojn por ŝia ŝranko. Tiel do jam odoras aŭtuno.- pensis ŝi kaj metis la cidonion sub la lampon en ŝia ĉambro. La lumo falis antaŭ la tri gvaŝstilaj desegnoj de Chagall. La cidonioj strange staris antaŭ la pentraĵoj de Paul Klee. Ĉevaloj, ursoj, cervoj, moviĝintaj tiel kiel kaptis ilin la granda skulptisto Gaul por ŝia kolekto. Budhajoj elŝiritaj el Azio, por porti feliĉon ĉi tien. Fajna kafotaso el blanka porcelano kun dentoj ĉirkaŭ la rando. Skatolo kun ŝminkaĵoj kiuj nun estis uzitaj por ruĝigi la vangojn de pupteatraĵ estaĵoj. Ivanuŝka, gaja rusa knabo, en lana kostumo. Brokataĵo kun strioj, fajna ŝarmezo oranĝkolora, por jupoj de ŝiaj feinoj. En kiu akto ŝi portis tiun koloron iam? En ŝia kapo turniĝis tutaj volumoj el la germana poezio, kiujn ŝi ne forgesis.

Ŝi mem desegnis ornamentriĉajn kostumojn por la veŝtoj de rusaj bojaroj.

Karikaturo pri la etoso de la zagreba puptatro. La persono kun longa fadeno en la mano estas Tilla Durieux, la kudristino de la teatro. Nu, jes la kudristino hejme disponis pri kelkmilvoluma biblioteko. Tiun ŝi dimanĉe matene malfermis al la vizitantoj. Tiam en la domo aŭdiĝis multaj lingvoj,

veraj, ne nur tiu, supera, de la arto. Tiu kiu ne unu fojon grimpigis larmojn al la okuloj, kiel ĉe gotikaj skulptaĵoj.

ZAGREB 1945, TEATRAĴO DE TILLA DURIEUX

Revene de la laboro, Tilla sidiĝis sur la tereson kaj malfermis sian striitan kajeron. Tie ĝis vespero, tagon post tago, dum la somero ŝi verkis sian unuan teatraĵon.

Tilla eksidiĝis frue ĉe la kajero: en la teatro oni komencis labori je la 7a. Oni frue komencas konstrui socialismon. Jam kelkajn minutojn post la tria ŝi estis hejme. Se ŝi diligentus, ŝi povus multon skribi posttagmeze. Por ŝia

verko ŝi unue havis la titolon: *Zagrebo 1945*. En la ĉefa rolo estis artaĵkolektanto Elva d' Andrade, subtenanto de partizanoj, loĝanta najbare de la domo, kie loĝas germanoj, okupantaj la urbon. La sinjorino, pasia pipfumanto kaj eĉ pli pasia kolektanto de artaĵoj, posedas ankaŭ kelkajn skulptaĵojn de Paskinsulo... kiuj konfuzigos germanojn dum la traserĉo de ŝia domo. En la verko ŝi estas vidvino de portugalo, fremdlandano, do iom pli bone protektata ol la surlokuloj. Tial ŝia kaŝlaboro por partizanoj povas okazi sufiĉe efike: ŝi enterigas en la bedojn de la ĝardeno sekretajn partizanajn dokumentojn per infana ŝovelilo. La nomon al la sinjorino Elva donis ŝia plej bona ligilo al Portugalio – la iama instruisto pri kantado, fama portugala operkantisto d' Andrade. Ŝi trovas en la bedoj de la ĝardeno la kaŝejon por la vivdanĝeraj dokumentoj, enfosigante ilin per infana ŝovelilo. Malsananan junulon fuĝintan el germana koncentrejo, Elva kaŝas en kokejon kiam germanoj venas traserĉi ŝian domon. Ĉirkaŭ ŝi turniĝas la herooj de la najbara familio: Nada, enamiĝinta al la germana oficiro kaj ŝia fratino Boĵa, kunlaboranto de la subtera movado. Kun Elva rifuĝe loĝas Vesna, junulino kaptita surloke en ĉambro de komunisto, kien ŝi venis preni dokumentojn kaj enfalis en policistan kaptilon. Vesna estis grave vundita ĉe la piedoj en malliberejo en Savska strato. Ŝia patro estas konata generalo, kontraŭbatalanta partizanojn en Bosnio. Li elpelis Vesna el la gepatra hejmo, kompreninte pri kio okupiĝas lia filino, perfidulino kiu helpas al la partizanoj.

- Germanio iam lumis per scienco kaj fabelo, per popolkantoj kaj arto. Nun ĝi estas

amaso da fatraso.

Elva rakontas kial ŝi helpas al la arbaranoj:

-Malsato pri justeco. Nur satuloj estas akuzitaj maljuniĝi, ili estas la malfeliĉo de la burĝaro.

Elda kun la helpantoj peris pli ol kvindek homoj al la arbaro. La estontecon ŝi ne imagis en rozkoloraj tonoj.

- Ne esperu tro multe. Necesos granda pacienco kaj toleremo.

Ŝi klarigas kial ŝi loĝas ĉi-loke:

-La aero ĉi tie estas plenŝtopita per ideoj. Ili min konkeras. Ne helpas fermi la

pordon. Tra la pordseruro ili envenas.

- Hodiaŭ je la 19a horo necesas porti dokumentojn je la vojkruciĝo inter Marti'eva

kaj Draškoviĉeva. Alportos ilin Djuro en cigaredskatolo. Funde de la skatolo ili estos. Tuj enterigi.

La germano en la domo konversacias kun ŝi:

- Ĉi tie la fikliniĝema Oriento renkontiĝas kun la malfidinda Aŭstrio. Vane ni klopodas enporti iom da prusa spirito.

Tiel klarigas la germano al ŝi. Jam estas aprilo 1945 li ankoraŭ kredas je V3, la

mirakla armilo kiu venkigos Hitler.

Tilla lasas lin kredi. Ŝi ankoraŭ ne scias ke V3 estas ankaŭ la nomo de la klaso en la lernejo en Kragujevac, proksime de la loko kie, haltis ŝia trajno survoje al Skopje 1941. En tiu klaso ĉiuj klasanoj kaj instruistoj estis samtage mortpafitaj.

Tilla priskribas Zagrebon kian ŝi vidis ĝin: ĝi estis dividita, aŭ porustaŝa aŭ kontraŭfaŝisma. Ne troveblis neŭtraluloj. La intelektulojn ŝi lokis al la flanko de kontraŭfaŝismo, inspirita per la scio ke 90% de la zagreba teatra ensemblo estis tia.

La verko prezentas la enhejman etoson de la ĉefurbo de Sendependa Ŝtato Kroatio kiam polica horo komenciĝis je la 20a. Ĝi finiĝas per alveno de partizanoj en la urbon. La kurteno fermiĝas kiam ili eniras la straton: Dabiŝa, la juna fuĝinto el germana koncentrejo mortas, dum Boža malfaldas la novan flago sur la fenestro.

Zagremano sentas ke la verko okazas en Jurjevska strato, rekonas pli ol la ŝtuparon al la ĝardeno.

Zlata tajpis 57 paĝojn kiam Tilla finkorektis ilin. Fakte, jam ie ĉe la trideka paĝo Zlata verŝis sur siajn fingrojn bolantan akvon kaj devis interrompi la tajpadon. Tilla volus ĝin fini. Ili engaĝis fidindan tajpistinon, Jelena. Ŝi tajpis rapide kaj senerare kaj ŝajnigis ke ŝi ne komprenas kion ŝi tajpas.

Ĉe la fino ŝi tamen montris komprenemon. Ŝi rakontis ke ŝi estis sekretariino en Esperanto-klubo en Primorska. En majo 1941 venis iu ustaŝo

en la oficejon, salutis kaj ĉirkaŭrigardis. Okule li mezuris la altecon de la ejo. Ŝajne kontentiga.

- Ĉu vi laboras tie ĉi? - demandis li al Jelena, staranta ĉe la arkivejo.

- Jes.- Jelena atendis kio sekvos.

- Morgaŭ vi ne plu devas veni labori ĉi tien.

Tio estis ĉio kion li diris.

Jelena komprenis. Ŝi ne plu reiris al tiu adreso.

- Ĉu vi scias kio okazis pri la ejo? – demandis Zlata.

- Jes, mi scias. Li ankoraŭ loĝas en ĝi. Mi vidis preterpasinte ke li metis pli luksajn kurtenojn.

Tilla ne povis trovi grandan koverton kiam ŝi volis enpoŝtigi la manuskripton de

la teatraĵo al sia amikino en Svislando. Zlata helpis eltranĉi la koverton el la papero. Ili faris gluaĵon el kulero da faruno kaj akvo kaj ekspedis ĝin. Stadttheater Luzern 1946 prezentis ĝin. Susrcenigis ĝin Paul Schill. Ĝi estis surscenigita kvar fojojn. Emmi Reinhardt prezentis la rolon de Elva. En la programo estis skribita la datoj al kiuj rilatas la verko: 27 de aprilo ĝis la 8a de majo 1945.

Neniu pensis ke Tilla povus partopreni premieron. Monon por vojaĝi ŝi ne havis.

Inter Zagrebo kaj Luzern tiom da vizoj necesis. Ŝia malvalidiĝinta pasporto hondurasa trovita en iu tirkesto en la hejmo de Zlata post reveno el Beograd, helpis al ŝi ricevi novan pasporton, jugoslavian. Sed la pasporto pretiĝos nur kelkajn jarojn post la premiero en Svislando.

La amikino sendis al ŝi etan artikolon el *Neue Zuericher Zeitung*. La komentoj el *Basler Nationalzeitung* kaj *Der Bund* Tilla ne ricevis. La verko ne havis longan vivon sur la svisa scenejo. Verkita en la germana, ĝi ĝis la jaro 2002 neniam sursceniĝis en Kroatio.

En ŝia biografio la dramo ne okupas gravan lokon. Ŝi forĝis mencii ĝin. Simile ŝian libreton pri pupteatro kiun oni eldonis en Zagrebo *Tajloro en pupteatro*. Aŭtoris ĝin Tilla Durieux, la pupteatra kudristino.

LA ĜENERALA DEMANDARO

La 5an de novembro 1949. Ŝi skribis la daton sur la dokumento per sia fontoplumo *Pelikan* donacitan de Paul ĉe ilia dua renkontiĝo. Tiam ŝi ne povis trovi skribilon en sia sako, li rigardis ŝin fosanta en la sako kaj rapide etendis la sian. La pelikano trinkis daŭre la inkon kiun ŝi enmetis en la valizon ĉe la foriro el Berlino. Survoje al Prago, ŝi subite pensis, ĉu tiu inko elfluos kaj makuligos la tutan valizon. Iel la enŝraubita kovrilo montriĝis indulga - ĝi eltenis ĉiujn pakadojn ĝis Zagrebo.

Nun la pelikano sur la ora plumo trankvile transiradis de rubriko al rubriko. Ĉiuj laborantaj en la teatro ricevis la saman formularon de la sekretario.

-Ĉu mi povas transdoni ĝin morgaŭ? - Tilla petis. Ŝi volis konsultiĝi kun Zlata pri vortumoj. De tiu formularo ŝajne dependos la daŭrigo de la posteno kaj iel ŝi ne fidis al ĉiuj pri la konsiloj.

Zlata helpis frizi la frazojn por povi reteni la laborlokon en la laborista ŝtato.

Gepatroj D-ro Richard Godeffroy kaj Adela nask. Hrdlicka. La patro estis profesoro pri kemio en Vieno. Li vivtenis sin de la salajro. Li ne disponis pri aliaj posedaĵoj, ankaŭ patrino ne. La patrino naskiĝis en Zemun.

Post la finitaj studoj mi dum mallonga tempo atingis elstaran pozicion kaj gvidajn rolojn sur la germanaj teatraj scenejoj. La plej grandajn sukcesojn mi havis en la teatraĵoj de prof. Max Reinhardt.

-Ĉu tiel?

Cerbumis la du kapoj.

-Lasu tiel, se iu kontrolos, ili havu. Akcentu la laboristan laboron, ekzemple:

-De post la jaro 1908 mi okupiĝis pri sociaj problemoj kaj mi havis konstantajn rilatojn kun la maldekstrulaj rondoj unue en Berlino poste en Munkeno.

-Diru ke la tiama registaro persekutis vin.

-Sed persekutis min nur la familianoj de Paul kiuj ne povis toleri ke mi rilatu al Rosa Luxemburg. Ili konsterniĝis kiam atingis ilin la informo ke mi recitas al laboristoj dimanĉon matene en la antaŭurboj, akompanata de la piano. Paul ne nervoziĝis. - Faru kio donas al vi plaĉon. -Li nur tiel rezonis.

-Metu tiel: Tio kaŭzis la persekutojn de la flanko de la registaraj rondoj.

-Sed la persekutoj, tio ne estis vera.

- Ne gravas metu tion ĉi tie. Vi ne povas diri ke oni ne persekutis vin. Ĉar vi devos poste rakonti ke vi estis edzino de industriulo. Tiel vi havos kontraŭpezon.

-En la jaro 1910 mi edziniĝis al arthistoriisto kaj eldonisto Paul Casirer. Li forpasis en 1926.

-Ĉu bone?

- Sonas bone.

-En 1930 mi edziniĝis al, kion mi diru pri Lutz?

-Diru la veron. Diru ke li estas industriulo.

- En la jaro 1930 mi edziniĝis al industriulo...

-Kiam Hitler alvenis al la povo mi kun mia edzo...

-Oni diras transprenis la povon.

-Kiam Hitler transprenis la povon, mi kun mia edzo

-Ne diru edzo, sonas tre burĝe, diru kamarado.

-Amuze, kamarado Lutz. Bone.

- Kiam Hitler transprenis la povon mi kun mia kamarado forlasis Germanion. Tiam dum unu jaro ni vivis en Svislando. Ni ricevis ŝtatanecon de Hondurasa Respubliko.

- Ĉu tio sonas bone?

- Sonas fantaste kaj neverŝajne. Sed lasu tiel, tiel estis.

- En la jaro 1934 ni alvenis al Jugoslavio kaj loĝis ĉe mia parenco Zlata Lubienski.

- En la jaro 1941 GESTAPO kaptis mian kamaradon kaj deportis lin al Germanio.

- Ĉu mi skribu kie oni kaptis lin? Ĉu mi menciu Thessaloniki?

- Prefere ne faru. Oni demandas vin kion li faris tie.

- Li pereis en 1943 en koncentrejo.

- Ĉu mi diru kiu koncentrejo?

-Ne faru, vi ne povas pruvi. Ni havas nur la leteron de Estella.

-Vi devas aldoni ke vi helpis al naciliberiga batalo ĉi tie:

-Mi aktive partoprenis en Naciliberiga Batalo kiel malantaŭfronta aktivulo.

-Mi aktive partoprenis en Naciliberiga Batalo kiel malantaŭfronta aktivulo.

-Ĉu estus pli bone meti fonaktivulo? Ne, lasu tiel.

-Ĉu mi metu la tutan vorton Naciliberiga Batalo aŭ la mallongigon?

-Ne. Sufiĉas diri N.L.B.

-N.L.B. kun punktoj post mallongigoj, tiel?

-Aldonu ke vi estas membro de Asocio de batalantoj.

-Membro de Asocio de batalantoj? En mallongigo?

-Ne, skribu la tutan frazon.

-Vi relegu ankoraŭ foje.

-Kiel sonas?

-Donu la plumon. Mi korektu. GESTAPO ne estas feminina.

-Sed policio estas feminina.

- Jes sed vi skribis mallongigon, do, tial maskulina formo.

La pelikano sur la ora fontoplumo, kiu autografis bildkartojn kaj kontraktojn, ankaŭ tiun pri la donacado al Erwin Piscator, nun bektuŝis GESTAPON por ŝanĝi al ĝi sekson.

-Ĉu bone tiel?

-Perfekte. Se mi estus via ĉefo, mi akceptus senŝanĝe.

Tilla zorge sen faldado metis la paperon en ĉifitan dosieron el kiu ŝi iam parkeris siajn rolojn kaj portis ĝin la morgaŭan tagon al la teatra administrejo.

Zlata vespere enverŝis brandon en etajn kristalajn glasojn. Ili tostis al la espero pri la plilongigo de la posteno.

Instituto pri literaturo kaj teatrologio de la Kroata Akademio de artoj kaj sciencoj havas ankoraŭ unu dokumenton de la jaro 1953. Dokumento kiu pruvas, ke Otilie Godeffroy, naskiĝinta en Vieno la 18an de aŭgusto 1880, jugoslavia ŝtatano de 1950, ricevas permeson pri ŝanĝnomo de Godeffroy al

Durieux, laŭ propra peto. En la rubriko kialo: la pelikana plumo al kiu la literojn diktis Zlata, diligente notis: per tiu nomo la petanto estas pli konata en sia artista laboro.

La lasta stampo kiu konfirmas ŝian postenon en Ŝtata pupteatro portas la jaron 1952. Tilla Durieux havas la postenon de artista tajloristino. Tiel skribis la ora plumo sur la malfajnan paperon de la ĝenerala formularo.

La diktaĵoj de Zlata helpis.

Tilla Durieux ricevis pasporton en 1953. En rubriko profesio la oficisto senorname entajpis la veron: tajloristino. Artista tajloristino en la repertuaro de oficisto ne ekzistis. Artistoj nur en la unuaj jaroj post la milito meritis estimon, poste ili jam estis suspektataj. Tajloristoj apartenis al la laborista klaso, pri tio ne estis dubo.

Nek Tilla nek iu ajn en la teatro sciis ke ŝia vera nomo Godeffroy apartenas al la historio de la pupteatro. En Belgio iu brusela familio dum la tuta dudeka jarcento

rakontis historiojn de Godeffroy de Bouillon kiu batalis en krucmilitoj . Strange sonis la metalaj ŝildoj de la herooj kiam ili atakas per siaj brilaj glavoj. Tilla ludis por la germanaj soldatoj dum la unua mondmilito en Bruselo. Gastigis ŝin generaloj kaj koloneloj. La eta familia scenejo kun la heroo Godeffroy estis fermita dum ŝia gastado en Bruselo . La plej juna filo, tiu kiu tenis la fadenotenilojn de la Godeffroy estis ĉe la fronto. Lia mano kutimiĝinta al la senkrampfa tenado de la fadenoj, trafadis tre bone. Kiam Tilla revenis labori en la hospitalo kaj asistis al sia ĉefo ĉe la kruramputado, ŝi ne pensis pri la kuglosendinto. La kuglo bone celinta, venis el la lerta pupista mano, kiu al ŝia familia nomo rilatis.

LA REĜISORO APERIS

La ĉapelo el nigra pajlo, moda ateliero Martha Mann, Berlino, 1925.
Blanka ŝalo el travidebla silko kun geometra teksado, Germanio 1915-1920.
Tiuĵ du estis en ŝia valizo kiam ŝi venis en Zagrebo kaj rolas daŭre, nuntempe. La ŝranko ĉi foje estas el vitro. Ĉambro de Tilla Durieux, en la Muzeo de la urbo Zagrebo.

Al la muzeo mankis mono aranĝi la ĉambron kiel planite. Por aĉeti diskojn kun ŝia voĉo neniam troviĝis sufiĉe da rimedoj. Tial vizitanto ne povas puŝi butonon por aŭdi ŝin. Sed oni povas vidi tion, kion ŝia germana heredanto disponigis al Zagrebo. Kiam Tilla revenis al Berlino, ŝi volis preni siajn artaĵojn kun si. Tio montriĝis neebla. Leĝo malpermesis elporti artaĵojn el Jugoslavio. Tilla ne havis dokumentojn ke ŝi importis ilin el Germanio, ŝi ja kontraŭbandis ĉion kun si al Zagrebo. Kiel pruvi ke la artaĵoj apartenas al Germanio? Malgrandajn artaĵojn ŝi rekontraŭbandis al Berlino. Kun ĉiu vizito al Berlino iu skulptita besteto de Gaul revenis tien kie ĝi estis kreita. La

grandaj objektoj ne estis transporteblaj. La kolekto enhavis pli ol tricent artaĵojn. La valoraĵoj estis sen dokumentoj pri importado. Ŝi provos multon ĉe diversaj instancoj, sed ne helpis. La pentraĵojn ne eblis revenigi al Berlino. Laŭdire Willy Brandt* intervenis ĉe Tito**. La interveno ial ne donis rezulton. Aŭ Willy Brandt ne obstinis sufiĉe, aŭ Tito obstinis tro.

Zlata provis solvi la problemon: ŝi donis al Tilla la oraĵojn hereditajn de la onklo episkopo kaj konservis la kolekton de Tilla ĝis la problemo iel solviĝos.

Tilla prenis paperon kaj skribis rapide skizitan dokumenton ke ŝi transprenis la oraĵon.

Post la morto de Zlata, Tilla per tribunalo repostulis sian kolekton. Boris, la filo de Zlata, ne volis cedi. Li ja havis paperon subskribitan de Tilla ke ŝi transprenis la oraĵon de Strossmayer kaj lasas sian kolekton al Zlata: kolĉeno el 25 brilantoj, ora broĉo kun etaj smaragdoj, orelringoj kun brakringo, du etaj orĉenoj por horloĝoj, broĉo el ametisto, du orelringoj kun trifolioj, ringo *Rauchtopaz* kun diamantoj, brakhorloĝo kun serpentoj, etruska ornamaĵkolekto, broĉo-insekto, orelringo kun grandaj perloj, broĉo-kapo de tigo kun perlo en la buŝo. Longis la listo de oraĵoj kiuj foriris kun Tilla al Berlino. La oraĵoj neniam revenis al la familio Lubienski. Ili restis ĉe Tilla.

Komenciĝis tribunalaj sesioj. Kiel ĉiu bona socialisma tribunala kazo, ankaŭ tiu bezonis multajn jarojn ĝis la fino. Tilla jam mortis, kiam la amikino, ŝia heredanto venkis kaj rajtis elporti la artaĵojn el la lando.

Kiam la amikino de Tilla Erika Danhoff alportis ĉion al Berlino, ŝi trankvile rezonis: Tilla en Zagrebo vivis dudek jarojn. Al la urbo ŝi ŝuldas ne nur la dummilitan protekton, postenon, sed tiom da fidelaj geamikoj. La urbo havas la rajton posedi ion el ŝia postlasaĵo. Denove ŝi ekstraktis kun la urbaj kulturaj instancoj. Kion ili ŝatus havi?

En Zagrebo estis formita la komisiono kiu rezonis peti ion el la privata vivo de Tilla, ion el ŝia kolekto. Kaj la aĵoj kiuj foje loĝis en Jurjevka 27 denove ekvojaĝis de Berlino al Zagrebo.

Post ĉiuj necesaj tribunaj subskriboj, 19 artaĵoj oficiale revenis. La portreto de la avo Hrdlicka inkluzive.

La rakonto fluis ne tiom rapide.

Tilla la unuan fojon forlasis Zagreb en 1954. Unue en la ĝardeno de Jurjevka strato aperis germana filmreĝisoro. Li venis interesiĝi ĉu ŝi ŝatus roli en lia filmo.

Ne pasis ankoraŭ plenaj dek jaroj de post la lastaj germanaj pafoj. Zagrebo havis bonan memoron. Germanoj filmi tien ne venu. Post la milito li estis la unua germana reĝisoro, kiu de tre alta loko ricevis permeson filmi en Jugoslavio. Dum diversaj esploroj en la urbo, kiujn li faris, serĉante partnerojn por sia nova projekto, troviĝis helpanto, kiu pretere menciis al li ke en Zagrebo loĝas iu germana aktorino Tilla Durieux. Ĉu li ne konas tion?

-Iu Tilla Durieux? Povas esti nur la Tilla Durieux.

Li en la kvindekaj bone memoris la nomon, kiu brilis en la berlina teatro antaŭ dudek jaroj. Kie trovi la aktorinon? La filma teamo ĉirkaŭ li ne multon sciis. Iu memoris. Ŝi ja kudras pupojn en la teatro. Ŝi loĝas en la domo Lubienski.

-Kudras pupojn en pupteatro? Bizare.

Sinjoro reĝisoro trovis la domon Lubienski. Tiautempe la Kolekto Lubienski estis jam oficiale protektita. La membroj de la Komisiono pri protektado kaj konservado de artaĵoj trinkis ĉe Zlata kafon la 30an de oktobro 1945. La ŝtato estis juna, sur la dokumento ankoraŭ slogano *Morto al la faŝismo - Libereco al la popolo*. Grga Gamulin subskribis la akton numeron 25406- VII-D. La unua dokumento portas la numeron 315 el la jaro 1945. Plia oficialigo de la kolekto Lubienski alvenis en la jaro 1947. La dokumento numero 816 celas protekti la kolekton. La 28an de februaro 1948 revenis la komisiono al la domo Lubienski. Ĉi foje por listigi la konsisiton de la kolekto Durieux, je la adreso Jurjevka 27, en la domo Lubienski. La protokolo notis ke la Kolekto Durieux estas aparta de la kolekto Lubienski. La protokolisto komprenis ke sub tiu tegmento renkontis sin du neripetebaj virinoj kaj ke ĉiu el ili havis sian propran artkolekton. En la titolo de la protokolo oni kunligis ilin per streketo: Kolekto Lubienski-Durieux.

La fera pordo knaris kiam sinjoro reĝisoro envenis en la korton. Akompanis lin blonda tradukantino. Post la malvenko de Hitler la germana fascinis neniun. Paroli publike la germanan en la fruaj kvindekaj signifis kvazaŭ esti berlina aliancano. Lernis la germanan neniun plu ĉi tie, kie ĝi en la mezo de la 19a jarcento estis la oficiala kaj la ĉefa lingvo.

Unue la sinjoro vidis grandan nigran katon, kiu saltis de ies sino kaj kun rektigita vosto direktiĝis al li. La persono en kies sino kuŝis la kato ĝis antaŭ kelkaj momentoj, levis la kapon, por vidi kiu venis en la korton. La reĝisoro tuj rekonis la personon en la kuŝseĝo. La haroj griziĝis, la vizaĝo iom faldiĝis, sed la vervo kaj la brilantaj okuloj restis. Ne unu fojon li foliumis teatrajn historiojn.

Apud la kuŝseĝo korbo kun kudriloj kaj fadenoj. Peco de ŝarmez-tekŝaĵo en la koloro de briko, pendis el la korbo. La pupo ne havis kapon, nur ĉapo pretis el la blanka organdio. Turkisa muslina tuko buligita. Papilio el vitro kuŝis en la herboj.

Tilla jam tiom da jaroj profunde en la senornama mondo de la socialisma slogano *Morto al la faŝismo - libereco al la popolo* iom ridete aŭskultis la ĝentilaĵojn de la germana skolo. La reĝisoro salutis en ŝi la historion de la germana teatro. Tion ŝi jam preskaŭ forgesis.

-Brandon?

Li malfacile rifuzis.

-Ĉu ŝi akceptus reveni, denove ludi sur la scenejo? Tilla ŝatis lian ŭsonon en la vorto *scenejo*. Tiom da jaroj ŝi jam loĝas en la mondo, kiu ne kapablis prononci ĝin, ke nun ŝi nur atendis ke li rediru la vorton. La reĝisoro ne komprenis kiom lia prononco plezurigas ŝiajn orelojn.

-Reveni? Al Berlino? Ha, Berlino estas pasinteco. Reveni al la teatro? Nun?

Ŝi jam metis spongon super Berlino - argumentis ŝi konvinkite.

-Spongon?***- Aŭdis Ivkica alportante la brandoglasojn. La reĝisoro ne ridetis pri la germanaĵo, por li ĝi estis natura. Tilla ja kondukis kvazaŭ ŝi per iu bone trempita spongo forviŝis ĉion kio ŝi estis por la germana teatro.

-Ludi en lia filmo ĉi tie? Filmaktoradon mi fakte neniam aparte ŝatis. Mi neniam estis *iu beleco*****. Sed pri kio temas?

Tiu konversacio gvidis al ŝia unua profesia engaĝiĝo ekster la pupteatro.

-Pasis kiom da jaroj? -

Ŝi ne tuj sciis respondi.

- Pli ol dek, ŝi diris lakone.

La reĝisoro promesis rekontakti ŝin kiam li revenos kun la teamo.

Revene al Germanio li publikigis, ke li parolis kun la fama germana aktorino Tilla Durieux en Zagrebo. Tie ŝi posedas marionetan teatron. Tiel la gazetoj. Nek marioneti nek posedi. La ulo eble ne povis kredi ke ŝi vere estas kudristino en ŝtata pupteatro. Havi modsalonon, tio ankoraŭ estus kompreneble por la aktorino kiu dum plena jardeko diktis modon al la tuta Berlino. Sed kudri robojn de pupoj... En lia imago, la sola pupo kiun li konis estis la pupo Kasperl, la foirpupeto de vojaĝantaj pupistoj, kun neglektita vesto. Kasperl ŝajnis tro primitiva okupo por ŝi. Tial verŝajne la ĵurnalo levis ŝian postenon al la nivelo de marionetoj. Sonas je ereto pli bone.

Ŝi ne marionetis. Ŝi kreadis bastonpupojn, specialan tipon de la pupo kiu estis ŝatata en Zagrebo. Por siaj kolegoj ŝi verkis lernilon pri marioneta teatro. Pri pupteatro, en la jaro 1951. Ŝi desegnis la vestojn de la rusaj bojaroj kaj de simpla Ivanuŝka. Veluraj jupoj en kiuj ŝi reverencis al la publiko en la teatro de Max Reinhardt jam fariĝis manteloj de dikaj bojaroj kaj la ĉerko por Neĝulino. La ornambidoj el ŝiaj ĉapeloj fariĝis butonoj sur la noktvesto de Dornulino. La ŝalo kiun donacis Paul kiam ŝi feliĉe alteriĝis el la flugbalono fariĝis la robo de la feino. Ja ĝi daŭre flugis. La pelta ĉapo kiun ŝi surhavis por flugi kun la fratoj Rumler nun lupe saltis sur la scenejo en la teatraĵo *Peĉjo kaj la lupo*.

-Envere. Ne povas iu vesto havi pli bonan sorton ol danci post la uzo laŭ la muziko de Prokofjev****. Fascinas min la nova vivo de miaj vestoj! Ĉiuj tiuj aĵoj faris karieron.

Zlata helpis en ŝia plezuro kaj alportadis el siaj lignaj kestoj vestojn de pasintaj jardekoj. La juna ŝtato, kies plej granda riĉo estis nur muskoloj de la junularo, vendis en la vendejo kaŭĉukajn botojn por la kvinjara plano kaj vastajn laboristajn vestojn. La socialisma Zagrebo silkaĵon malestimis kiel burĝaĵojn. Partizaninoj kiuj portis dum ĉiuj militaj jaroj blankajn silkajn bluzojn kudritajn el paraŝuto, laciĝis de ili. La virinoj en la postmilita Zagrebo sopiris al nilono. Nilonaĵo estis estimata. Silkaĵoj troveblis abunde en la ŝrankoj de burĝoj kaj en vitrinoj de muzeoj. La plej belaj silkaĵoj troveblis ĉe Tilla Durieux. Ili odoris je la lukso de la germana teatro, antaŭ ol la brunĉemizulo ekkriis la unuan fojon

-For la judinoj!

Profesoro Ŝkreb invitis ŝin gastlegi por studentoj de la germana. Ŝi elektis Rilke. La studentoj ne komprenis bone, kiu estas tiu virino leganta en ilia studĉambro, sed tian Rilke kiel tiun horon ili aŭdis neniam plu.

La teatra desegnisto de la scenejoj krokizis etoson en la teatro. La persono kun la tro longa fadeno kaj kudrilo en la mano estas Tilla. Skulptisto faros la kapon de la pupo, trempante multan gazetpaperon por ricevi materialon por siaj modeloj. Kiam li volis krei drakon, ĉiu alportis iun gazetpaperon, ĉar la drako estis vorema. La ŝtato kiu apenaŭ demetis la soldatan mantelon ne havis paperon. En necesejoj pendis ete tranĉitaj gazetpaĝoj sur dika najlo.

*Antaŭ ĉiuj, en soldatmantelo vestita,
marŝis la libereco, nia unua amo.******

Tilla ne multe komprenis pri kio parolas tiuj uloj ĉirkaŭ ŝi. Estis al ŝi absolute klare ke el la knaboj el ŝiaj dimanĉaj akceptoj en Jurjevaska elkreskis direktoro de la unua ŝtata teatro. Kaj ke li organizis por ŝi postenon tuj kiam la eta aktora grupo el Jurjevaska atingis la nivelon de la ŝtata teatro.

Sed kiam li ricevis stipendion por studi en Parizo kaj forlasis la direktoran postenon, sufiĉis alrigardi la novan direktoron, por kompreni ke venas dura tempo por ŝi. La unua direktoro estis fajnolo, prezenti al li sian koncepton de vesto, estis arta konversacio.

La nova direktoro kredis ŝian postenon superflua. Li neniam havis paciencon alrigardi ŝian vestokreaĵon por la pupo. Super pupvestoj lia rigardo glitis kiel super blanka papero. Lia ĉefo zorgo estis - forigi la burĝajn temojn.

-Kiu estas tiu Granda Joĉjo, kiun ni nun surscenigos? - demandis Tilla hejme.

Zlata rakontis pri naciheroo el Istrio kiu defendis siajn arbarojn kontraŭ Venecio.

Tilla malfermis enciklopedion por informiĝi kiel aspektas popolkostumo en Istrio por vesti Grandan Joĉjon. Ŝi distranĉis la nigran bidan zonon en kiu ŝi festis la novan jaron 1924 por vesti la venecian kapitanon por la diboĉfesto. Nur Zlata havis komprenemon por la diboĉkostumo. En la teatro neniu rimarkis tian fajnan stildiferencon.

Mici, la nigra kato hejme, lasis sin karesi.

Ivkica en la kuirejo aldonis akvon al la ĝuveĝaĵo, la rizmanĝo kiun Tilla ŝategis.

- Ĉu vi kredas ke tiu reĝisoro revenos kaj ke mi rolos en la filmo?

-Li revenos. Vi rolos. Vi ŝatos. - asertis Zlata kuraĝige kaj kaŝis sian timon. Ŝi instinke sentis ke tiu filmo povus ŝteli Tilla de ŝia hejmo kaj de Zagrebo.

Li revenis. Ŝi rolis. Ŝi ŝatis la rolon: bosnia vidvino en popolkostumo, kiu fordonas sian plej grandan trezoraĵon: la botojn de la mortpafita filo. La filmo nomiĝis *La lasta ponto*. La partnerino estis Maria Schell. La sukceso. Helmut Käutner, la reĝisoro, ne sola ĝojis pri la sukceso. Tuj sekvis la invito al Berlino.

-Ĉu mi akceptu?- demandis Tilla mire. Ŝi akceptus eĉ se Zlata konsilus ne.

Zlata konsilis jes. Kaj pruntis al ŝi siajn pluvŝuojn por tiu aŭtuna foriro. Kaj pezkore pakis du dikajn pantranĉojn kun lardo kaj kapsiko, klopodante kaŝi kiom ŝi timas ke ŝi perdos Tillan.

-Mi ne faru scenojn! Ŝi ja estas ĉi tie dudek jarojn! Ŝi iru vidi la mondon!

El tiu urbo tiom da homoj foriras. Ŝi venis al ni kaj restis dudek jarojn! Kion mi volus pli?

Tilla foriris. Tilla revenis. Zagrebo estas ŝia hejmo.

En la valizo - ĉokoladoj. Oranĝoj en silka papero. Fajna blanka bluzo por Zlata, aĉetita de sia unua postmilita berlina honorario. Kaj ŝi rakontis al Zlata ke tie, kie estis detruitaj domoj, oni jam malfermis la unuan silkvendejon. Sed ke ŝi ne havis kuraĝon viziti sian Viktoriastr. Ŝi ne povis vidi la malplenen, tie kie en ŝia kapo staras la hejmo kun girlandoj sur la plafono.

Ŝi konfesis al Zlata ke por ŝia unua berlina sursceniĝo ŝiaj gamboj tremis pli ol por la unua sursceniĝo de tirola knabo en Olomouc. Ŝi sciis ke ŝi estis malbona. Ŝia lango estis peza, ŝia korpo neregebla. Ŝi havis la senton ke oni apluaŭdas al ŝi pro ĝentileco la 30an de septembro 1952 en Schlossparktheater en Berlin.

Oni vokis ŝin al Teatro ĉe Kurfürstendamm. Ŝi sentis ke ŝi estis iom pli bona. Ne estis facile. Ne eblis tuj enŝaltiĝi. Laste antaŭ Berlino ŝi rolis en 1940 en hejma skeĉo en Jurjevka. Eĉ Lutz lasis sin kunroli kun infanoj de

Zlata Vlasta kaj Boris. Boris ludis mornulon kun silka kravato, Vlasta koketinton kies punktoj elrigardis el la subjupo.

Nun denove la dorlotita publiko sub la veraj reflektoroj.

Ŝia germana, kiun ŝi ekzercis en la versoj de Heine kaj Rilke dum la germana sieĝo en Zagrebo, havis etan kruston de rusto. Ŝi forigis ĝin per obstino, simile kiel servistino en ŝia hejmo briligis arĝentaĵojn, en la tempo de la viena betulo. La duan fojon estis pli malfacile komenci. Je ŝia kariero kuŝis hipoteko de la antaŭa gloro. Heinrich Mann ankoraŭ konsideris ŝin la enkorpiĝo de la moderneco. *Ŝia personeco, rafineco kaj scio, nervoza energio, elano de la talento.- skribis li.*

Rafineco dronis dum la dudekjara ĝardenlaboro pri sepdek kvin kunikloj. Malfajniĝis la supera tavolo de ŝia iama personeco. Necesis revoki ĝin el la fundoj. Ŝi eklaboris pri revokado.

Eldonejo Harbig petis la permeson eldoni ŝiajn memuarojn. Tiujn kiujn ŝi skribis sur la teraso de Jurjevskaja, kun Mici apud si, kun Ivkica en la fono. En *Urania* ŝi la unuan fojon legis el la libro, kiam ĝi aperis. Knaris la librodorso dum ŝi malfermis ĝin kaj ekrigardis la publikon por vidi ĉu ŝi ekkomencu. Plenis la salono. Ŝajnis ke post la dudekjara paŭzo Berlino pretis ŝin rehavi. Tien ŝi apartenis.

En 1955 estis klare ke Tilla ne plu povas revenadi al Zagrebo post siaj teatraj engaĝiĝoj. Ili multiĝis, la engaĝiĝoj fariĝis konstantaj. Zlata hontis ĉar ŝi ekploris pakinte Tilla. Ŝi ne ploris kiam ŝi pakis ŝin kaj Lutz al Usono, en marto 1941.

Zlata viŝis larmojn en la kuirejo kaj subpremis malĝojon:

-Sed kion mi volas, jam pasis dek jaroj ekde kiam ŝi kudris la stelon por la flago.

En 1958 la turneo gvidis Tilla al Luzern al Stadtheater, 12 jarojn post kiam ŝia teatraĵo tie estis prezentita.

- Kion ŝi ŝatus fari en libera horo?

-Viziti pupteatron!

Ĉi tie pupoj iom aliel aspektis ol tiuj kiujn ŝi kreis en Zagrebo. La pupoj de Zagrebo estis pli avangardaj.

En la jaro 1959 ŝi estis elektita por honora membro de Germana Teatra Akademio. Ŝi ridetis vespere en la lito:

- Paul surpriziĝus, aŭdinte tion, post ĉiuj liaj grumbloj pri mia viena akcento.

Sekvis disktoj, TV- elsendoj, prelegoj, filmpremio por la plej bona flankrolo en 1965.

Tiam ŝi fariĝis regula akademiano, honorprofesoro.

La Okcidenta kaj kun iom da hezito la Orienta Berlino volis ŝin sia. Jugoslavia ambasadejo petis ŝin legi el la teksto pri Dubrovnik. Ŝi ja estis jugoslavia.

En 1967 Tilla lanĉis - la premion Tilla Durieux. Laŭ ŝia propono, la premion atribuu Teatra Instituto por la plej bona aktorino de la teatra sezono. La aktorino Maria Winner la unua ricevis la *Premion Tilla Durieux*. La premiito rajtas je unujara posedo de la kolĉeno de Tilla Durieux.

Tilla mem fiksas la premion ĉirkaŭ la kolo de la aktorino Maria Winner. La fingroj de Tilla iom treme mallertis, ĉu pro artrito, ĉu pro la ekscitiĝo.

Zlata mortis en Zagrebo 1969. Ŝia kolekto malaperis kelkajn jarojn poste. Boris elloĝiĝis al Aŭstrio, forportante grandan parton de ĝi. Sovaĝiĝis la floroj en la ĝardenoj bedoj de Jurjevskaja, leteroj putriĝis en la subtegmentejoj. Tilla lasis siajn librojn post la morto de Zlata ĉe iu najbarino. Tiu atendis jaron, du, dek. Neniu venis preni ilin. Ŝi komencis vendi ilin. En la zagrebaj antikvaĵejoj aperis libroj kun la larĝa subskribo de Tilla Durieux.

Por la 90a naskiĝtago de Tilla venis bukedo kun 90 rozoj de la Germana Teatro kiun ŝi helpis famigi antaŭ sesdek jaroj.

Tilla mortis en Berlino la 21an de februaro en 1971. La februara mortotago estis la centa naskiĝtago de Paul Cassirer. Oni funebris en teatroj ambaŭflanke de la berlina muro. Oni enterigis Tilla en la tombon de Paul Cassirer. Post tiom da jaroj, ŝi definitive restis ĉe li.

Zagreba eldonejo prenis en la naŭdeka la nomon Durieux. La eldonejo dignas je ŝi, je ŝia infana spato fosanta truon por la botelo kun sekretaj dokumentoj. Tilla ŝatus scii, ke en Zagrebo oni daŭre prononcas ŝian nomon tiel stumble kiel oni elparolis dum ŝiaj dudek jaroj.

La najbarino konservis la parfumboteleton de Tilla. Se oni dum suna tago flaras ĝin, nenio senteblos. Sed aŭtune, kiam la nebulo kovras la korton

de Jurjevskaj kaj kolomboj kunsidiĝas por varmiĝi sur la breton de la ronda tegementeja fenestro, iu malforta odoro leviĝas el la boteleto. Tiel odoras la pasinteco.

*Willy Brandt (1913- 1992) germana politikisto, Nobelpremiita por paco 1971

** Josip Broz Tito (1892-1980) jugoslavia politikisto

*** *meti sponĝon super io – germanlingve: forviŝi*

**** *esti beleco - germanlingve: beli*

***** *Sergej Sergejeviĉ Prokofjev (1891-1953) rusa komponisto kaj pianisto*

***** *Antaŭ ĉiuj, en soldatmantelo vestita,
marŝis la libereco, nia unua amo. (versoj de bosnia poeto Izet Sarajlić)*

ENHAVO

1. Hondurasa rifuĝo
2. La ĝardeno en Honduraso
3. Sub la speguleto
4. Frazaro
5. La doto de Salome
6. La kapo sur la divano
7. La vespero de la rozkolora bluzo
8. Ĉe Renoir, julio 1914
9. Militvolontuloj
10. Svislando, 1916
11. Pafo ĉe la advokato
12. La tria novedzina bukedo
13. La lasta berlina teatraĵo
14. Kvin cigaredoj post la bierfarejoj
15. La domo de la epsikopo
16. La albumo pri la episkopo
17. Hotelestrino
18. Fuĝo al Usono
19. Germano en la domo
20. Studentoj
21. Pupfarado
22. La paŝtisto el Transilvanio
23. Zagreb 1945, la teatraĵo de Tilla Durieux
24. La ĝenerala demandaro
25. La reĝisoro aperis

La jenaj fontoj estis uzitaj dum la verkado de la libro pri Tilla:

1. Tilla Duriuex: Meine ersten neunzig Jahre, F. A. Herbih 1971 u. 1979
2. Renate Moehrmann: Tilla Durieux-Paul Cassirer, Rowohlt, Berlin 1997
3. Victor Klemperer: LTI Notizbuch eines Philologen, Verlag Philipp Reclam, Leipzig 1975
4. Nenad Popović: Tilla Durieux: tekstovi o zagrebačkim godinama, u povodu desetgodišnjice smrti, Zagreb, Republika 1991.
5. Tilla Durieux: Zagreb 1945, Republika, Zagreb, 1991.
6. Slobodan Šnajder: Draga Tilla, Zagrebačke noći 1941-1945 radiodrama Zagreb, Republika 1991.
7. Ivo Goldstein: Holokaust u Zagrebu, Novi Liber- Židovska općina, Zagreb 2001.
8. Aleksandra Sanja Lazarević: *Zbirka Lubienski, Dokumenti i sjećanja u Mezologija 32, 1995.*
9. Aleksandra Sanja Lazarević: Dragocjenosti zbirke Lubienski u *Šetnjom kroz Zagreb, Sajamski vodič s.a.*
10. Tilla Durieux: Mojih prvih devedeset godina, Duriex, Zagreb 2001.
11. Hommage an Tilla Durieux, Goethe Institut Zagreb, Kulturni informativni centar 2001.
12. Vladimir Koščak: Josip Juraj Strossmayer, Revija Osijek, Izdavački centar Otvorenog sveučilišta 1990.
13. Tilla Durieux i njezina zbirka umjetnina u Zagrebu, Muzej grada Zagreba 1986.
14. Muzej grada Zagreba: Soba Tille Durieux
15. Dokumentoj pri Familio Unukić-Adrovsky el la privata kolekto de la aŭtorino